

**SEP JUNAJ  
AŬSTRALIANOJ**

de

**ETHEL TURNER**

tradukis el la angla  
**RUTH McGRATH**

BOOKLEAF PUBLISHING  
Bakers Hill & Beverley WA  
Aŭstralio  
1994

elibro pretigita 2005 de  
Donald Broadribb, la  
pretiginto de la Bookleaf-eldono.  
*Sep junaj aŭstralianoj* estas klasika verko  
de la aŭstralia literaturo. La tradukon pretigis  
Ruth McGrath por siaj familio kaj amikoj, kaj neniam  
estis ĝenerale vendata.

## ENHAVO

Ĉapitro	Paĝo
I	Plejparte Priskriba..... 1
II	Kokidaĵo Por La Ĉefmanĝo..... 7
III	Virto Ne Ĉiam Premiigas..... 13
IV	La Generalo Militiras..... 26
V	“Venontan Ludon Matene”..... 38
VI	Kiel Dolĉe Esti Deksesjara..... 44
VII	Kiel Plaĉus Al Vi Enamiĝi?..... 51
VIII	Ŝtonĵetilo Kaj Katastrofo..... 63
IX	Sekvoj..... 69
X	Bunty En La Rolo De Heroo..... 73
XI	La Forvaginto..... 84
XII	Vergado..... 91
XIII	Gastoj Sen Invito..... 99
XIV	La Invito De La Bienisto..... 107
XV	Tricent Mejlojn Per Trajno..... 113
XVI	Yarahappini..... 122
XVII	Bovoapartigo..... 129
XVIII	La Pikniko Ĉe Krangi-Bahtu..... 135
XIX	Palblua Harrubando..... 142
XX	Malgranda Judi..... 149
XXI	Kiam Subiris La Suno..... 154
XXII	...Kaj Lasta..... 159



## Ĉapitro 1

### Plejparte Priskriba

Antaŭ ol vi vere komencos legi ĉi tiun historion, mi volus mallonge averti vin.

Se vi supozas, ke vi estas legonta pri modelaj infanoj kun eble unu ema al malbonkonduito por reliefigi la moralinstruon, pli bone estus ke vi tuj formetu la libron kaj prenu Sandford kaj Merton\* aŭ iun similan normigan verkon por infanoj. Neniu el la sep estas vere bonkondata pro la bona kialo ke aŭstraliaj infanoj neniam estas tiaj.

En Anglio kaj Ameriko kaj Afriko kaj Azio la etuloj eble estas perfektaj modeloj de virto, mi scias malmulton pri ili.

Sed en Aŭstralio modelaj infanoj estas—mi tion diras ne sen dankemo—io nekonata.

Eble estas ke la miasmoj de petolemo plej bone evoluas en la suna brileco de nia atmosfero. Povas esti ke lando kaj popolo kune estas junkoraj kaj la animoj de la infanoj ne estas premitaj kaj malgajigitaj de multjara malĝoja historio.

Estas insida fulmeto de ĝojo kaj ribelemo kaj petolemo en la naturo ĉi tie kaj sekve ankaŭ en la infanoj.

Ofte la lumo fariĝas obtuza kaj la helaj koloroj paliĝas ĝis neŭtralaj nuancoj en la polvo kaj varmego de la tago. Sed kiam ĝi travivas ludotagojn kaj lernotagojn, sole la cirkonstancoj diktas ĉu la elektra fulmbrilo fariĝu erarlumo al la sentaŭguloj aŭ ĉu ĝi varmigu la bruston al la viglaj, sinceraj, lojaluloj kiuj

estas la solaj kiuj kapablas “antaŭenigi Aŭstralion”.

Jam sufiĉe pri tio. Mi rakontu al vi pri miaj sep elektitoj. En la nuna momento ili vespermanĝas en la infanejo kun minimuma komforto kaj maksimuma bruo, do se vi povas toleri surdigan kunsonadon de voĉoj kaj nemuzikan tintadon de fajencaĵoj mi kondukos vin en la ĉambrojn kaj prezentos ilin al vi.

Infaneja vespermanĝo estas institucio pli angla ol aŭstralia: estas ia sento pri bona kamaradeco inter gepatroj kaj infanoj ĉi tie kaj tuta manko de respektado flanke de ĉilastaj. Do eĉ en la plej riĉaj familioj malofte okazas ke la gepatroj ĉefmanĝas en solena aparteco dum la infanoj ricevas vespermanĝon en alia ĉambro; ili ĉiuj kuniĝas ĉirkaŭ komuna tablo kaj la etuloj dividas la samajn pladojn kaj vigle partoprenas en [al] la konversacio.

Sed ĉar temas pri ĉikanema kaj iom incitiĝema patro kaj sep infanoj kun bonegaj pulmoj kaj nelacigeblaj langoj, kion fari krom doni al ili apartajn ĉambrojn en kiuj manĝi?

Kapitano Woolcot, la patro, aldone al ĉi tiu apartigo, remburigis per dika felto la svingpordon ĉe la supera etaĝo sed la bruo flosadis malsupren ĝis la manĝoĉambro en bonhumora senĝena maniero malgraŭ tio.

Ankaŭ ĝi estis infanejo sen vartistino, do tio parte klarigis la aferon. Meg, la plej aĝa, havis nur dek ses jarojn, tial oni ne povus atendi ke ŝi starigu bonan disciplinon, kaj la malordema kvankam bonkora knabino kiu laŭdire kombinis la taskaron de vartistino kaj domservistino tiom okupiĝis pri sia dua ofico ke la unua suferis iom grandan neglekton. Ŝi kutimis surtabligi la manĝojn en la infanejo kiam neniu el la knabinoj troveblis por helpi ŝin, kaj ŝovi la du plej junajn en iliajn vestojn matene, sed krom tio la sep devis sin mem prizorgi.

La patrino? vi demandas.

Ho ŝi havis nur dudek jarojn—nur bela, ridvizaĝa knabino ŝi estis, kiun ili ĉiuj adoris, kaj kiu estis malmulte pli respondeca kaj minimume pli lerta en la mastrumado ol estis Meg. Nur la plej juna el la idaro estis ŝia, sed ŝi ŝajnis egale ami la ceterajn ses kiel ĝin kaj traktis ĝin kvazaŭ ĝi estus tre amuza katido pli ol vere vivanta homido kaj ŝia propra.

Efektive ĉe Misrego—per tiu nomo ilia domo ĉiam estis konata, kvankam mi kredas ke alia estis pentrita super la balkono—tiu bebo ŝajnis amuzega ŝerco al ĉiu. La Kapitano kutime ridis kiam li vidis ĝin, balancis ĝin kaj tuj petis ke iu alia ĝin prenu.

La infanoj trenis ĝin ĉien kun si, faligis ĝin sennombrajn fojojn, forgesis ĝian mantelon en pluvaj tagoj, surmetis al ĝi tro da vestoj kiam estis varme, manĝigis ĝin per la plej eksterordinaraj nutraĵoj kaj tamen ĝi estis la plej sana, bela kaj ĝoja bebo kiu iam suĉis dikan polekseton.

Krome oni neniam nomis ĝin “bebo”; tio estis la speciala nomo de la plej proksima al ĝi laŭ aĝo. Kapitano Woolcot estis dirinta “Nu do, ĉu ĉi tiu estas la Generalo?” kiam oni metis en liajn brakojn la etan, ruĝan, elstarokulan estaĵon kaj la nomo ricevis ĉiutagan uzadon kvankam mi kredas ke en la baptosoleno la subpastro ja diris ion pri Francisko Ruperto Burnando Woolcot.

Bebino havis kvar jarojn kaj ĉiam estis mola, dika etulino, ĉarme karesinda, kun grandaj, ridetemaj okuloj kaj lipoj tre kisindaj kiam ili estis liberaj de konfitaĵo.

Ŝi tamen havis emon plorigi la Generalon. Alie ŝi vere estus preskaŭ modela infano. Sennombrajn fojojn oni trovis ŝin premanta ĝian kompatindan bruston por “fajfigi” ĝin, aŭ eĉ pinĉanta ĝiajn braketojn aŭ tiranta ĝian senkulpan nazon

simple por la stranga plezuro aŭdi la vekriojn kiujn ĝi tuj eligis. Kapitano Woolcot klarigis tiun strangan tendencon per la fakto, ke la infano iam posedis hidropseaspektan lanecan ludŝafidon el kiu la plej forta premado eligis nur mallaŭtan fajfeton; li diris ke estas ja kompreneble ke nun kiam ŝi havas ion tiel taŭgan por premado ŝi volas profiti ĝin.

Bunty havis ses jarojn kaj estis dika kaj tre mallaborema. Li malamis pilkoĉasadon en kriketludoj. Li abomenis eĉ la nomon “paperĉasado” kaj rilate al plenumado de irkomisioj, nu, antaŭ ol oni povus finklarigi pri kio temas, li jam tute malaperis. Li estis sub meza kresko por sia aĝo kaj mi dubas ĉu li iam vidiĝis purvizaĝa. Eĉ en la preĝejo kvankam la fronto direktata al la pastro eble estis akceptebla, la sidantoj sur la apuda benko ĉiam havis seninterrompan vidon de la nigra rando kie la lavado ĉesis.

La plej proksima sur la listo—vi ja komprenas ke mi antaŭeniras de la plej juna ĝis la plejaĝa—estis la “ekspoziciinda Woolcot” kiel Pip, la plej aĝa knabo, kutimis diri. Vi ja estas vidinta tiujn ravajn infananĝelajn vizaĝojn sur la Kristnaskaj salutkartoj de Raphael Tuck, ĉu ne? Mi kredas ke la artisto simple revis pri Nell, kaj poste reproduktis la vizion malperfekte. Ŝi estis dekjara kaj havis feecan figuron, orajn harojn ariĝantajn en mirindaj ondoj kaj bukloj ĉirkaŭ ŝia vizaĝo, delikate avelkolorajn okulojn, kaj kiel buŝon rozburĝoneton.

Krom tio ŝi ne estis memfiera, la familio evitigis tion—Pip estus tre frue haltiginta tian misevoluon; tamen iel okazis ke se estis krome havebla bela rubando aŭ sufiĉe da alloga ŝtofo por fari ankoraŭ unu robeton, ŝi sendispute ĝin ricevis.

Judi estis pli aĝa je nur tri jaroj, sed pli grandan kontraston oni ne povus imagi. Nelli sin movis iom malrapide



kaj estus pentrinda en kiu ajn pozo. Judi'n laŭ mia kredo oni neniam vidis marŝanta kaj ŝi malofte aspektis pentrinda. Se ŝi ne kuregis frenezule al la loko kiun ŝi celis, ŝi iradis per serio da saltoj, saltegoj kaj strangaj saltetoj. Ŝi estis tre maldika, kiel kutimas ĉe homoj kiuj havas hidrargon en la vejnoj anstataŭ sango; ŝi havis malgrandan, vervan, lentugan vizaĝon kun tre lumaj, malhelaj okuloj, malgrandan, firman buŝon kaj faskon da malordaj, bukraj, malhelaj haroj kiuj estis por ŝi nevenkebla ĝenaĵo.

Sendube ŝi estis la plej malbonkondata el la sep, probable ĉar ŝi estis la plej inteligenta. Ŝia brila elpensemo venigis ilin senĉese en misaferojn kaj kvankam ŝi ofte akceptis egalanime la plej grandan porcion de la kulpo ili ofte mallojalis kaj riproĉis ŝin ĉar ŝi sugestis la petolaĵon. Oni baptis ŝin "Helena" kio neniel klarigas "Judi", sed ŝercnomoj kelkfoje estas neklarigeblaj, ĉu ne? Bunty diris ke estas ĉar ŝi ĉiam spasme kaj salte sin movas kiel la fama edzino de Pulĉinelo, kaj en tio estas iom da vero. Ŝia alia nomo "Ŝaŭmo" estis pli facile komprenebla; Pip diradis ke li ankoraŭ neniam vidis zingibran elon kiu eferveskis kaj vezikiĝis kaj bruis samgrade kiel Judi.

Mi ankoraŭ ne prezentis al vi Pip, ĉu? Li iom similis al Judi sed estis pli belaspekta kaj alta kaj li havis dek kvar jarojn kaj havis same bonan opinion pri si kaj same malbonan opinion pri knabinoj kiel knaboj de lia aĝo kutime havas.

Meg estis la plej aĝa en la familio kaj havis longan blondan harplektaĵon kies tiradon Bunty ĝue kulpadis, dolĉan iom reveman vizaĝon kaj surŝuton de belaj lentugoj kiuj kaŭzis al ŝi multajn animdolorojn.

La familianoj kredis ke ŝi verkas poemojn kaj rakontojn kaj eĉ enskribadas taglibron, sed oni neniam vidis eĉ unu el ŝiaj folioj, tiel zorge ŝi tenis ilin enŝlositaj en sia malnova lada

ĉapelujo. Se vi estus demandinta ilin pri la patro ili ĉiuj estus respondintaj kun sufiĉe da fiero ke li estas “militisto” kaj ofte for de la domo. Li tute ne komprenis infanojn kaj senĉese grumbladis pri la bruo kiun ili faras kaj la mono kiun ili kostas. Mi tamen kredas ke li iom fieris pri Pip kaj kelkfoje se Nelli estis ĉarme vestita li kunprenis ŝin kun si en la kariolo.

Li estis proponinta sendi ĉiujn ses al pensionlernejoj kiam li hejmen venigis sian knabinedzinon, sed tion ŝi rifuzis permesi.

Komence ili provis loĝadon en la kazerno, sed post iom da tempo ĉiu en la oficira loĝejo ribelis kontraŭ la petolaĵoj de tiuj virtomankaj infanoj, do Kapitano Woolcot akiris domon iom malproksime laŭ la rivero Parramatta kaj kun forta sento de amaro translokigis sian familion tien.

La ŝanĝo plaĉis al ili; ĉar estis granda sovaĝejo sub nomo de ĝardeno, du-tri kampoj, sennombraj budoj por kaŝludoj kaj antaŭ ĉio, la akvo. Ilia patro tenis tri belajn ĉevalojn, unu ĉe la kazerno krom ĉasĉevalo kaj rajdĉevalo ĉe Misrego; do por kompensi la infanoj—kiuj cetere neniel sin ĝenis pri tio—portadis ĉifonitajn kubute truitajn vestojn kaj eluzitajn botojn. Instruon ili ricevis—ĉiuj krom Pip, kiu vizitadis gimnazion—de triaranga privata instruistino kiu vivadis sub daŭra timo ke ŝiaj instruatoj malkovros ŝian mankon de scio. Efektive ili estis jam de longe konstatintaj la situacion, kiel infanoj ja emas fari, sed tute plaĉis al ili ne esti premataj kaj devigataj labori, do ili unuanime silentis pri tio.

<<<<<>>>>>

\* Sandford kaj Merton (1783) de Thomas Day, estis moralinstrua rakonto por infanoj.

## Ĉapitro II Kokidaĵo Por La Ĉefmanĝo

Mi esperas ke vi ankoraŭ ne tute surdiĝis ĉar, kvankam mi jam prezentis al vi ĉiun, la vespermanĝo ankoraŭ iom longe daŭros, do ni devos plu resti iom da tempo en la infanejo. Dum la tuta tempo kiam mi rakontis, Pip plendadis pri la manko de bonaj manĝaĵoj. Sendube la surtablaĵoj ne estis tre apetitigaj; la tablotuko aspektis kvazaŭ ĝi estus surĵetita, la fajencaĵoj estis tre difektitaj kaj rompetitaj, la teo estis tre malforta kaj por manĝi estis nenio krom dikaj buterpanoj. Tamen ĝi estis la kutima vespermanĝo kaj ĉiuj ŝajnis miri pri la kolereksplodo de Pip.

“Mia patro kaj Estera (ili ĉiuj nomis sian junan vicpatrinon per ŝia voknomo) havas rostitan kokidon, tri legomojn kaj kvar specojn de pudingo,” li diris kolere; “ne estas juste!”

“Sed ni ĉefmanĝis je la unua, Pip, kaj via estas konservita kiel kutime,” diris Meg, elverŝante teon abunda je varmega akvo kaj sukero.

“Ŝafidaĵon akve kuiritan kaj karotojn kaj rizpudingon!” replikis ŝia frato velkige. “Kial ni ne povas havi rostitan kokidaĵon kaj kustardon kaj tiel plu?”

“Jes, kial ne?” eĥis la malgranda, manĝavida Bunty, la okuloj briletantaj.

“Kiel multe oni bezonus por doni al ni ĉiuj!” diris Meg,

bonhumore atakante la panbulon.

“Ni estas nur infanoj—ni estu dankaj pro ĉi tiuj bonaj, dikaj pantranĉaĵoj kaj abundo da fandiĝanta butero,” diris Judi per virta voĉtoneto.

Pip ŝovis sian seĝon for de la tablo.

“Mi iros malsupren por peti iom da rostita kokidaĵo”, li diris kun spitema rigardo. “Mi ne povas forgesi ĝian odoron, kaj ili havas multon sur la tablo—mi kaŝe rigardis en la pordon.”

Li prenis sian teleron kaj malsupreniris la ŝtuparon, baldaŭ revenante, je ĉies miro, kun iom granda porcio sur ĝi.

“Li apenaŭ povis rifuzi,” li diris kun subrido. “Kolonelo Bryant estas tie; sed li aspektis iom kolere—Jen, Ŝaŭma, mi duonigos ĝin kun vi.”

Judi avide alŝovis sian teleron, akceptante ĉi tiun nekutime grandaniman proponon kaj ricevis tre malgrandan frakcion, eble kvinonon, kun granda dankemo.

“Mi simple amas kokidaĵon,” diris Nell sopire, “Mi tre emas malsupreniri kaj peti flugilon—mi kredas ke li donus tion al mi.”

Ĉi tiuj malrespektemaj infanoj, kiel mi timas ke vi jam rimarkis, ĉiam aludis pri la patro kiel “li”.

“Jes, tion faru,” diris Pip kun brileto en la okuloj.

Nell prenis alian teleron kaj foriris malrapide al la subaj regionoj. Ŝi sekvis la domservistinon en la manĝoĉambron kaj staris flanke de sia patro, la telero zorge kaŝita malantaŭ ŝia dorso.

“Nu, fraŭlineto, ĉu vi ne premos al mi la manon? Kiel vi nomiĝas?” diris Kolonelo Bryant, lude frapetante ŝian vanganon.

Nell rigardis supren per modestaj, belaj okuloj.

“Elinor Woolcot, sed mi estas konata kiel Nell, ŝi diris,

etendante la maldekstran manon ĉar la dekstra okupiĝis pri la telero.

“Kia barbaretto vi estas, Nell,” ridis ŝia patro, sed li donis al ŝi rapidan, koleretan rigardon. “Kie estas via dekstra mano?”

Ŝi tiris ĝin malrapide de malantaŭe kaj etendis la fendhavan malnovan teleron. “Mi pensis ke eble vi donos al mi ankaŭ iom da kokidaĵo” ŝi diris—“Nur femuron aŭ flugilon aŭ iom da brustaĵo sufiĉus.”

La kapitano kuntiris la brovojn. “Kion ĉi tio signifas? Pip ĵus venis al mi ankaŭ. Ĉi vi havas nenion pro manĝi en la infanejo?”

“Nur buterpanojn, tre dikajn” vespiris Nelli.

Estera kun malfacilo subpremis rideton.

“Sed vi ĉiuj ĉefmanĝis je la unua.”

“Ŝafajon akve kuiritan kun karotoj kaj rizpudingon,” diris Nell malgaje.

Kapitano Woolcot detranĉis femuron preskaŭ sovaĝe kaj metis ĝin sur ŝian teleron.

“Nun forkuru; mi ne scias kio estas al vi du hodiaŭ vespere.”

Nelli atingis la pordon, tiam sin turnis.

“Ho, se vi nur donus al mi flugilon por kompatinda Meg—Judi iom ricevis de Pip, sed Meg nenion havas,” ŝi diris kun bele afliktita esprimo kiu absolute tuŝis la koron de Kolonelo Bryant.

Ŝia patro mordis sian lipon, dehakis flugilon en malbonaŭgura silento kaj metis ĝin sur ŝian teleron.

“Nun forkuru kaj ne plu ĝenu min per tiaj sensencaĵoj—kara.” La lasta vorto tre malfacile eliĝis.

La aperon de Nell kun la du porcioj de kokidaĵo oni salutis per brua aplaŭdo en la infanejo; Meg estis ravita de sia

ricevaĵo, fortranĉis pecon por Bebinjo kaj la manĝo gaje daŭris.

“Kie estas Bunty?” diris Nell, paŭzante subite kun tre pura femurosto inter la fingroj, “ĉar mi esperas ke li ne iris ankaŭ. Mi emas supozi ke patro ne estus tre kontenta, aparte ĉar tiu viro estas tie.”

Sed tiu malgranda junulo tion estis farinta kaj li baldaŭ revenis deprimita.

“Li rifuzis iom doni al mi—li diris ke mi foriru, kaj la viro ridis kaj Estera diris ke ni estas tre malbonaj; mi tamen prenis plumitan terpomon de la tablo ekster la pordo.

Li disigis siajn malpurajn manetojn kaj faligis la mal-allogan plumecan frandaĵon sur la tablotukon.

“Bunty, vi estas porko,” vespiris Meg, suprenrigardante de sia libro. Ŝi ĉiam legis ĉetable kaj la nuna rakonto temis pri kelkaj tre rafinitaj, elegantaj junulinoj.

“Porko vi mem—ĉiu el vi havis kokidaĵon krom mi—aviduloj!” replikis Bunty feroce dum li tre rapide manĝis sian terpomon.

“Ne, la Generalo ne ricevis,” diris Judi, kaj la konata petolemo subite aperis en ŝiaj malhelaj okuloj.

“Nu, Judi!” ekdiris Meg averte; ŝi eĉ tro bone komprenis la signifon de ĝuste tiu mieno.

“Ho, mi tute ne intencas malutili al vi, karulinjo,” diris Fino Judi, danĉpaŝante ĝis la kontraŭa flanko de la ĉambro kaj ame frapetante la blondan kapon de sia fratino dum ŝi preteriris, “Nur estas la Generalo kiu emas sin distri.”

Ŝi levis lin el la alta infanseĝo kie li sidis tamburanta per kulero sur la tablon kaj manĝanta sukeron dum la paŭzoj.

“Veran agadon vi iras partopreni, Generalo,” ŝi diris, dance alproksimiĝante la pordon kun li.

“Ho Judi, kion vi intencas fari?” diris Meg petege.

“Ju-Ju” kokerikis la Generalo, preskaŭ saltante el la brakoj de Judi kaj antaŭsentante amuziĝon kun la instinkto de veterano.

Laŭ la koridoro ili iris, la cetera kvino sekvanta por rigardi la evoluon de la afero. Judi sidiĝis kun li sur la lasta ŝtupo.

“Knab’ havu ĉu-ka-ĉuk, belan ĉuk-ĉuk?” ŝi diris inside.

“Ĉuk-ĉuk” ĝoje kokerikis la Generalo, pene ekstarante,—  
“trov’ ĉuk-ĉuk.”

“Tien,” flustris Judi, lin ŝovetante tra la duone malfermitan manĝejan pordon. “Petu Paĉjon.”

Tute trans la ĉambrom la bebo ŝanceliĝis per siaj dikaj, nestabilaj kruretoj.

“Ĉu ĉiuj la infanoj estas demonhavaj ĉivespere, Estera?” demandis la Kapitano dum lia plej juna filo ŝancele ekkaptis lian kruron kaj penis grimpi sur ĝin.

Li rigardis malsupren en la malpuran, kavethavan vizaĝon. “Nu, Generalo, kaj al kio ni ŝuldas la honoron de via ĉeesto?”

“Ĉuk-ĉuk, ĉu-ka-ĉuk, ĉuk, ĉuk, ĉuk,” diris la Generalo, tuj sin metante sur la manojn kaj genuojn por serĉi la plumhavajn karulojn kiuj laŭ Judi troviĝas tie.

Sed Estera kaptis la karan, malpurvizaĝan friponeton kaj portis lin baraktantan el la ĉambro. Je la komenciĝo de la ŝtuparo ŝi preskaŭ faletis sur la ceterajn familianojn.

“Ho vi kanajletoj, vi malbonaj, pekaj diabletoj!” ŝi diris, penante frapi ilin ĉiujn kaj kompreneble sen sukceso.

Ŝi sidis sur la plej malsupra ŝtupo por ridi dum momento, tiam ŝi transdonis la Generalon al Pip.

“Morgaŭ,” ŝi diris, ekstarante kaj rapide glatigante la abundan hararon, kiun la Generalo estis ĝoje ekkaptinta, “morgaŭ mi batos vin ĉiujn per la balailstango.”

Ili rigardis dum la trenajo de ŝia robo el flava silko malaperis denove en la manĝoĉambro, kaj malrapide revenis al la infanejo kaj sia interrompita manĝo.

<<<<<>>>>



### Ĉapitro III Virto Ne Ĉiam Premiigas

Ne estis atendeble ke tia okazo forpasu sen reago, kaj tamen, puni sep infanojn samtempe estas malfacile. Komence, Kapitano Woolcot petis al Estera ke ŝi ordonu al Fino Marsh, la instruistino, devigi ilin ĉiujn lerni dek francajn verbojn; sed, kiel Judi atentigis, la Generalo kaj Bebinjo kaj Bunty kaj Nell ankoraŭ ne atingis tiun dignan etapon de la vivo en kiu oni konatiĝas kun la francaj verboj, do tia puno estus maljusta. Pri la puno, do, oni ankoraŭ ne decidis kaj ĉiu konsciis pri malagrabla sento de malcerteco.

“Via patro diras ke vi estas hontinda tribo,” diris la juna vicpatrino malrapide, sidiĝante en la infaneja balanca seĝo tagon poste. Ŝi portis treniĝantan tualetrobon el blanka muslino kun ĉerizkoloraj rubandoj, sed pinglo anstataŭis butonon en unu-du lokoj kaj la punto iom disŝiriĝis ĉe unu maniko.

“Meg, kara, verdire vi estas tre malordema kaj Judi estas preter espero.”

Meg portis nebelan robon el verda kaŝmiro kun truoj ĉe la kubutoj kaj la pluŝo kelkloke forfrotita, dum la tre mallonga, rozkolora robo portata de Judi estis kelkloke ŝirita kaj la koloro apenaŭ estis videbla pro la multaj fruktosukaj makuloj.

Meg iom ruĝiĝis. “Mi scias, Estera, kaj mi volonte min vestus same bele kiel kiu ajn, sed efektive ne penvaloras ripari ĉi malnovaĵon.”

Ŝi prenis sian libron pri la elegantaj junulinoj kiuj perturbas ŝian trankvilon kaj iris kun ĝi al la fotelo.

“Nu, Judi, vi iru kunkudri tiujn ŝiraĵojn kaj metu kelkajn butonojn sur via robo.” Estera parolis kun nekutima firmeco.

La okuloj de Judi fulmis kaj fajretis.

“Ĉu ponardon mi vidas antaŭ mi, la tenilon je mia mano? Do mi prenu ĝin!” ŝi diris impertinente, forkaptante unu el la pingloj de la robo de Estera, riparante per ĝi la propran kaj sin klinante.

Nun Estera iom ruĝiĝis.

“Kulpas la Generalo, Judi, li ĉiam fortiras la butonojn de miaj tualetroboj kiam mi ludas kun li. Sed mi forgesis. Infanoj, mi havas por vi malbonan sciigon.

Oni silentis senspire. Ĉiuj ariĝis ĉirkaŭ ŝiaj genuoj.

“Juĝon oni proklamis,” diris Judi dramege, “ni razu al ni la kapon kaj surmetu sakaĵon.”

“Via patro diras ke li ne povas toleri ke tia konduto okazu senpune, precipe ĉar vi ĉiuj estis lastatempe tre agacaj, do vi estas ĉiuj—”

“Forprenotaj kaj pendigotaj per la nuko ĝis ni estos mortintaj!”

“Silentu, Judi. Mi faris mian eblon por senkulpigi vin sed tio nur despli incitas lin. Li diras ke vi estas la plej malordema, neregebla infanaro en Sidnejo kaj li punos vin ĉiufoje kiam vi mispaŝos, kaj—”

“Estos plorado kaj dentogrincado.”

“Ho, fermu la buŝon, Judi. Ĉu vi ne povas permesi al ni aŭdi?”

Pip metis manon sur[super] ŝian buŝon kaj tenis ŝin per la haroj dum Estera plu informis.

“Neniu el vi iros al la ferakonta spektaklo. Oni mendis

biletojn por jaŭdo vespere, kaj nun, vi tre malsaĝaj infanoj, vi ĉiuj devos resti hejme.”

Okazis unu-duminuta kuna vekriado. Ili ĉiuj antaŭĝuis ĉi tiun plezuron jam de preskaŭ monato kaj la disreviĝo estis al ĉiuj vere amara.

“Ho Estera, tio vere estas tro forta! Ĉiuj la uloj ĉe la lernejo jam vizitis ĝin.” La bela vizaĝo de Pip kolere ruĝiĝis. “Kaj pro tia bagatelajo ankaŭ!”

“Simple ĉar vi havis rostitan kokidaĵon por la ĉefmanĝo,” diris Judi per voĉo sufokeca. “Ho, Estera, kial vi ne povintus manĝigi vin per bovino, aŭ ĉevalo aŭ hipopotamo—kio ajn krom rostita kokido?”

“Ĉu vi ne povus persvadi lin, Estera?” Meg ŝin rigardis pete.

“Kara Estera, tion faru!”

“Ho dolĉa, bela Enjo, penu!”

Ili sin kroĉis al ŝi avide. Bebinjo ĵetis la brakojn ĉirkaŭ ŝian kolon kaj preskaŭ sufokis ŝin; Nell karesis ŝian vangon. Pip frapetis al ŝi la dorson kaj petis ke ŝi “estu bonulo”; Bunty kaŝis sian nazon en la haroj ĉe ŝia nuko kaj silente larmis; Meg tenis ŝian manon malĝojege; la Generalo eligis serion da ĝojkriĉoj kaj Judi, agacita, premiis lin per frapo.

Estera promesis fari sian eblon, peti kiel neniam antaŭe, kaĵoli, petegi, perflati, minaci; kaj ili fine permesis al ŝi foriri post tiu certigo.

“Mi tamen konsilas al vi ĉiuj esti preternormale bonkonduktaj kaj kvietaj la tutan tagon,” ŝi diris, ririgardante el la pordejo. “Tio plej efikus ĉe li, kaj li estos hejme la tutan tagon.”

Bonkonduktaj! Estis absolute dolorige observi la virton de tiuj infanoj dum la cetero de la tago.

Estis feria tago kaj Fino Marsh estis for, sed eĉ ne unufoje

la sonoj de kverelado, ridado aŭ plorado atingis la subajn regionojn.

“Civitanoj de Romo, la okuloj de la mondo rigardas vin!” diris Judi solene, kaj ĉiuj estis promesintaj tiel konduki ke la koro de la patro nepre moliĝos.

Pipo surmetis sian lernejan jakon, brosis siajn harojn, prenis stakon da studlibroj kaj iris al la kabineto kie lia patro estis skribanta leterojn kaj kie estis al li permesate fari siajn hejmtaskojn.

“Nu, kion vi volas?” demandis la Kapitano, kuntirante la brovojn. “Ne, ne utilas veni al mi pri tiu hundido, sinjoro—mi ne permesas ke vi retenu ĝin.”

“Mi venis por studi, sinjoro,” diris Pip milde. “Mi sentas ke mi iom postrestas pri matematiko, do mi ne malŝparos la tutajn feriojn, ĉar kostas al vi multege pro mia instruado.”

La Kapitano spasme spiretis kaj rigardegis al Pip; sed la vizaĝo de la knabo estis tiel ridetomanka kaj serioza ke tio malarmis lin, kaj li eĉ gratulis al si ke lia plej aĝa filo finfine konstatis siajn mankojn.

“Estas tiuj problemaroj en tiu tirkesto kiujn mi faris kiam mi estis lerneano,” li diris bonvoleme. “Se ili iel utilas al vi, vi rajtas elpreni ilin.”

“Multajn dankojn—ili tre helpas,” diris Pip dankeme.

Li ekzamenis ilin kun admiro klare pentrita sur la vizaĝo. “Kiel tre klare kaj korekte vi laboris, patro,” li diris kun sopiro. “Mi demandas al vi ĉu mi iam atingos ĉi tiun nivelon! Kiom da jaroj vi havis, patro, kiam vi faris ilin?”

“Mi havis proksimume vian aĝon,” diris la Kapitano, levante la foliojn.

Li ekzamenis ilin kun la kapo iom oblikve tenata. Li iom fieris pri ili, aparte pro tio, ke li jam tute forgesis kiel prilabori

decimalajn frakciojn kaj ne estus povinta fari kvadratan ekvacion eĉ por savi al si la vivon.

“Tamen, mi ne pensas ke vi devas tute senkuraĝiĝi, Pip. Mi iom antaŭiris la aliajn knabojn en mia klaso en tiuj studobjektoj, laŭ mia memoro. Ni ne povas ĉiuj eminenti en la sama sfero kaj mi ĝojas ke vi ekkonstatas la gravecon de laboro.”

“Jes, patro.”

Meg estis enirinta la salonon kaj sidis sur la planko antaŭ la meblo kiu entenis la muzikfoliaron, kun tondilo, fingringo kaj volvaĵo de mallarĝa blua rubando sur la genuo, kaj ĉiuj la kantnotaroj de la patro, pri kiuj li tiel ofte plendis ke ili disfalas, sternitaj antaŭ ŝi[si].

Li rimarkis ŝin iufoje kiam li preterpasis la pordon kaj aspektis mirigita kaj kontenta.

“Dankon, Margareta; ili tion tre bezonis. Mi ĝojas ke vi tamen povas montri vin servema.”

“Jes, patro.”

Meg kudradis diligente.

Li revenis al sia kabineto kie la kapo de Pip estis klinita studeme, absorbite, kaj piramidoj el libroj estis sur la tablo. Li skribis ankoraŭ du leterojn kaj tiam aŭdiĝis frapeto ĉe la pordo.

“Envenu,” li vokis, kaj eniris Nell.

Ŝi tre zorge portis pleton kovritan de neĝblanka surtelero sur kiu estis glaso da lakto kaj telereto da morusoj. Ŝi metis ĝin antaŭ lin.

“Mi pensis ke eble vi volus havi manĝeton, patro,” ŝi diris milde kaj Pip ricevis subitan tusatakon.

“Mia kara infano!” li diris.

Li rigardis ĝin tre penseme.

“Kiam mi lastafoje trinkis glason da lakto, Nelli, mi havis la aĝon de Pip kaj estis la servojunulo de Barlow ĉe Rugby. Ĝi vomigis min kaj mi neniam plu trinkis.”

“Sed ĉi tiu ne malutilos al vi. Vi trinkos, ĉu ne?”

Ŝi donis al li unu el siaj plej belaj rigardoj.

“Mi same volonte trinkus la akvon en kiu la servistinoj lavis la vazaron, infano mia.” Li prenis moruson, manĝis ĝin kaj grimacis. “Ili estas nematuraj.”

“Jam manĝinte proksimume ses oni ne plu rimarkas ke ili estas acidaj,” ŝi diris entuziasme. Sed li ŝovis ilin for. “Mi estas kontenta akcepti vian verdikton sen propra esploro.” Li tamen rigardis ŝin scivole. “Kial venis al vi en la kapon porti al mi ion, Nelli? Mi ne memoras ke vi iam antaŭe faris tion.”

“Mi pensis ke eble vi malsatas post tiom da skribado,” ŝi diris milde; kaj Pip denove tuis sufoke, kaj ŝi foriris.

Ekstere sub la brileganta suno Judi falĉis la gazonon. Oni dungis nur unu serviston kaj ĉar laboro rilate al la ĉevaloj kaj stalo tiel okupis lian tempon la ĝardeno suferis neglekton. Pli ol unufoje la Kapitano parolis kolerete pri malordaj gazonoj kaj diris ke li hontas kiam vizitantoj alvenas ĉe la domo.

Do Judi, plenplena de fervoro, sin armis per preternormale granda falĉilo kaj eklaboris pri la longa, longa herbo.

“Sankta Ĉielo, Helena! vi distrancos la krurojn!” vokis ŝia patro per maltrankvila voĉtono.

Li estis elpaŝinta sur la antaŭan verandon por fumi mildan cigaron post la moruso ĝuste kiam ŝi ĉirkaŭsvingis sian falĉilon kun admirinda elano kaj senkapigis tutan armeon da flavkaskaj leontodoj.

Ŝi sinturnis kaj donis al li belan rideton.

“Ho, ne, patro!—efektive mi estas tre lerta pri falĉado.”

Ŝi donis novan timigan sed vere sciencan svingon.

“Rigardu tion—tiion—kaj tiiion!”

“Tiion” forprenis pecon de ŝia robo kaj “tiiiion” forigis la supron de rozujo; sed tiaj bagatelaj misokazoj estas ofta fenomeno en multaj sferoj.

“Akcidentoj ja okazas, eĉ al la plej bone reguligitaj herbotondistoj,” ŝi diris trankvile, levante la falĉilon per nova ĉirkaŭsvingo.

“Ĉesu tuj, Helena! Kial vi ne povas iri kaj ludi trankvile kun via pupo kaj ne fari tiajn aferojn?” diris ŝia patro kolereme.

“Kaj ja estis por plezurigi lin ke mi tion faris,” ŝi diris, laŭŝajne alparolante la leontodojn.

“Nu, ne ‘plezurigos lin’ esti devigata provizi vin per korkaj kruroj kaj restoki la ĝardenon,” li diris seke. “Formetu ĝin.”

“Ja kaj estas eleganteco mem ĉiflanke: vi certe ne estus volanta lasi la duonon ne farita simile al viro kun nur unu vango razita.”

Judi de tempo al tempo afektis kuriozan parolmanieron pro iu neklara motivo.

“Nu do, se vi nur bonvolus malsupreniri kaj mem kontroli ĝin, konvinkita vi ja fariĝus.”

La Kapitano kaŝis sian ridetemon malantaŭ siaj lipharoj. La knabineto tre komike aspektis starante tie en sia kurta malnova, rozkolora robo, ĉapelo kun ŝirita randaĵo sur ŝiaj implikitaj malhelaj haroj, siaj okuloj fajretantaj, ŝia vizaĝo ruĝeta, kaj la granda falĉilo en ŝiaj manoj, impertinentaj vortoj sur ŝiaj lipoj.

Li malsupreniris kaj ekzamenis ĝin: ĝi estis bonege farita same kiel la plejmulto de la aferoj entreprenitaj de Fraŭlino Judi, inkluzive de la petolaĵoj; kaj ŝiaj malgrandaj nigre-ŝtrumpitaj kruroj estis ankoraŭ en bona stato.

“Hm! Nu, mi permesas al vi fini la aferon do, konsiderante ke Patriĉjo estas okupata. Kie vi lernis herbotondi, juna sinjorino kun mirindaj scipovoj? (li ŝin rigardis demande); kaj kial vi surprenis tian taskon?”

Judi haste ŝovis siajn buklojn for de sia varma frunto.

“(A) Efektive, ĝi estas ennaskita,” ŝi tuj respondis; “kaj (B)—nu, kaj ĉu mi ne aamas vin kaj plezure ĝojigas vin?”

Li endomiĝis denove, malrapide, penseme. Judi ĉiam estis por li enigmo. El ĉiuj siaj infanoj li malplej komprenis ŝin, kaj kelkfoje okazis ke pensi pri ŝi perturbis lin. En la nuna tempo ŝi estis nur inteligenta, lerta kaj ofte impertinenta infano; sed li ĉiam sentis ke ŝi estas tute malsimila al la ceteraj ses kaj tio donis al li ian senton de ofendo kiam ajn li pripensis la aferon, kio ne estis tre ofte.

Li rememoris ke ŝia propra patrino ofte estis dirinta ke ŝi tremas pri la estonteco de Judi. Tiu ŝia maltrankvila fajro kiu lumis el ŝiaj dancantaj okuloj kaj ardis skarlate sur ŝiaj vangoj kaj pruntis mirindan energion kaj aktivecon al ŝia juna, facilmoza korpo aŭ faros el ŝi noblan, kuraĝan brilan virinon aŭ ŝi ŝippereos sur rokoj neniam atingotaj de la aliaj kaj ĝi flamos ĉiam pli alten kaj forkonsumos ŝin.

“Estu zorgema pri Judi” estis preskaŭ la lastaj vortoj de la maltrankvila patrino kiam, per tiu lumo kiu venas kiam tiu de la mondo estingiĝas, ŝi estis vidinta la ŝtonojn kaj dornojn sur la vojo de tiu aparta paro de malgrandaj, moviĝemaj piedoj.

Kaj ŝi estis mortinta, kaj Judi jam nun stumblas inter ili kaj ŝia patro ne povas “esti zorgema” pri ŝi ĉar li tute ne scias kiel tion fari.

Dum li supreniris la ŝtupojn de la verando denove kaj trairis la enirejon li deziris preskaŭ preĝe ke ŝi ne estu tiel malsimila al la aliaj infanoj, volante ke li povu estingi tiun



strangan flamon en ŝi kiu foje tiel maltrankviligis lin. Li forte suĉis sian cigaron kaj sopiris profunde; poste li sin turnis kaj foriris en la direkton de la staloj por forgesi la tutan aferon.

La servisto estis for, ekzercigante unu el la ĉevaloj en la longa kampo; sed io sin movadis en la jungilara ĉambro, do li eniris.

Tie malgranda, malsekega figuro staris super granda sitelo kaj ion trempadis kun ĉarma vigleco.

Je la sono de liaj paŝoj Bebinjo sin turnis kaj levis al li ŝvitantan vizaĝeton.

“Mi lavi por vi katidĉojn kaj ankaŭ Fliberti-Ĝibeton,” ŝi diris kun radianta mieno.

Li paŝis antaŭen, konsternita.

Jen estis liaj du preferataj katidoj, tremantaj, malgajaj, ĝiskole en ŝaŭmo de sapeca akvo; kaj Fliberti-Ĝibeto, la bela malgranda teriero kiun li ĵus aĉetis por sia edzino, ĉenita al fosto, ankaŭ malseka, malgaja, kaj veaspekta, ankaŭ purigata, frotlavata kaj surverŝata de akvo ĝis ĝia prudento ŝancelis.

“Ili estas tiel puraj kaj plaĉaj—ne plu kun aĉaj puloj nun. Vi ja ĝojas, ĉu ne? Vi povos permesi ke Fliberti suriru vian liton nun, kaj Katidĉo Nigrokula estas—”

Kompatinda Bebinjo neniam finis sian parolon. Ŝi konfuzo sentis ke ŝi aŭdas malgrandan “fivorton” de la patro, ke ŝi estas iom forte skuata kaj eligita el la stalo dum la malfeliĉaj bestoj estas sekigataj kaj tre zorge traktataj.

Sed la plej malbona afero ankoraŭ atendis, kaj la rezultoj estis tiel malbonegaj ke la junaj familianoj Woolcot firme decidiĝis neniam plu afekti virtojn kiujn ili efektive ne posedas.

Bunty, kompreneble, same forte kiel la aliaj deziris doni sian apogon al la kampanjo, kaj tiucele lia unua paŝo estis eniri

sian litĉambron kaj tie fari mirigan lavtaskon rilate siajn vizaĝon, kolon, kaj manojn. Tiam li portis malsupren sian sape brilan vizaĝon kaj ruĝajn, multe frotpurigitajn manojn kaj sin montris en apudeco de la patro, esperante altiri laŭdon.

Sed li estis senpacience petita ke li “iru ludi” kaj li vidis ke li devos trovi alian vojon al kormoligo.

Li vagis en la kabineton, kun ia penso ke li ordigos la jam bonordan librobretaron, sed Pip estis tie, ĉirkaŭita de libroj kaj tranĉe modifanta branĉeton por fari ŝtonjetilon, do li eliris denove. Post tio li supreniris la ŝtuparon kaj esploris la litĉambron kaj tualetejon de la patro. En ĉi-lastata estis vasta kampo por lia agado. Solena uniformo estis sternita sur seĝo kaj ŝajnis al li ke la oraj butonoj aspektas malpli brilaj ol ili devus esti, do li dediĉis senkulpan kvaronhoron al la tasko briligi ilin. Poste li briligis paron da spronoj, kio ankaŭ ne estis riproĉinda. Tiam li serĉis novan taskon.

Estis tuta kolonio da polvokovritaj botoj en unu angulo de la ĉambro kaj estis botelego da nigra melaseca lako sur la kamenbreto. Venis al Bunty la brila ideo purigi ilin ĉiujn kaj starigi ilin en bela vico atendanta la ravitan rigardon de la patro. Li trovis sur la planko naztukon el tre delikata batisto, eĉ se malpura, surverŝis ĝin malavare per lako kaj atakis la unuan paron. Rekompencis lin brila poluro, ĉar ili estis el brilledo; sed la sekvanta kaj la sekvanta kaj la sekvanta ne brilis, kiel ajn energie li frotis. Aŭdiĝis paŝoj sur la ŝtuparo, la firma, konata paŝado de lia patro kaj li paŭzis momenton kun rigardo de konscia virto sur sia brilanta vizaĝeto.

Sed ĝi subite malaperis kaj ĝin anstataŭis hororplena mieno. Li estis ŝovinta la botelon sur grandan fotelon pro oportuneco ĉar li sidis sur la planko kaj nun li rimarkis ke ĝi flanken falis kaj nigra, abomena fluo eliras el ĝia kolo.

Kaj tiu estis la seĝo kiu surhavis la uniformon kaj unu maniko tramalsekiĝis per la likvaĵo, kaj la bela blanka ĉemizo kiu kuŝis tie ankaŭ, atendante ke oni surkudru butonon, estis glueca, abomena! Bunty per freneza, terurita rigardo ĉirkaŭ la ĉambron serĉis iun lokon por sin malaperigi, sed estis nek ŝirmaj anguloj nek kurtenoj, kaj mankis tempo iri en la litĉambron kaj sub la liton. Apud la fenestro estis iom granda ŝranko por medikamentoj kaj kiel lasta rimedo Bunty sin premis en ĝin, la kruroj kuntiritaj, la kapo inter la genuoj kaj la sonoj de misaŭgura kunklakado de boteloj en liaj oreloj. Momenton poste lia patro estis en la ĉambro.

“Granda Ĉielo! Dio benu mian animon!” li diris, kaj Bunty tremis de kapo ĝis piedoj.

Tiam li diris multon tre rapide—“fremdan lingvaĵon” kiel Judi nomis ĝin; piede faligis ion kaj kriis “Estera!” en teruriga voĉtono. Sed Estera estis for en unu el la kampoj kun la Generalo, do ne estis respondo.

Pli da fremdlingvaĵo, pli da brua paŝado.

La dentoj de Bunty kunklakadis brue; li levis manon por kunpremi la buŝon, kaj la ŝranko perdis la ekvilibron, renversiĝis, elĵetante ĝian okupanton ĝuste ĉe la piedoj de la patro, kaj la botelojn ĉiudirekten.

“Mi ne faris—mi tute ne—ne estis mi—mi ne kulpas!” li veis, paŝante malantaŭen en la direkton de la pordo.

“Hu—ja-a—bu—hu-u! Estera—bu-u—jah—Judi—ho-o-o! ho-ho-oh!” Kiel ja estus atendeble, lia patro estis preninta rimemon kiu kuŝis en oportuna proksimeco kaj vigle utiligis ĝin sur sian filon.

“Ho-o-o! ho-o-o! h-oo! ha-a-a! ne estis mi—mi ne kulpas—estas Pip kaj Judi—ho-o-hu-u! la spektaklo! bu-hu! ha-ah—vi mortigas min! hu-bu mi nur f-faris—ho-hu-u-ha! f-

faris por p-plaĉi—bu-u-u! por p-plaĉi al vi!”

La patro paŭzis kun levita rimeno. “Do tio klarigas kial ĉiuj la aliaj tiel strange kondutas, ĉu? Nur por ke mi konduku ilin al la spektaklo, ĉu?”

Bunty torde sin liberigis. “Bu-hu—jes! sed ne mi—mi ne—mi neniam—verdire—ho-o-o-jah! ne estis mia kulpo, kulpas ĉiuj la aliaj—bu-hu-ha! donu la ceteran batadon al la aliaj.”

Li ricevis ankoraŭ tri akrajn regalojn kaj poste fuĝis veante kaj kriegante en la infanejon, kie li falis sur la plankon kaj baraktis kaj sin rulis kvazaŭ li estus duone mortigita.

“Rampuloj!” li singultis, alparolante la aliajn kiuj alkuris el diversaj lokoj pro lia brua kriado, “mizeraj p-p-porkoj! Mi-mi-h-h-havis ne-neniom da ko-ko-kokid-a-aĵo kaj ri-ricevis la tu-tu-tuton de la b-b-batado! r-r-rampuloj! h-h-ho! ha-a-a! ho-o! m-mi s-s-sangas ĉ-ĉie, m-mi s-scias!”

Ili ne povis ne ridi iom; Bunty ĉiam estis tiel nerezisteble komika kiam li vundiĝis, eĉ iomete; ili tamen konsolis lin kiom ili povis kaj penis ekscii kio okazis.

Estera baldaŭ envenis, aspektante tre ĝenata.

“Nu?” ili diris ĥore.

“Vi vere estas la plej kolerigaj infanoj,” ŝi diris mal-kontente.

“Sed la spektaklo—rapide, Estera—ĉu vi petis al li?” ili demandis senpacience.

“La spektaklo! Li diras ke li prefere pagus al S-ro Rignold ne prezenti ĝin ol permesi ke eĉ unu el vi ekvidu ĝin—kaj tion vi ja meritas! Meg, pro la ĉielo, donu al Bebinjo sekan vestaron—nur rigardu ŝin; kaj, Judi, se vi havas por mi ian korsenton, ŝanĝu tiun robon. Bunty, vi malbonulo, mi alvokos vian patron se vi ne ĉesigos tiun bruon. Nell, forprenu la

tondilon de la Generalo aŭ li forigos siajn okulojn, Dio lin benu.”

La juna vicpatrino sin klinis malantaŭen en sia seĝo kaj ĉirkaŭrigardis tragedie. Ŝi neniam vidis sian edzon tiel kolerega kaj ŝiaj belaj lipoj tremis kiam ŝi rememoris ke li ŝajnis kulpigi ŝin pri ĉio.

Meg ankoraŭ ne moviĝis; la akvo malrapide gutadis el la vestoj de Bebinjo kaj faris flakon sur la planko, Bunty ankoraŭ spasme veis, Judi fajfadis spite, kaj la Generalo, senigita de la tondilo, ĉirkaŭlekadis sian kotan ŝuon per sia kara ruĝa langeto.

Singulto leviĝis en ŝia gorĝo, du larmoj plenigis ŝiajn okulojn kaj kuris laŭ ŝiaj glataj, belaj vangoj.

“Sep vi estas, kaj mi havas nur dudek jarojn!” ŝi diris patose. “Ho! estas troe—ho ve! estas ja troe.”

<<<<<>>>>

## Ĉapitro IV

### La Generalo Militiras

Estis la tago sekvanta “la eventojn rakontitajn en la antaŭa ĉapitro,” kiel oni diras en rakontlibroj. Kaj Judi, kun kolera rigardo en la okuloj, sidis sur la infaneja tablo, la genuoj tuŝantaj la mentonon kaj la maldikaj brunaj manoj ĉirkaŭpremantaj ilin.

“Estas maljustaĵo,” ŝi diris, “estas brulanta, fia maljustaĵo! Kian utilon en la mondo havas la patroj? Tion mi volus scii!”

“Ho, Judi!” diris Meg, kiu sin kurbigis en fotelon, profunde absorbita per libro. Sed ŝi diris tion mekanike kaj pro devo, estante tri jarojn pli aĝa ol Judi.

“Pensu pri la vivoĝuoj kiujn ni povus havi se nur li ne loĝus ĉe ni,” daŭrigis Judi, trankvile malatentante ŝin. “Nu, ni manĝus kokidaĵon tri fojojn ĉiutage kaj vizitadus la spektaklon sep vesperojn en semajno.”

Nell sugestis ke ne estas kutime havi spektaklo-prezentadon en la sepa tago, sed Judi persistis.

“Mi havus specon de religia spektaklo,” ŝi diris penseme— “kun belaj bildoj kaj informoj pri la Sankta Lando kaj la plej rava muziko, kaj belaj infanoj blanke vestitaj kantantaj himnojn, kaj helaj koloroj ĉie, kaj neniuj monkollektaj teleroj por forpreni vian lastan tripencan moneron—ho kaj kompreneble ne estus predikoj nek litanioj.”

“Ho, Judi!” murmuris Meg, turnante paĝon.

Judi disigis siajn manojn kaj tuj kunigis ilin pli firme ol antaŭe.

“Tuto da ses biletoj perditaj—tridek belaj ŝilingoj—simple ĉar ni havas patron!”

“Li sendis ilin al la familio Digby-Smith, Bunty informis, “kaj skribis sur la koverton, ‘Kun salutoj—J.C. Woolcot.’”

Judi ĝemis. “Ses aĉaj malgrandaj Digby-Smith-oj sidantaj en la teatro rigardantaj nian amuzaĵon per siaj ses aĉaj okuletoj,” ŝi diris amare.

Bunty, kiu estis matematikema, demandis kial ili ne povus ĝin rigardi per siaj dek du aĉaj okuletoj, kaj Judi ridis kaj deiris de la tablo esprimante pekan deziron ke la malgrandaj Digby-Smith-oj ĉiuj transfalu la balustradon de la balkono antaŭ la leviĝo de la kurteno. Meg fermis sian libron kun hasta frapsono.

“Ĉu Pip jam iris? Patro tre koleros. Ho ve, kiel distriĝema mi estas!” ŝi diris. “Kie estas Estera?”

“Mia kara Meg!” Judi diris; “estas jam pli ol du horoj de kiam Estera laŭiris la kaleŝvojon ĝuste antaŭ via nazo. Ŝi foriris al Waverly—ŝi ja envenis kaj informis vin kaj diris, ke ŝi konfidis al vi prizorgi la jakon kaj vi diris, ‘Mm! nu bone.’”

Meg, kun konsternita rigardo, penis rememori. “Ĉu mi devas purigi ĝin?” ŝi demandis per tima voĉtono, ŝovante la blondajn harojn for de la frunto. “Ho, knabinoj! Kion mi devis fari?”

“Purigu per benzino, gladu dum malseka, metu en malvarman lokon por teni varma, kaj baku ĝis bruna,” diris Judi senhezite. “Vi nepre aŭdis, Margareta? Estera tiel zorge klarigis.

Denove Meg malordigis siajn harojn malespere.

“Kion mi faru?” ŝi diris, efektivaj larmoj saltantaj en la

okulojn. “Kion patro diros” Ho, Judi, kial vi ne memorigis min?”

Nell glitigis brakon ĉirkaŭ ŝian kolon. “Ŝi nur turmentetas vin, Menjo; Estera ĝin faris kaj lasis ĝin preta en la vestiblo—vi devas nur transdoni ĝin al Pip. Patriĉjo devas veturigi la kariolon en la urbegon hodiaŭ posttagmeze por riparigi la benkon kaj Pip kuniros ankaŭ, jen ĉio, kaj oni ĝuste jungas la ĉevalon; vi ne malfruas.”

Temis pri la jako kiun Bunty preskaŭ ruinigis. Ĝi apartenis, kiel mi jam diris, al la solena uniformo de la Kapitano, kaj estis bezonata por bankedo ĉe la Kazerno tiuvespere. Kaj Estera ĝin spongadis kaj purigadis dum la tuta mateno kaj estis lasinta instrukcion ke oni ĝin transportu en la Kazernon posttagmeze.

Post nelonge la kariolo impone kaj rapide alvenis ĉe la pordo, veturigata de Pip dum Patriĉjo malkontente rigardis. Ili prenis la pakajon enhavantan la jakon kaj zorge metis ĝin sub la benkon, kaj estis pretaj denove ekiri kiam Judi elvenis sur la verandon, tenante la Generalon en malkomforta pozicio en siaj brakoj.

“Vi venu ankaŭ, Ŝaŭm’, estas multe da spaco—nenio malhelpas,” Pip diris subite.

“Hooo!” diris Judi, la okuloj brilegantaj. Ŝi faris rapidan paŝon antaŭen kaj levis piedon por eniri.

“Ho, verdire!” protestis Pip, “vi devos ion surmeti super tiu robo, injo—ĝi plurloke surhavas konfitaĵon kaj tiel plu.”

Judi sin pafis en la vestiblon kaj revenis kun sia pluvmantelo; ŝi momente metis la Generalon sur la plankon dum ŝi surmetis ĝin, poste ŝi levis kaj transdonis lin supren al Pip.

“Li devos veni ankaŭ,” ŝi diris; “mi promesis al Estera ke



mi ne lasos lin ekster mia vido dum eĉ minuto; ŝi fariĝas tute nervoza pri li lastatampe—opinias ke li rompiĝos.”

Pip grumblis dum unu-du minutoj, sed la Generalo donis gargaran, ĉarman ridon kaj etendis la brakojn, do li levis kaj tenis lin dum Judi engrimpis.

“Ni povos reveni trame ĝis la Kajo, kaj de tie trafi boaton revene,” ŝi diris, premante la bebon sur la benkon inter ili. “La Generalo amas suriri la akvon.”

For ili rapidis; laŭ la neglektita kaleŝvojo, tra la pordegoj kaj foren laŭ la vojo. Pip, Judi la brilokula, la Generalo manĝeganta sian dikfingron kaj Patriĉjo denove ridetvizaĝa ĉar li denove tenis la kondukrimenojn.

Vento de sur la rivero blovis tra bosko de eŭkaliptaj arboj sur la publika tereno kaj saltigis la junan ruĝan sangon en iliaj vejnoj; ĝi turmentadis la buklojn de Judi kaj kolorigis ŝiajn brunajn vangojn varmrufe; ĝi igis la Generalon ŝovadi la kruojn kaj ridi kaj fariĝi moviĝema kaj kaŭzis al Pip ŝovi la ĉapelon malantaŭen sur la kapo kaj fajfi ĝoje.

Tiel oni kondukis ĝis ili atingis la urbon kie necesis iom cedi al la postuloj de konveneco.

Survoje al Paddington sinjoro rajdanta ĉevalon iom moderigis la rapidecon de sia irado. Pip svinge demetis la ĉapelon kaj Judi ridetis sincere kaj plezure, ĉar estis iu maljuna Kolonelo kiun ili konis jam de multaj jaroj, kaj kies bonhumoron kaj donacemon ili havis kaŭzon memori.

“Nu, mia fraŭlineto—Nu, Filipino, knabo,” li diris ridetante afable dum lia ĉevalo ĉirkaŭprancis la kariolon—”kaj la Generalo ankaŭ—kien vi ĉiuj iras?”

“Al la Kazerno—mi ion portas al la patro,” Pip respondis. Judi rigardis la baŭmantan ĉevalon per admiraj okuloj. “Kaj poste ni reiros hejmen.”

La maljuna sinjoro sukcesis, malgraŭ la petolado de la ĉevalo, glitigi sian manon en sian poŝon.

“Jen io per kio malsanigi vin survoje,” li diris, enmanigante al ili du duonkronojn; “sed ne sendu al mi la kalkulon de la kuracisto.”

Li frapetis vangon de la Generalo per sia vipo, kapsalutis al Judi, kaj galopetis for.

La infanoj rigardis unu la alian per briletantaj okuloj.

“Kokusojn,” Pip diris, “kaj tortojn kaj buterkaramelojn kaj ŝpari la restaĵon por aĉeti piedpilkon?” Judi skuis la kapon.

“Kion pri mi?” ŝi diris. “Vi tenus la piedpilkon ĉe la lernejo. Mi voĉdonos por rozkoloraj jujuboj, kaj glaciaĵoj kaj vaksa pupo.”

“Vaksa avino!” rebatis Pip; “Espereble vi ne estus tia knabino.” Tiam li aldonis kun preskaŭ pia fervoro, “Dankindas ke vi ĉiam malamamis pupojn, Ŝaŭm.”

Judi subite saltis sur sia sidejo, preskaŭ faligante la Generalon, kaj venigante sur sin aron da riproĉoj de la koĉero. “Mi scias!” ŝi diris; “kaj ni jam duone atingis la lokon. Hooo! estos ja belege.”

Pip urĝe petis ŝin klarigi.

“La Akvario ĉe Bondi—rulŝuoj, boatoj, karuselo, ondanta fervojo po tri pencoj!” ŝi respondis koncize.

“Bona ideo,” Pip fajfis mallaŭte dum li mense esploris la proponon. “Estus restaĵo ankaŭ, per kiu aĉeti iom da mangĉaĵo kaj eble iom por la piedpilko ankaŭ.” Tiam lia frunto malheliĝis.

“Kion pri la bubeto—kial vi stultule kuntrenis lin? Kiel knabinece, ĉion ruinigi!”

Judi perplekse aspektis. “Mi tute forgesis lin,” ŝi diris malkontente. “Ĉu ni ne povus lasi lin ie? Ĉu ni ne povus peti

ke iu prizorgu lin dum ni iros? Ho, estus tro malbone devi rezigni pri la afero simple pro li. Ekpluvas ankaŭ; ni ne povus kunpreni lin.

Ili jam estis ĉe la malsupro de Kazerna Monteto kaj Patriĉjo informis ilin ke ili devos deĝi kaj piediri la ceteron de la vojo aŭ mankos tempo por riparigi la kariolon ĝustatempe por revenigi ĝin tiuvespere.

Pip eliĝis kaj prenis la Generalon en kunvolvita bulo kaj Judi dekarioliĝis singarde post li, la nepre protektota jakopakaĵo en siaj brakoj. Kaj tute senvorte ili supreniris la asfaltan deklivon ĝis la pordego kondukanta al la oficiraj loĝejoj.

“Nu?” Pip diris plendeme, “Rapidu; ĉu vi ankoraŭ nenion elpensis?”

Tiu kuntirado de la brovoj kaj faltigo de la lipoj ĉe lia fratino ĉiam signifis profundan kaj komplikan kalkuladon, kiel li bone sciis.

“Jes,” Judi diris kviete. “Mi havas planon kiu taŭgos, mi kredas.” Post tio subita fajreco eniris ŝian sintenon.

“Kiu estas la patro de la Generalo? diru al mi tion,” ŝi diris per rapida, verva maniero; “kaj ĉu ne estus juste kaj konvene ke la patroj prizorgu siajn filojn? kaj ĉu li ne meritas ke ni reguligu la konton inter ni pro tio ke li senigis nin de la spektaklo? kaj ĉu la Akvario ne estas tro bela por rezigni?”

“Nu?” Pip diris; lia malpli rapida cerbo ne sekvis tiun rapidan rezonadon.

“Nur estas ke mi lasos la Generalon ĉi tie, ĉe la Kazerno dum du da horoj ĝis ni revenos, ĉar memevidente lia patro estas la ĝusta persono lin gardi.” Judi prenis la dikan maneton de la Generalo en decidema maniero, kaj malfermis la pordegon.

“Ho, verdire,” rimarkis Pip, “ni trafos en teruran tumulton, vi scias, Ŝaŭm’. Mi pensas pli bone ke ni ne faru—efektive, inĵo.”

“Neniom,” diris Judi kuraĝe—“almenaŭ nur iom, kaj la Akvario valoras tion. Rigardu kiel pluvos; la infano ricevos krupon aŭ reŭmatismen, aŭ ion alian se ni kunprenos lin; jen estas patro staranta sur la gazono apud la tenisludejo kaj parolanta al viro. Mi kviete laŭiros la verandon kaj eniros lian propran ĉambron kaj metos la jakon kaj la Generalon sur la liton; poste mi petos al soldato iri kaj informi patron ke liaj pakajoj alvenis, kaj dum li estos for mi fulme rapidos revene al vi, kaj ni trafos la tramon kaj iros al la Akvario.”

Pip denove fajfis mallaŭte. Li kutimis al aŭdacaj proponoj de ĉi tiu fratino lia, sed la nuna superis ĉion. “S-sed,” li diris maltrankvile, “sed, Judi, kion li farus kun tiu bubo dum du longegaj horoj?”

“Gardus lin,” Judi tuj replikis. “Bela afero estas se patro ne povas gardi la propran infanon dum du horoj. Poste, vi komprenu, kiam ni jam vizitis la Akvarion, ni revenos kaj kolektos lin, kaj ni povos klarigi al patro ke pluvos kaj ni pensis pli bone ne preni lin kun ni pro timo de reŭmatismo, kaj ke urĝis trafi tramon, kaj ĉar li ne estis en sia ĉambro ni simple metis lin sur la liton ĝis li venos. Efektive, Pip, la afero estas bele simpla!”

Pip ankoraŭ aspektis embarasita. “Ĝi ne plaĉas al mi, Ŝaŭm’,” li diris denove; “li estos terure kolera.”

Judi rigardis lin senpacience. “Iru kontroli ĉu tiu bruoj signifas ke la tramo por Bondi venas,” ŝi diris; kaj dankema pro momenta prokrasto li iris laŭ la pado denove ĝis la trotuaro kaj rigardis malsupren la monteton. Kiam li sin turnis denove ŝi jam estis foririnta.

Li ŝovis la manojn en siajn poŝojn kaj promenis tien kaj reen kelkfoje, laŭ la pado.

“Ŝaŭm’ finfine igos nin pendumi,” li murmuris, malhele rigardante la pordon en la muro tra kiu ŝi ĵus malaperis.

Li ŝovis sian ĉapelon malantaŭen kaj malgaje fiksrigardis siajn botojn, cerbumante pri la sekvoj de ĉi nova petolaĵo. Malpeza paŝo aŭdiĝis apud li.

“Ni iru,” diris Judi, tirante lian manikon; “estas jam farite nun, do ni iru nin amuzi; ĉu vi tenas la monon sekure?”

Estis la dua horo kiam ili eliris la pordegon kaj direktis sian rigardon supren laŭ la deklivo ĝis la haltejo. Kaj estis la kvara kaj duono kiam ili elsaltis urbonirantan tramon por kolekti sian konfidaton.

Kiam posttagmezon ili havis! Tuj kiam ili jam troviĝis interne de la Akvario eĉ Pip flankenmetis siajn skrupulojn kaj sin plene dediĉis al amuziĝo. Kaj Judi kvazaŭ estis frenezulineto. Ŝi elspezis ŝilingon de sia mono por la ondanta fervojo, nomante la rapidan, konsternan moviĝon “ĉieleca”. La unua veturo sentigis vomemon al Pip, do li evitis ripeti la provon kaj kun sento preskaŭ de sufokiĝo pro timo rigardis dum Judi de tempo al tempo ekiris, gaje mansvingante de la riskoplana ĉareto. Poste ili ambaŭ luis paron da rulŝuoj kaj kontuziĝis nigre kaj blue pro pezaj faloj sur la asfalto. Post tio ili rajdis sur la karuselo, sed Judi trovis tion seninteresa kompare kun la ondanta fervojo kaj rifuzis fordoni duan tripcon por ĝi, sin kontentigante rigardi dum Pip ĉirkaŭrapidis kaj kuregi ĉe lia flanko tiel longe kiel ŝi povis samrapide iri. Ili finis la viziton per longa inspektado de la fiŝujo, manĝeto el dubefreŝaj konfitaĵaj tortoj kaj arakidoj je valoro de du pencoj. Kaj, kiel mi jam diris, estis la kvara duono kiam ili suprenrapidis la padon denove ĝis la supra pordego de

la Kazerno.

“Mi esperas ke li bone kondukis,” Judi diris dum ŝi turnis la anson. “Jes, vi venu ankaŭ, Pip,” ĉar tiu juna sinjoro dum unu angora sekundo malemis pluiri. “Dudek piedfrapoj aŭ batoj dividitaj per du faras nur dek, vi komprenu.”

Ili laŭiris la longan, ŝtonan verandon kaj haltis ĉe unu pordo.

Areto da junaj oficiroj ridis kaj babilis apude.

“Kredu al mi, estis same amuze kiel teatraĵo, vidi Woolĉjon ekpreni sian etulon kaj ŝovi ĝin en fiakron kaj mem eniri, ĉion kun peza aspekto de vundita digno,” unu diris, kaj ridis pro la rememoro.

Alia forblovis nubon el cigara fumo. “Ĝi estis ĉarma kanajleto,” li diris. “Ĝi pugnigis la manetojn kaj trafis Lian Altan Moŝtecon ĝuste en la okulo; kaj poste ĝia ŝuo forfalis kaj ni ĉiuj kuris por ĝin levi, kaj ĝi estis kota kaj entute malbonstata, kaj Woolĉjo malrapide ruĝiĝis ĝis la pintoj dum li penis remeti ĝin.”

Malgranda figuro paŝis en la mezon de la grupo—malgranda figuro kun ridinde mallonga kaj eluzita pluvmantelo, maldikaj, nigreŝtrumpetitaj kruroj, kaj granda ĉapelo premita sur malordajn buklojn.

“Tiu, pri kiu vi parolas estas mia patro,” ŝi diris, la kapo alte tenita, la voĉtono aroganta, “kaj mi ne scias kion vi trovas amuza. Ĉu mia patro estas ĉi tie, aŭ ĉu mi aŭdis vin diri ke li foriris?”

Du el la viroj aspektis embarasitaj, la tria demetis la kaskedon.

“Mi bedaŭras ke vi hazarde aŭdis nin, Fino Woolcot,” li diris afable. “Tamen, oni ne faris nebonigeblan malutilon, ĉu? Jes, via patro foriris en fiakro. Li tute ne sciis kiel la knabeto

alvenis sur lian liton kaj, ĉar li ne bone povus teni lin ĉi tie, mi supozas ke li kondukis lin hejmen.”

Io simila al honta rigardo venis en la helajn okulojn de Judi.

“Mi timas ke mi verŝajne kaŭzis iom da ĝeno al mia patro,” ŝi diris kviete. “Estis mi kiu lasis la Gen mian fraton ĉi tie ĉar mi ne sciis al kiu konfidi lin dum unu-du horoj. Sed mi ja intencis mem konduki lin hejmen. Ĉu li jam de longe estas for?”

“Proksimume duonhoron,” la oficiro diris kaj penis ne aspekti amuzita pri la solena maniero de la knabineto.

“Ha, dankon. Eble ni sukcesos atingi lin. Venu, Pip,” kaj kapsalutante en serioza, formala maniero ŝi sin turnis kaj iris laŭ la verando kaj tra la pordego kun sia frato.

“Ni trafis en belan kaĉon,” li diris.

Judi kapjesis.

“Tio estas verŝajne la plej terura faro de nia tuta vivo. Prezentu al vi ke patro portaĉas tiun infanon la tutan distancon de ĉi tie. Mia di!”

Judi kapjesis denove.

“Ĉu vi ne kapablas paroli?” li diris incitite. “Vi kondukis nin en ĉi tion—mi ne volis ĝin fari; mi tamen akceptos kun vi la sekvojn, kompreneble. Sed vi devos rapide elpensi senkulpigon.”

Judi formordis tri fingropintojn de sia dekstra ganto kaj melankolie aspektis.

“Estas absolute nenio farebla, Pip,” ŝi diris malrapide. “Mi tute ne pensis ke la afero finiĝos tiele. Mi supozas ke ni simple devos tuj reiri kaj nin prezenti por puno. Li estos tro kolera aŭskulti ian ajn senkulpigon, do plej bone ke ni nur submetiĝu kuraĝe al tio, kion li faros al ni. Mi ankaŭ vere bedaŭras ke mi

faris lin ridindulo tie supre.”

Pip estis eksplodema. Li nomis ŝin azeneto kaj kreteno kaj stulta idioto por fari ion tian, kaj eĉ ne unufoje ŝi riproĉis lin aŭ rebatis.

Ili trafis tramon kaj iris en Sidnejon kaj poste al la boato. Ili trovis oportunan sidlokon en angulo ĉe la malantaŭo, kaj diskutis la situacion kun granda seriozo. Post tio Pip stariĝis kaj iom promenis por malŝarĝi siajn emociojn, preskaŭ tuj revenante kun blanka, simpla vizaĝo.

“Li estas sur la boato,” li flustris, terurite.

“Kie—kie—kie? kio—kio—kio?” Judi kriis, neintence mimikante longe mortintan monarĥon.

“En la kajuto, aspektante malgaja kiel boligita valabio, kaj tenegante la kompatindan Generaleton kvazaŭ li pensus ke tiu forflugus.”

Judi por la unua fojo aspektis iom tima.

“Ĉu ni ne povas nin kaŝi? Ne lasu ke li vidu nin. Jam ne helpus nin proponi por prizorgi la Generalon, ni estas preter savo nun, Pip—estos nenia indulgo.”

Pip ĝemis; Judi tiam ekstaris.

“Ni ŝteliru ĝis la motoro,” ŝi diris, “kaj kontrolu ĉu li tre malbone aspektas.”

Ili tre singarde laŭiris la ferdekon kaj okupis lokon kie ili povis vidi sen danĝero ke oni ilin vidu. La kara malgranda Generalo sidis sur la sidejo apud sia severa patro, kiu firme tenis de malantaŭe lian lanan surtuton. Li suĉadis la malpuran maneton kaj de tempo al tempo sopire rigardis al sia tankolora ŝuo, kiu, li sciis laŭsperte, estis ĝue mordinda. Unu-du-foje li fortiris ĝin kaj portis al sia buŝo, sed lia patro intervenis kaj kolere butonumis ĝin denove sur ĝia ĝusta loko. Li ankaŭ deziris forgliti de la abomena sidejo kaj tute trarampi la



ferdekon, kaj esplori la terenon sub la sidejoj kaj ekscii de kie venas la sonoj de pulsado; sed restis tiu fera tenado de lia mantelo kiun eĉ la plej daŭra sintordado ne povis forigi. Ne mirinde ke la kompatinda infano aspektis malfeliĉa.

Finfine la boato haltis ĉe kajo ne malproksime de Misrego kaj la Kapitano eliĝis, singarde portante sian malpuran fileton en siaj brakoj. Li marŝis malrapide supren la ruĝan vojon laŭ kiu la kariolo estis tiel senĝene rapidinta antaŭ ses-sep horoj, kaj Judi kaj Pip sekvis en konvena—tre konvena malproksimeco. Ĉe la pordego li vidis ilin kaj gestis larĝe, kolere, ke ili alproksimiĝu. Judi paliĝis, sed tuj obeis, kaj Pip, sin regante, postsekvis.

Poste Judi nur tre malklare memoris la eventojn de la sekvanta duonhoro. Ŝi sciis ke estis ŝtorma sceno, en kiu Estera kaj la tuta familio ricevis gigantan vortdraŝadon.

Post tio Pip ricevis bastonadon, malgraŭ la insistado de Judi ke ŝi sola kulpas, kaj ke Pip nenion riproĉindan faris. Ŝi rememoris ke ŝi estis sin demandinta ĉu ŝi ricevos la saman traktadon kiel Pip, tiel kolera estis la vizaĝo de ŝia patro dum li flankenŝovis la knabon kaj staris ŝin rigardante, rajdvipo en la mano.

Sed li ĵetis ĝin surteren kaj metis pezan manon sur ŝian forcedantan ŝultron.

“Venontan lundon,” li diris malrapide—“venontan lundon matene vi iros al pensiona lernejo. Estera, bonvolu kontroli ke la vestoj de Helena estu pretaj por pensiona lernejo—la venontan lundon matene.”

<<<<<>>>>>

## Ĉapitro V “Venontan London Matene”

Kofro staris en la vestiblo, kaj granda, multe vojaĝinta valizo, kaj sur ili estis etikedoj kiuj informis: “Fino Helena Woolcot, La Fraŭlinoj Burton, Monto Viktoria.”

En la infanejo oni—jen kaj jen—matenmanĝis. La bluaj okuloj de Meg estis tute ruĝaj kaj ŝvelaj de plorado kaj ŝi ankoraŭ snufis aŭdeble dum ŝi elverŝis la kafon. Pip havis siajn manojn en la poŝoj kaj staris sur la antaŭfajreja tapiŝeto, malgaje rigardante iun apartan teleron kaj tute rifuzante matenmanĝi; la Generalo ĝoje kunklakis sian propran tason kaj teleron; kaj Bunty manĝis buterpanojn en flegma silento.

Judi, blankvizaĝa kaj sekokula, sidis ĉe la tablo, kaj Nell kaj Bebinjo sin kroĉis unu al ĉiu brako. Dum ĉiuj tri tagoj inter tiu fatala jaŭdo kaj ĉi tiu morna mateno ŝi estis obstine malkonsterna. Ŝi neniam ŝajnis pli gaja, ŝiaj okuloj pli brilaj, ŝia lango pli pika, ol dum tiu kelktaga intertempo; kaj ŝi ŝajnis al ĉiu, kaj antaŭ ĉio al sia patro, ke ŝi opinias ke pensiona lernejo nepre devas esti tre amuza, kaj ke ŝi multege ĝuos tion.

Sed hodiaŭ matene ŝi estis tute kolapsinta. La tutan tempon antaŭe ŝia impulsema, infana koro diradis al ŝi ke ŝia patro vere ne povus esti tiel kruela, kaj ke li vere ne intencas forsendi ŝin inter fremdulojn, malproksime de kara, malorda Misrego kaj ĉiuj ŝiaj gefratoj; ke li nur diras tion por timigi ŝin, tiel ŝi diradas al si, kaj ŝi montros al li ke ŝi ne estas malfort-

anima bebo.

Sed dimanĉon vespere, kiam ŝi vidis portata malsupren ĝis la teretaĝo kofron kiun oni plenigis per ŝiaj posedaĵoj kaj etikedis kun ŝia nomo, ŝajnis kvazaŭ malvarma mano sin fermus ĉirkaŭ ŝian koron. Tamen, ŝi diris al si, li nur faras ĉion ĉi tion por ŝajnigi ĝin pli reala.

Sed jam estis matene, kaj ŝi ne plu povus malkredi. Estera estis veninta al ŝia litrando kaj kisinta ŝin malgaje, ŝia bela vizaĝo ĉagrena kaj tenera. Ŝi estis peteginta kiel neniam antaŭe pri nuligo de la kondamno de kompatinda Judi, sed la Kapitano estis neŝancelebla. Estis ŝi kaj ŝi sola kiu ĉiam misgvidas en ĉio; la aliaj bone kondukis se ŝi ne estus tie por inciti ilin al petolaĵoj, do ŝi foriru. Cetere, li diris, ŝi multe profitus per tio. Li elektis por ŝi bonegan lernejon; la sinjorinoj kiuj estras ĝin estas bonkoraj sed tre firmaj, kaj Judi ruiniĝas pro manko de firma mano. Tio, ja, estis certgrade vera.

Juidi sidis rektadorse en sia lito je la vido de la malgaja vizaĝo de Estera.

“Nenio fareblas, kara; estas nenia elirejo,” tiu diris delikate. “Sed vi iros kiel kuraĝulino, ĉu ne, Ju-Ju? Vi ĉiam estis la tipo kiu mortas kuraĝe, kiel diras Pip.”

Judi glutegis grandan bulon en sia gorĝo, kaj ŝia kompatinda vizaĝeto iĝis pala kaj streĉita.

“Ne maltrankviliĝu, Estenjo. Nu, do, vi iru malsupren al matenmanĝo,” ŝi diris per voĉo kiu tremis nur iomete, “kaj bonvolu lasi ĉe mi la Generalon, Estera; mi malsuprenigos lin kun mi.”

Estera metis sian dikan fileton sur la kapkusenon, kaj kun sola, ama rigardo malantaŭen, eliris la pordon.

Kaj Judi tiris la knabeton malsupren en siajn brakojn, kaj tute kovris iliajn du kapojn per la litkovriloj kaj tenis lin per

feroca, preskaŭ malespera brakumo dum unu-du minutoj, kaj kaŝis sian vizaĝon en lia mola, kaveta kolo, kaj kisis ĝin ĝis ŝiaj lipoj doloris.

Li batalis kuraĝe kontraŭ ĉi tiu ĝena agado, kaj fine protestis per kolera kriego, kontraŭ sufokado. Do, ŝi flankenŝovis la litkovrilojn kaj ellitiĝis, lasante al li tuneli inter la kapkusenoj kaj eltiri plumojn el truo en unu el ili.

Ŝi sin vestis en rapida, nerva maniero, aranĝis la harojn pli zorge ol kutime, kaj poste levis la Generalon kaj portis lin laŭ la koridoro en la infanejon. Ĉiuj la aliaj jam estis tie, kaj, kun Estera, evidente ŝin diskutas. La tri knabinoj larme kaj proteste aspektis; oni ĵus admonis Pip pro malrespekta parolo pri la patro kaj li aspektis malafabla; kaj Bunty, ne sciante kion alian fari en tia krizo, ekkaptis muŝojn kaj malicege fortiris iliajn flugilojn.

Estis malgajega manĝo. La sonorilo sonis por la teretaĝa matenmanĝo kaj Estera devis foriri. Ĉiu proponis al Judi ĉion sur la tablo kaj parolis al ŝi milde kaj ĝentile. Ŝi ŝajnis esti apartigita de ili, persono kiun oni ne traktas facillanime en la digno de la nuna granda malbonsorto. Ŝia robo, ankaŭ, estis tute nova—neta blua serĝaĵo ĵus ricevita el la manoj de la kudristino; ŝiaj botoj estis ciritaj kaj brilaj, ĉe ŝiaj ŝtrumpoj mankis ventolaj fendoj. Ĉio ĉi kune faris el Judi iun tute malsimilan al la petolulino de antaŭ kelkaj tagoj, kiu venadis al matenmanĝo aspektanta kiel se oni forkĵetis sur ŝin la vestaron.

Bebinjo sin dediĉis al sia kaĉo dum unu minuto, sed en la sekvanta ŝiaj emocioj superfortis ŝin kaj kun malgranda veo ŝi ĉirkaŭkuregis la tablon al Judi kaj singulte sin kroĉis al ties brako. Tio detruis la ekvilibron de la tuta ĉeestantaro. Nell prenis la alian brakon kaj balancis sin tien kaj reen en atako de

malgajeco. La larmoj de Meg pluvis en ŝian tetason; Pip ŝovis la kalkanumon en la tapiŝeton kaj demandis al si kio estas al siaj okuloj; kaj eĉ la apetito de Bunty por buterpanoj malpliĝis.

Judi sidis tie silenta; ŝi jam forŝovis sian neuzitan teleron kaj sidis ĝin rigardanta kun esprimo de absoluta malespero sur ŝia juna vizaĝo. Ŝi aspektis kiel tragedia reĝino irona al tuja ekzekuto.

Baldaŭ Bunty deiris sian seĝon, kovris sian kafon per subtaso por ŝirmi ĝin kontraŭ muŝoj, kaj solene eliris la ĉambron. Post minuto li revenis kun peklobotelo enhavanta grandegan, verdan ranon.

“Vi rajtas reteni ĝin kiel vian propran, Judi,” li diris per voĉtono preskaŭ senbride malgaja. “Ĝi eble amuzados vin ĉe la lernejo.”

Sinofrado atingis sian kulminon, ĉar tiu rano estis la plej kare amata posedaĵo de Bunty.

Tio stimulis la aliajn; ĉiu portis iun oferaĵon por meti ĉe la sanktejo de Judi kiel memoraĵon. Meg alportis braceleton, plektitan el la haroj de ne plu vivanta amata poneo. Pip donacis sian triklingan poŝtranĉilon, Nell poton da mosko kiun ŝi akvumis kaj vartis jam de unu jaro, Bebinjo rompnazan pupon kiu estis la Benjamino de ŝia multnombra familio.

“Metu ilin en la kofron, Meg—estas spaco supre, mi pensas” Judi diris per sufoka voĉo kaj profunde kortuŝita de tiuj donacoj. “Ho! kaj, Bunty kara! metu korkon super la r-r-rano, mi petas, ĝi eble perdiĝus, la kompatinda! en tiu g-g-granda kesto.”

“Nu bone,” diris Bunty. “Vi bone p-p-prizorgos ĝin, ĉ-ĉu ne, Judi? Ho ve, h-ho-o-o!”

Estera envenis, ankoraŭ ĉagrenaspektita.

“La kariolo estas ekstere,” ŝi diris. “Ĉu vi estas preta, Ju, karega? Kara malgranda Judi! Estu kuraĝa, injeto.”

Sed Judi estis blanka kiel la morto kaj tute senforta. Ŝi lasis ke Estera surmetu ŝian ĉapelon, helpu al ŝi surmeti sian novan jakon, enmanigu al ŝi ŝiajn gantojn. Ŝi submetiĝis al kisoj de la tuta familio, al duonportado malsupren la ŝtuparon fare de Estera, al kisado denova fare de la knabinoj kaj poste de la du bonkoraj servistinoj kiuj, malgraŭ ŝiaj peketoj, havis por ŝi varman lokon en la koro.

Estera kaj Pip levis ŝin en la kariolon, kaj ŝi sidis malgrande, kuntirite, rigardante malsupren al la grupo sur la verando per okuloj kiuj estis absolute tragikaj en sia tuta malespero. Ŝia patro eliris, butonumante sian surtuton kaj vidis la rigardon.

“Kia stulteco!” li diris kolerete. “Estera—granda ĉielo! Ĉu ankaŭ vi kondutas absurde?”—du grandaj larmoj brilis en la belaj okuloj de lia edzino. “Je mia vivo, oni supozus ke mi forkondukas la infanon por pendumigo, aŭ almenaŭ por lasi ŝin en karceron.”

Granda seka singulto eliĝis la blankajn lipojn de Judi.

“Se vi permesos al mi resti, patro, mi neniam plu faros ion por kolerigi vin; kaj vi rajtas vergi min anstataŭe, tute draste.”

Tio estis ŝia lasta klopodo, ŝia fina espero, kaj ŝi mordis sian malfeliĉan tremantan lipon ĝis sangado dum ŝi atendis lian respondon.

“Lasu ŝin resti—ho! bonvolu lasi ŝin resti, kaj ni ĉiam bone kondutos,” ĥore aŭdiĝis de la verando. Kaj, “Permesu al ŝi resti, Johano, mi petas!” Estera alvokis per voĉo same petega kiel kiu ajn el la infanoj.

Sed la Kapitano saltis en la kariolon kaj forŝiris la gvidrimenojn de Patriĉjo en kolerspasmo.

“Mi kredas ke vi ĉiuj estas frenezaj!” li kriis. “Ŝi iras al tute bonega hejmo. Mi jam antaŭpagis kvaronjaron kaj mi certigas al vi bravaj homoj ke mi ne intencas perdi ĝin.”

Li pike tuŝis la ĉevalon per la vipo kaj en la daŭro de minuto la kariolo jam estis forrapidinta tra la pordego kaj la malfeliĉa vizaĝeto perdiĝis el la vido.

<<<<<>>>>

## Ĉapitro Vi

### Kiel Dolĉe Esti Deksesjara!

La haroj de Meg ĉiam estis beletaj, sed dum la pasintaj du monatoj ŝi tonde faris al si franĝon kaj ektorturis ilin en krispigaj paperoj ĉiunokte. Kaj en sia privata tirkesto ŝi tenis konfitaĵan ladskatolon plenigitan per avena faruno, kiun ŝi uzis en la akvo ĉiufoje kiam ŝi sin lavis, ĉar ŝi legis ke ĝi estas mirinda haŭtbeligilo. Kaj nokte ŝi ŝmiris la manojn per vazelino kaj dum dormo portis malnovajn kapreolledajn gantojn. Kaj ŝiaj ŝparitaj moneroj elspeziĝis por aĉeti lentugoforigan kremon por malaperigi tiun disŝuton de varmaj brunaj sunkisoj kiuj iel donis apartan karakteron al ŝia vizaĝo.

Ĉiuj ĉi aferoj estis sekvoj de tio ke ŝi estis deksesjara kaj trovis amikindon deksepjaran.

Aldita MacCarthy lernis la francan lingvon de la sama instruisto kiun Meg nun vizitadis dufoje ĉiusemajne, kaj post interŝanĝo de ĉokoladoj, harrubandoj, kaj familiaj konfidencoj amikeco establiĝis.

Ŝi pruntis al Meg romanojn, numerojn de Suplemento al Familia Heroldo, Magazino de Junaj Sinjorinoj, kaj similaj eldonaĵoj, kaj la junulino entuziasme absorbiĝis en ili, mirigita de la nova mondo en kiun ili portis ŝin; ĉar ĝis nun Charlotte Yonge kaj Louisa Alcott kaj Fino Wetherell konsistigis ŝian simplan kaj sanigan mensan nutraĵon.



Meg komencis tekxi rozkolorajn revojn pri la tempo kiam ŝiaj blondaj, brilantaj haroj kolektiĝos en “simplan nodon ĉe ŝia verto” aŭ “plektitaj en reĝinecan kroneton”, ĉar tiuj estis la stiloj laŭ kiuj la heroinoj en la romanoj senescepte aranĝis siajn harojn. Harplekto trioje dividita estis tre malromantika. Jen la motivo kial, kiel iaspeca kompromiso, ŝi tondis al si franĝon kaj komencis diskrispigi la finaĵon de sia harplektaĵo. Ŝia patro rigardegis ŝin kiam li unuafoje rimarkis ĝin, kaj diris ke ŝi aspektas kiel butika komizino, kaj Estera diris al ŝi ke ŝi estas stulta infano; sed la spegulo kaj Aldita rekuraĝigis ŝin.

La sekvanta paŝo estis kaŝe plilongigi siajn robojn, kiuj estis en la longa-mallonga stadio. En la privateco de sia ĉambro ŝi apartigis la jupon de du-tri el siaj roboj ĉe la zono, enmetis pecon de subŝtofo por plilongigi ĝin, kaj poste aldonis falbalon ĉe la talio de siaj korsaĵoj por kaŝi la kunkudron. Ĉi tio plilongigis la jupejn je almenaŭ du coloj, kaj aspektigis ŝin alta, svelta figuro, kiel ŝi bone konstatis.

Kaj neniu el tiuj aferoj estis tre malutila.

Sed Aldita laŭgrade fariĝis malkontenta pri ŝia talio.

“Vi sendube estas minimume dudektricola, Margarita,” ŝi iam diris en absolute ŝokita maniero.

Ŝi neniam nomis sian amikino Meg, asertante ke tiu nomo estas “tro familieca kaj entute maleleganta.”

Meg rigardis de sia propra talio al tiu sveltega kaj eleganta de sia amikino kaj profunde suspiris.

“Kiom mi devus esti?” ŝi diris mallaŭte; kaj Aldita estis respondinta, “Dek ok—aŭ dek naŭ maksimume, Margarita; veran simetrian gracion oni tute ne povas atingi kun talio dudektricola.”

Aldita ne nur faris asertojn kaj komparojn, ŝi ankaŭ donis al sia amikino praktikajn konsilojn, kaj montris al ŝi kiel oni

faru la aferon. Kaj ĉiunokte kaj ĉiumatene Meg senkompatate tiris al la laĉoj de sia korseto kaj premegis sian belan korpeton en pli mallarĝan spacon. Ŝi jam estis tirinta ĝin en ĉirkaŭmezuron de dudek unu coloj, kio estis neta ŝparo de du, kaj ŝi mallarĝigis ĉiujn siajn robojn ĉe la flankaj kunkudroj.

Sed ŝi rezignis pri la vespera kriketludo, kaj ŝi ne plu partoprenis en rondkura ludo nun, je la malkontentego de la aliaj. Neniu kiu rigardis la florsimilan vizaĝon kaj mildajn, trankvilajn okulojn estus povinta diveni la torturon sentatan sub la nun bela, bonesidanta robkorpo. Marŝi rapide estis vere dolorige; kliniĝi preskaŭ netolereble, sed ŝi ĉion eltenis kun heroismo inda je vere grava celo.

“Kiel longe mi devos daŭrigi tion ĉi, Aldita?” ŝi iam malforte demandis, post franca leciono kiun ŝi apenaŭ povis trasuferi. Kaj la pli aĝa knabino facilanime respondis, “Ho, kompreneble vi ne devas ĉesigi, sed post kelka tempo tio ne plu ĝenos.”

Kun tiu certigo Meg pluiris sian dolorplenan vojon.

Estera, la sola persono kun rajto interveni en la afero, tute ne estis rimarkinta, sed se ŝi tion farus, ŝi ne estus trovinta ĝin maltrankviliga, ĉar estis nur kvar jaroj de kiam ankaŭ ŝi estis deksesjara kaj “talio” estis la plej dezirinda afero sur la tero.

Iufoje ŝi nescie diris—

“Kiel ĉarme via figuro evoluas, Meg; la nova kudristino sendube pli bone sidigas la robojn ol Fino Quinn;” kaj malsaĝa Meg, kun ĝojvibro duobligis siajn klopodojn.

Linkokula Judi estus eltrovinta ŝian sekreton jam de longe, kaj priridinta ŝin ĝis ŝi absolute hontis, sed bedaŭrinde por la bonfarto de Meg, ŝi estis ankoraŭ ĉe la lernejo, ĉar jam tri monatojn ŝi estis for.

Aldita loĝis je proksimume nur dudekminuta marŝado for

de Misrego, do la du knabinoj estis ĉiam kune. Dufoje semajne ili iris en la urbon per la riverboato por lerni kiel demandi per ĝentila franclingvaĵo “Ĉu la juna filino de la panisto havas la flavan ĉapelon, brunajn gantojn, kaj ombrelon de la nevino de la funebraĵisto?” Kaj dufoje semajne, respondinte ne-konsekvence, “Ne, sed la ĥirurgo havis iom da biero, da mustardo kaj la manĝogongon,” Aldita kondukis sian amikinson malrapide tien kaj reen laŭ tiu preferata tereno de la Sidnejaj gejunuloj kaj laŭmoduloj—la Dombloko. “Nur por ekscii kiom da ĉapeloj leviĝos pro mi,” Fraŭlino Aldita diradis kiam ili ekiris; kaj antaŭ la fino Meg sopire diradis, “Kiel ĉielece koni arojn da sinjoroj same kiel vi.”

Iufoje unu el tiuj haltus kaj interŝanĝus kelkajn vortojn kaj tiuokaze Aldita formale prezentis Meg; ofte, tamen, tiu lasta, kiu estis sufiĉe inteligenta malgraŭ sia malsaĝeco, emus supoziti ke ŝi rimarkas superecan, amuzitan sintenon ĉe la sinjoro. Kaj ofte ja estis tiel; plejparte ili estis viroj kun kiuj Aldita konatiĝis ĉe baloj kaj teniso ĉe sia propra hejmo kaj kiuj opiniis tiun junulinon frumatura infano, kiun oni devus teni en klasĉambro dum ankoraŭ kelkaj jaroj.

Iun tagon Aldita alvenis ĉe Misrego plenplena de mistera graveco. “Venu en la ĝardenon, Margarita,” ŝi diris, tute malatentante Bebinjon kiu, kun granda malfacilo, estis persvadinta sian plej aĝan fratinon rakonti al ŝi la eterne ravan legendon pri la tri porketoj.

“Ho ne, je la haroj de mia men-ton-ton-tono, do mi tiregos kaj spiregos kaj enblovos vian domon,” nur dufoje estis dirita, kaj la kulmina parto ankoraŭ ne venis.

Bebinjo rigardis supren per ŝtormaj okuloj.

“Iru for, Aldifa,” ŝi diris.

“Fraŭlino MacCarthy, Bebinjo kara,” Meg sugestis milde,

rimarkante la iom malestimman rideton de Aldita.

“Aldifa”, ripetis Bebinjo obstine. Poste ŝi malseverigis kaj metis karesan braketon ĉirkaŭ la kolon de sia fratino.

“Mi dilos Flaŭlino MacCarfi se vi dilu pli la alia porketo ankaŭ.”

“Ho, forsendu ŝin, Margarita, mi petas,” Aldita diris senpacience, “mi havas ravan sekreton por dividi kun vi, kaj mi baldaŭ devos foriri.”

Meg montris interesiĝon.

“Forkuru, Bebinjo kara,” ŝi diris, kisante la malgajigitan vizaĝeton; “iru ludi la Arkeon de Noa kun Bunty kaj mi finos la porĉojn hodiaŭ vespere aŭ morgaŭ.”

“Sed mi dezilas ilin nun,” Bebinjo insistis.

Meg delikate ŝovis ŝin flanken. “Ne, forkuru, karulineto, forkuru tuj kiel bona knabino kaj mi rakontos al vi pri Ruĝakapoto ankaŭ, morgaŭ.”

Bebinjo rigardis supren al la gasto de sia fratino.

“Vi estas aĉa maljuna polko, Aldifa MacCarfi,” ŝi diris kun substreka malrapido, “Kaj mi folte vin malami kaj ni ĉiuj ĉi tie vin malami, krom Meg; kaj Pip dilas ke vi ’stas la plej ’fekta knabino kie ajn, kaj mi voli ke glanda gigantego veni kaj tilegi kaj spilegi kaj vin blovi en plej mezan palton de malo.”

Aldita ridis agacan, mallongan plenkreskulan ridon kiu kulminigis la koleron de Bebinjo. Tiu elmetis sian maneton kaj donis al la brako de la gastino en ĝia muslina maniko fortan, sciencan pinĉon, laŭ maniero instruita al ŝi de Pip. Post tio ŝi forkuregis tra la longaj kampoj ĝis la malgranda naturejo transe.

“Netolerebla,” Aldita murmuris kolere; kaj bezonataj estis ĉiuj la pardonpetoj kaj kaĵoloj de Meg por dolĉigi ŝian animstaton denove kaj ŝin persvadi komuniki la ravan sekreton.

Fine, tamen, ĝi estis komunikita, kun granda impono. La plej aĝa fratino de Aldita fianĉiniĝis, vere fianĉiniĝis! Ho! ĉu ne estas ĉielece? ĉu ne estas romanece?—kaj al la sinjoro kun la longaj blondaj lipharoj kiu tiel multe vizitadis ilian domon lastatempe.

“Ho mi sciis, ke tio okazos—mi vidis tion okazonta jam de longe. Ho, oni ne tiel facile blindigas min,” Aldita diris. “Mi konas veran amon kiam mi vidas ĝin. Tamen, miaparte mi preferus nigrajn lipharojn, ĉu ne vi, Margarita?”

“Je-es,” diris Meg. Ŝiaj tiutemaj opinioj apenaŭ formiĝis.

“Gagate nigraj kun vaksumitaj finoj, tre rigidaj,” Aldita daŭrigis penseme, “kaj soldatecan sintenon, kaj tre longajn nigrajn okulharojn.”

“Mi ankaŭ,” Meg diris, la imagpovo flamigita, “Simile al Guy Deloraine en La Ambicio de Anĝelina.”

Aldita pli forte ĉirkaŭbrakis sian amikinson.

“Ĉu ne estus ĉielece, Margarita, esti fianĉinoj, vi kaj mi?” ŝi diris per voĉtono de reva raviĝo. “Havi malblondan bel-aspektan viron kun fieraj nigraj okuloj absolute mortanta pro amo al oni, surgenuiĝanta, kaj portanta al oni donacojn, kaj eskortanta onin kaj tiel plu—ho, Margarita, kiel bele pripensinde!”

La okuloj de Meg fariĝis sopiraj. “Ni tamen ankoraŭ ne estas sufiĉe aĝaj,” ŝi diris kun suspiro.

Aldita skuis la kapon. “Tio estas sensencaĵo; ĉar Clara Allison havas nur dek sep jarojn, kaj jen via propra vicpatrino. Multaj knabinoj efektive edziniĝas deksesjaraj, Margarita, kaj viro edziĝproponis al mia fratino Beatrice kiam ŝi havis nur dek kvin jarojn.

Meg aspektis impresite kaj penseme.

Aldita stariĝis por foriri. “Atentu ke vi venu sufiĉe frue por

trafi la boaton morgaŭ,” ŝi diris kiam ili atingis la kradpordon; kaj Margarita, certigu ke vi tre ĉarme aspektos—portu vian cejanan robon—kaj se eble pruntu de Sino Woolcot paron de ŝiaj gantoj, viaj grizaj ja estas iomete fadenmontraj, ĉu ne, kara?”

“H’m” diris Meg, ruĝigante.

“Kaj S-ro Jakobo Graham ĉiam revenas per tiu boato, kaj la du knaboj Courtney—Andreo Courtney diris al Beatrice ke ŝajnas al li ke vi estas ŝatinda ineto; li ofte rimarkas vin, li diras, ĉar vi estas tiel ruĝigema.”

“Tion mi ne povas malhelpi,” Meg diris malfeliĉe. “Aldita, kiel devus aspekti la rubando sur mia ĉapelo? Mi intencas garni ĝin denove.”

“Ho, kvadratecaj bantoj, iom rigidaj, kaj tute ĉeflanke,” la orakolo diris. “Mi ĝojas ke vi intencas tion fari, kara, ĝi aspektis iomete eksmode, ĉu ne?”

Meg ruĝiĝis denove.

“Ĉu vi faris vian franclingvan hejmtaskon?” ŝi diris dum ŝi tire malfermis la kradpordon.

“Iasence,” Aldita diris senzorge. Ŝi altigis la mentonon.

“Tiu mucidaspektaj knabinoj Smith ĉiam zorgegas ke ili ne havu erarojn, kaj Janet Green, kies ĉapeloj ĉiam malantaŭas la modon je kvar sezonoj; mi preferas havi kelkajn erarojn, simple por montri ke mi ne bezonas laboregi por fariĝi instruistino post kiam mi—”

Sed ĝuste tiam ŝi ŝanceliĝis kaj falegis plej maldigne, tute trans la kota pado.

Estis ŝnurpeco kaj la venĝo de Bebinjo.

<<<<<>>>>

## Ĉapitro VII

### Kiel Plaĉus Al Vi Enamiĝi?

Meg malsane aspektis, tio estis ekster dubo. Ŝia bela rozkolora-kaj-blanka vizaĝhaŭto perdadis sian freŝecon, iom incitiĝema esprimo fiksiĝis ĉirkaŭ buŝo kiu antaŭ nur kelkaj monatoj ŝajnis farita nur por ridetoj. Kaj, fakto tre malromantika, ŝia nazo kelkfoje estis absolute ruĝa. Nu, heroino povas havi la plej grandajn, profundajn, kaj plej abunde okulharitajn okulojn imageblajn; ŝi povas havi harojn verdire kiel la oro “falĉita el la mezo de la rikolto”, ŝi povas havi lipojn ĉerizecajn kaj dentojn similajn al veraj perloj, sed ruĝa nazo estas tiel absolute fatala, ke ĉiuj ĉi aliaj ĉarmoj tute ne rimarkiĝos. Ĝi kostis al Meg veran animdoloron. En sia serĉado por kuracilo ŝi atente legis ĉiujn Respondojn al Korespondantoj en la diversaj magazinoj kiujn pruntis al ŝi Aldita, sed ŝajnis ke preskaŭ ĉiu petas recepton por akceli la kreskadon de la okulharoj aŭ malhelpi *embonpoint* (dikiĝon). Eĉ ne unu kiun ŝi hazarde trovis informis, “Ĉe knabino ruĝa nazo plej ofte estas kaŭzita de dispepsio aŭ strikta laĉado”. Ŝi petis al Aldita ion sugesti kaj tiu junulino opiniis ke vazelino kunmiksita kun sulfuro kaj ŝmirita sur la afliktita membro havos la sopiratan efikon. Do ĉiunokte Meg sekurigis la pordon de sia litĉambro per kojnforma lignopeco (ĉar ŝlosiloj estis nekonata luksaĵo ĉe Misrego) kaj sanktoleis sian kompatindan nazeton plej zorge per la graseca miksaĵo, kuŝante surdorse la tutan nokton por malebligi ke ĝi forfrotiĝu

sur la kapkusenon.

Iufoje Pip perfortis al si eniron por postuli kelkajn kudrerojn por sia ŝelko kiu fendiĝis, kaj tio devigis ŝin haste volvi sian tutan vizaĝon en viŝtuko kaj aserti ke ŝi suferas fortan neŭralgion, kaj ke li devos sin turni aŭ al Estera aŭ al unu el la servistinoj. Se li estus vidinta kaj rekoninta la kaŭzon, la turmentado estintus senfina.

lastatempe Meg pasigis multan tempon en la litĉambro kiu estis ekskluzive ŝia dum la foresto de Judi. En ĝia privateco ŝi garnis kaj regarnis siajn ĉapelojn, aliigis siajn robojn, legis romanojn, kaj sidis antaŭ la spegulo kun malligitaj haroj, revante ke ŝi estas tute plenaĝa kaj enamiĝinta. Ĉar ĝuste nun tiu etapo de la vivo ŝajnis, kaj al Aldita kaj al ŝi, la sola tute bela kaj dezirinda. Meg kurbigadis sin en grandan fotelon kiu lokiĝis en ŝia ĉambro ĉar ĝiaj risortoj rompiĝis, kaj revadis longajn, belajn, senesperajn revojn pri amanto kun “longaj nigraj okulharoj kaj soldateca sinteno”. Kompreneble estis tre riproĉinde havi tiajn pensojn je la juna aĝo dek ses, sed mankis al la infano patrino por bremsi tiun erarvagantan fantazion, cetere ŝi estis filino de la Sudo.

Aŭstraliaj knabinoj preskaŭ ĉiam komencas pensi pri “amantoj kaj sensencaĵoj”, kiel maturaj homoj nomas ĝin, longe antaŭ ol tion faras iliaj anglaj fratinoj. Dum ili ankoraŭ troviĝas en la mallongroba etapo de la vivo, kaj dum iliaj haroj ankoraŭ libere fluas, ili ege interesiĝas pri knaboj—knaboj de proksimaj lernejoj, la fratoj de aliaj knabinoj, junaj bankkomizoj, kaj similaj. Ne ĉar tiuj estus bonaj ludkamaradoj, sed ĉar ili konsideras ilin en la rolo de eblaj “amatoj”. Mi ne diras ke anglaj knabininfanoj estas liberaj de tio ĉi; en ĉiu lernejo eble troviĝas unu-du kiuj tiel emas, subridantaj, tro frumaturaj junaj personoj kiuj profitus de



bastonado kaj forsendo ludi kriketon aŭ pupojn denove. Sed en ĉi tiu lando de juneco tio estas kutima pli ofte ol escepta, kaj en tio kuŝas la ĉefa malperfektaĵo de la tre juna Aŭstralianino. Ŝi similas al persiko, bela, glata, suka persiko kiu venis al maturiĝo preskaŭ en unu tago, kaj kiu rapidas forfroti la molan, delikatan lanugon kiu estas ĝia ĉefa allogaĵo, nur por pli klare montri ĝian helan, varman koloron. Aldita, je ŝia senfina kontento, estis forbrosinta sian propran "lanugon", kaj aktuale sin diligente dediĉis al la tasko provi forigi tiun de Meg, kiu estis tre delikata kaj bela antaŭ ol ŝi tuŝis ĝin. La romanoj estis forprenintaj iom, kaj la "Dombloko" ankoraŭ iom, sed Meg estis laŭnature tre freŝanima kaj iom longe daŭris la tasko tion ŝanĝi. Ĝuste nun, sub la direktado de sia amikino, ŝi eklernis pri la ravaj misteroj de amindumado, kaj provizore ĝi tute plenigis ŝian iom sencelan vivon. Sed la tuta afero finiĝis per aventuro kiu, eĉ post la forpaso de multaj jaroj, ankoraŭ dolore varmigis ŝiajn vangojn je la rememoro.

Post la duonsemajna leciono franca, kiel mi jam diris, la du amikinoj kutimis kune reveni per la riverboato je la kvina horo. Kaj per tiu boato ankaŭ venis du knaboj nomitaj Courtney, kaj tria knabo, la speciala propaĵo de Aldita, Jakobo Graham. Nu la gejunuloj konatiĝis dum piknikoj kaj similaj eventoj en la najbaraĵo, sed la konateco, anstataŭ maturiĝi post oftaj renkontiĝoj en sinceran, plaĉan amikecon, ekhavis karakteron de kaŝeco kaj stulta kvazaŭamindumado. Jakobo Graham postenis en la oficejo de advokato, juna profesilernanto deksepjara kiu tro frue volis fariĝi tiu rava estaĵo, viro. Li portis promenbastonon kaj estis tre atenta pri sia ĉapelo kaj kravato kaj siaj botoj kiuj kutime estis tankoloraj. Kaj li portis apenaŭrimarkeblajn lipharojn, kiujn li karesis kun granda ofteco, kaj kiujn Aldita opiniis adorindaj. La koketa,

verva maniero de Aldita plaĉis al li, kaj post tre mallonga tempo ili atingis fazon de transdono, unu al la lia, de leteretoj kaj de sentimentala suspirado. La leteroj tamen ne enhavis multon malutilan, sed ĝenerale estis iom formalaj.

“mia kara fraŭlino Maccarthy,” unu tekstis—”Kial vi ne estis sur la boato hieraŭ? Mi serĉis vin ĝis serĉado ne plu havis sencon, kaj poste la veturo estis nulo. Kiel ĉarme tiu granda ĉapelo konvenas al vi, kaj tiuj jonkviloj ĉe via kolo. Ĉu mi rajtas peti unu el la floroj? nur unu, mi petas, Aldita.

“Via sindona amiko,  
jakobo graham.”

Kaj tiu de Aldita, skribita sur folio el ŝia notlibro per rozkolora dancprograma krajono kiun ŝi ĉiam tenis en sia monujo, verŝajne ne estis pli riproĉinda ol:—

kara sro graham—

“Por kio vi povas deziri tiujn florojn ĉe mia kolo? Ili estis tie la tutan tagon kaj estis mortaj kaj ruinaj. Mi ne povas imagi kian utilon ili povus havi por vi. Tamen, se vi vere deziras ilin, vi ricevos. Mi tre ĝojas ke ĉi tiu ĉapelo plaĉas al vi. Do estonte ankaŭ mi ĉiam ŝatos ĝin. Ĉu vi vere sentis mian foreston hieraŭ? Mi iris esti fotografita. Margarita opinias la rezulton ege bona sed mi estas certa ke ĝi tro flatas min,

“Via fidinde,

l. aldita evalina maccarthy”

Okazis ke S-ro Jakobo Graham havis kiel intiman amikon unu el la menciitaj fratoj Courtney, Andreo laŭnome. Li estis belaspekta junulo dekokjara, ankoraŭ lerneĵano, sed havanta tre ĉarman manieron kaj vere belegan okulparon.

Kaj ĉar lia amiko kaj kunulo Jaĉjo ek“amuziĝis” kun “la knabino MacCarthy”, ne plaĉis al li ne havi okazon simile distri sin. Do li komencis tre atenti pri Meg, kiu ruĝiĝis ĝis sia

delikata beleta harfranĝo ĉiufoje kiam li parolis al ŝi, kaj aspektis dolore memkonscia kaj kulpa se li diris la ŝi ion iel komplimentan.

La alia knabo, Alan Courtney, estis tre altstatura kaj larĝaŝultra kaj tute ne bela. Li havis fortkarakteran nebelan vizaĝon, grizajn, profunde lokitajn okulojn kaj brunajn harojn kiuj aspektis kiel se li ĉiam malglatigis ilin. Li estis studento kaj tre sukcesa ludanto de futbalo, kaj li neniam sin distris dum la longa veturado hejmen laŭ la sama maniero kiel Andreo kaj ties amiko.

Li kutime iom malestime kapsalutis kiam li preteriris la grupeton, malkovrante la kapon dum la plej mallonga tempo konforma al ĝentileco kaj irante ĝis la malproksima fino de la pramo. Iufoje kiam li preterpasis ilin Aldita estis utiliganta kun maksimuma efekto la okulharojn kaj okulojn, kaj Meg estis preskaŭ certa ke ŝi aŭdis lin murmuri al si “Stultaj junaj azeninoj!” Li fumadis ĉe sia fino de la pramo—cigarojn komence de la trimestro kaj mallongan, nigran, fiaspektan pipon je la fino—kaj Meg kaŝe pensis kiel virece li aspektas kaj profunde suspiris.

Mi diru al vi jam nun anstataŭ atendi ĝis poste kion faris ĉi malsaĝulineto post kelkmonata kurso de Aldita kaj romanoj. Ŝi estis enamiĝinta ĝis kiu grado eblas al deksesjarulino enamiĝi; kaj estis al Alan al kiu mankis beleco kaj plaĉa maniero—ne al Andreo kiu havis parolantajn okulojn kaj krispajn karojn kiuj “similigis lian frunton al la leviĝanta suno”; ne al Andreo kiu donis al ŝi tenerajn rigardojn kaj konversaciajn pipromentaĵojn dirantajn “Mia koro estas cia”, sed al Alan kiu neniel atentis ŝin krom per kelkfoja iom malestima sinklino.

Kompatinda malgranda Meg! Ŝi estis tre malgaja en tiu

tempo, kaj tamen estis ia rava malĝojo kiun ŝi premis al si por reteni ĝian varmon. Neniu divenis ŝian sekreton. Ŝi prefere mortus ol lasi ke eĉ Aldita suspektu tion kaj akceptis la leteretojn kaj ridetojn de Andreo kvazaŭ nenion alian ŝi pli volonte havus. Sed ŝi iĝis iom maldika kaj grandokula kaj multvorte notis ĉiutage en sia taglibro kaj verkis vere teruran kvanton da versaĵoj en kiuj “koro” kaj “doloro”, “larmoj” kaj “ĉarmoj”, “sorto” kaj “morto” ofte estis la finaj vortoj de la versoj. Ŝi toleris Andreon pro kelkaj motivoj. Unue, li estis la frato de Alan kaj tre ofte diradis ion pri “Alĉjo” kaj informis pri liaj sukcesoj ĉe la futbala ludejo; cetere Aldita eble malkovrus ŝian sekreton se ŝi tute rifuzus lin. Krom tio, Andreo havis la plej longajn okulharojn kiujn ŝi iam vidis, kaj ŝi devis havi iun por dolĉe paroli en ŝian orelon, eĉ se ne estus tiu kiun ŝi volus.

Iun tagon krizo sin prezentis.

“Neniom pli da veturoj sur la kara malnova boato dum unu monato,” Aldita rimarkis, el sia angulo de la kajuto.

“Jen teruraĵo! Kion vi volas diri, Fraŭlino MacCarthy?” Jakobo Graham diris kun troigita malespero en sia voĉo.

“Monsieur H. estis liberiginta la klason por monato. Li iros al Melburno,” Aldita respondis kun suspiro.

Meg ĝin eĥis kiel sub devigo kaj Andreo diris feroce ke pendumo estus tro milda traktado por Monsieur H—. Kion li celis per tia malhumana konduto, li volus scii; kaj kiel Jaĉjo kaj li povos daŭrigi la vivon dume?

Estis Jakobo kiu rapide elpensis “rimedon”.

“Ĉu ni ne povus fari promenadon ie iun vesperon—nur ni kvar?” li diris subsugeste.

Aldita kaj Andreo opiniis la proponon brila; kaj kvankam Meg unue estis skuinta la kapon emfaze, finfine oni persvadis ŝin kaj ŝi solene promesis partopreni.

Oni decidis renkontiĝi en sovaĝeja kampo apud tiu plej malproksima apartenanta al Misrego, promeni dum prosimume horo kaj reveni ĝis la sepa duono, antaŭ ol krepuskiĝis.

“Mi intencas peti de vi ion en tiu tago, Meg,” Andreo flustris ĝuste kiam ili disiĝis. “Mi scivolas ĉu mi ĝin ricevos.”

Meg ruĝiĝis laŭ sia nerva, memkonscia maniero kaj demandis al si dum momento ĉu li intencas peti buklon de ŝiaj haroj, io kion Jaĉjo Graham jam ricevis de Aldita.

“Kion?” ŝi diris malvolonte.

“Kison,” li flustris.

Momenton poste la aliaj aliĝis al ili, kaj mankis okazo por la indigna respondo kiu tremis sur ŝiaj lipoj. Ŝi eĉ devis manpremi, aspekti kiel se nenio okazis kaj disiĝi kiel bonaj kamaradoj.

“Je la sesa duono akurate, Margarita. Mi neniam pardonos al vi se vi ne venos,” Aldita diris kiam ili disiĝis ĉe ŝia kradpordo.

“Mi—vi—Ho, Aldita, mi tute ne kredas ke mi povos veni,” Meg balbutis, kun karmezino denove sur la vangoj. “Mi neniam antaŭe faris ion tian. Mi estas certa ke ne estas konvene.”

Sed la kurbigo de la lipo de Aldita kaŭzis al ŝi honti pri si.

“Vi estas nur dek du jara, Margarita,” la junulino diris trankvile; “vi tute ne havas pli ol dek du jarojn. Estus pli bone se vi denove havigus al vi pupon, kaj bildlibron kun moral-instruo. Mi petos al Andreo aĉeti unu por vi kaj iom da ŝnuro per kiu ligi vin en vian altan seĝon en la infanejo.”

Sarkasmo tia estis tro forta por Meg. Rapide kaj senkondiĉe ŝi promesis esti en la difinita loko je la horo menciita kaj forkuris laŭ la pado por obei la alvokon de la brue

sonanta temanĝa sonorilo.

Sed dum la du intervenantaj tagoj ŝia sekreto pezis sur ŝin kiel kulpŝarĝo kaj ŝi sopiris nedireble por konfidato kiu konsilus al ŝi kion fari pri tiu ĉi ĉagrena demando. Ne Judi: tiu junulino estis tro senpera, tro prudenta, tro multe ŝi estis infano kaj kvazaŭ knabo—ion tian ŝi ne kuraĝus rakonti al ŝi. Ŝi povis imagi la malestimon en la grandaj, klaraj okuloj de ŝia fratino, la senbridan ridadon kiun tia rakonto elvokus, la mordan, lertan mokadon kiu falus sur ŝiajn kutiriĝantajn ŝultrojn. Ne Estera: ĝuste ŝia rolo de vicpatrino malebligis tian ideon, kaj cetere, la dentokarnoj de la Generalo iom post iom ekmontradis malgrandajn blankajn mueldentojn kaj lia sano pro tio iom difektiĝis kaj kaŭzis al ŝi tro da zorgoj por lasi ŝin rimarki la animpremon de Meg.

Kiam venis la elektita vespero la infano jam sin ekscitis ĝis forte emocia stato.

La sesa duono estis la interkonsentita horo, kaj, kiel ŝi ja sciis, estos ankoraŭ plena taglumo. Ŝi sentis ke ŝi vere ne kuraĝos, tute ne povos iri. Supozu ke ŝia patro aŭ Estera, iu el ŝiaj komprenomankaj junaj gefratoj estus en proksimeco kaj vidus la renkontiĝon, aŭ iu el la najbaroj—nu, ŝi ne povus elteni la honton! Tamen, iri ŝi devos, aŭ Aldita malestimegos ŝin. Cetere, ŝi jam plene decidis rekte informi Andreon ke ŝi ne povos permesi al li paroli al ŝi tiel intime kiel li lastatempe faris. Post tiu fina terura flustro ŝi sentis sin sub devigo klare komprenigi al li ke ŝi ne aprobas lian konduton kaj estos “lia amikino” sed ne pli ol tio.

Sed kial ili ne pensis elekti horon kiam estos pli mallume? ŝi diradis al si; tiam estus nenia danĝero esti vidataj; ŝi povus kaŝe eliri la domon sen malfacilo kaj kuradi trans la kampoj sub ŝirmo de la afabla krepusko; kontraŭe, se estus lume kaj ŝi

provus sekrete foriri almenaŭ du aŭ tri el la infanoj postkurus ŝin kaj afable sin proponus “por iri kun ŝi”.

Finfine, tro tima por iri en la taglumo kaj ne volante ke Aldita ŝin riproĉu pro neĉeesto, ŝi pro ekscitiĝo kaj malespero faris ion tiel dube moralan ke dum ankoraŭ longa tempo ŝi ne povos pripensi ĝin sen abomeno.

“Kara S-ro Courtney,” ŝi skribis, sidante ĉe sia tualeta tablo kaj rapide skribaĉante per krajono:—

“Estus aĉe promeni tiel frue. Ni iru pli malfrue, kiam estos tute mallume. Estos multege pli ĝinde ĉar neniu povos vidi nin. Kaj ni renkontiĝu ĉe la fino de la kampoj kie la vepro dense kreskas, ĉar estos pli private. Mi skribos al Aldita por diri ke ŝi iru samtempe, ŝi informos S-ron Graham.

“Via sincere,  
“m. woolcot.”

“P.S.—Mi devas peti vin, bonvolu ne kisi min. Mi estos tre kolerega se vi tion farus. Mi tute ne ŝatas kidadon.”

Ŝi skribis la finan alineon kun nerva rapido ĉar ŝi tre timis ke li eble plenumos sian promeson se ŝi ne malpermesos al li tuj kiam ili renkontiĝos. Poste ŝi ĝin enkovertigis kaj adresis al S-ro A. Courtney, tute ne pensante eĉ dum momento ke estas io stranga aŭ nekonvena en tio ke junulino tiel substreku ke rendevuo estu en la mallumo.

Post tio ŝi skribis kelkajn klarigajn liniojn al Aldita, kaj petis ke ŝi nepre estu en la kampo antaŭ la oka duono kaj ŝi (Meg) elŝteliĝos dum la infanoj preparos por enlitiĝo kaj verŝajne ne rimarkos.

Ŝi poste eliris en la ĝardenon por serĉi portontojn por siaj du leteroj. Malgranda Flonjo Courtney pasigis la posttagmezon kun Nelli, kaj Meg revokis ŝin de la kradpordo ĝuste kiam ŝi estis ironta hejmen kaj, nevidate de la infanoj,

konfidis al ŝi letereton.

“Donu tion al via frato Andreo tuj kiam li venos de la lernejo,” ŝi flustris, samtempe metante grandan ĉokoladon en la buŝon de la knabineto. Bunty estis la sekvonta por subaĉeto per promeso pri la samaj fandiĝemaj frandaĵoj se li kuros al la domo de Aldita kun la alia letero, kaj Meg denove spiris senĝene, sentante ke ŝi lerte evitis minacantan danĝeron implicitan en la fruvespera rendezuo.

Sed sendube la fatalo regis super la leteretoj! Bunty liveris sian sen malhelpo al la domservistino ĉe la familio MacCarthy kaj responde al la demando de la knabino “s’pozis ke estos respondo, knabinoj ĉiam ’tendas unu al nenio.”

Aldita estis devigata resti en sia ĉambro pro subita severa malvarmumo kaj skribis letereton al sia amikino informante ŝin ke ŝi estas tro malsana por ricevi permeson eliri, kaj estis skribinta al S-ro Graham kaj S-ro Courtney ankaŭ, prokrastante la promenon ĝis post unu semajno.

Nu, ĉi tiu letereto, en sia pale rozkolora triangula koverto, estis transdonita en la poŝon de Bunty inter liaj ludglobetoj kaj arakidoj kaj ŝnurpecoj. Kaj kiel estis atendeble, li survoje hejmen renkontis konatojn kaj baldaŭ estis surgenu ĉe la vojflanko, ludante per la globetoj.

Li perdis dekon kiu ne inkludis lian plej bonan agatan, batalis kun knabo kiu senrajte ekposedis lian preferatan globeton kaj, post horo, revenis hejmen malgaja, konstatinte nur ĉe la kradpordo ke li estis perdinta la delikatan letereton de Aldita.

Okazis ke Meg estis promesinta al li ok ĉokoladokovritajn juglandojn je lia reveno, kaj se en unu afero ĉi knabo havis pli grandan malfortecon ol en aliaj, estis en lia aparta amo por tiuspecaj bombonoj kaj jam dum kelkaj semajnoj li ne



gustumis eĉ unu, do ne estis mirinde ke lia koro preskaŭ rompiĝis pro la penso ke li devos rezigni pri ili.

“Mi scias ke ŝi estos sufiĉe avara por diri ke mi ne perlaboris ilin simple ĉar mi faligis la leteraĉon de tiu knabino,” li diris al si malgaje, “kaj mi supozas ke ĝi nenion enhavis krom “Kara Margarita, ni ĉiam dividu niajn sekretojn, unu kun la alia;” mi dufoje aŭdis ŝin diri tion kaj kompreneble ŝi tion skribas ankaŭ.” Tiam rapide, subite, venis sur lin la tento.

Laŭnature Bunty estis la plej kanajla mensogisteto kiu iam naskiĝis kaj estis nur la sentima honesteco de Judi kaj ŝia forte esprimata malestimo por pretekstado kiu tenis lin modere verema. Sed Judi estis mejlojn for kaj tute ne povus ŝrumpigi lin per sia rigardo de absoluta malestimo. Li estis jam ĉe la infaneja pordo, turnanta la anson per hezitaj manoj.

“Vi ja longe forestis,” diris Meg de la tablo kie ŝi riparigis skatoleton da siaj gantoj. “Nu, kion ŝi diris?”

Ĝuste ĉe ŝia kubuto estis la gaja bonboniere enhavanta la brunajn kreme krustkovritajn juglandojn.

“Ŝi diris ‘Nu bone,’” diris Bunty raŭke.

Meg kalkulis la ok ĉokoladojn en lian malpuran maneton kaj daŭrigis sian riparadon kun suspiro de trankviliĝo. Kaj Bunty kun defia, honta rigardo en la okuloj, ŝovis ĉiujn la bombonojn samtempe en sian buŝon, kvazaŭ por eviti la eblecon de subita pento.

La alia letereto estis same malbonsorta. Malgranda Flonjo hejmeniris, la pensoj direktataj sur iun Avinjokufon kiun Nell estis promesinta fari por ŝia nova pupo.

“Veŭda kun ŭozaj ŭubandoj,” ŝi diris al si mallaŭte dum ŝi supreniris la ŝtupojn al sia propra pordo. Alan kuŝis sur la veranda litseĝo fumanta sian nigran pipon.

“Veŭda kio?” li ride demandis, “kobajoj aŭ kangurooj?”

“La kufo de Klaŭisa Maŭia,” diris la knabineto kaj tuj serioze ekdiskutis kun li pri la plejtaŭga koloro por vintra surtuto por tiu vaksa sinjorino.

Post tio ŝi sin turnis por eniri la domon.

“Kio elstaras el via poŝeto, Flonjo knabineto?” li diris dum ŝi tuŝe preterpasis lin.

Ŝi haltis momenton kaj palpis.

“Ho pŭeskaŭ mi ne memoŭis, kaj mi pŭomesis faŭi—estas leteŭo poŭ vi, Alan,” ŝi diris, kaj liveris la malbonŝancan letereton de Meg en la manojn mem de la Filiŝto.

<<<<<>>>>

## Ĉapitro VIII

### Ŝtonĵetilo Kaj Katastrofo

Krepusko estis veninta tre delikate kaj tenere sur la ĝardenon, kaj la kampojn, kaj la riveron. Estis apenaŭ sentebla venteto ĉe la bordo de la rivero sed, post la varmega, longa tago, ĝi ŝajnis preskaŭ tro laca spiri kaj fari ondetojn. Tre malrapide la griza trankvila lumo malheliĝis kaj unu-du blankaj steloj aperis kaj palpebrumis tie supre sur la alta malproksima ĉielo. Sube, malantaŭ la eŭkaliptaj arboj, trans la rivero estis eĉ pli blanka luno; proksime, larĝa strio sur la akvo ridetis supren al ĝi. Meg esperis ke ĝi ne grimpos super la arbosuprojn ĝis post la oka horo aŭ la kampoj inundiĝos de lumo kaj ŝi estos vidata. Je la vespermanĝo kaj dum la frua parto de la vespero ŝi estis enpena kaj incitigema pro sia maltrankvilo kaj ŝi du-tri foje humiligis Bunty tute malafable.

Jam de la sesa horo li estis ĉirkaŭŝvebinta ŝin en plej kompatinda maniero.

Estis karakterizaĵo de tiu knabeto, ke post kiam li tentiĝis forlasi la vojon de la vero, li estis tute malfeliĉa ĝis li estis konfesinta kaj frotinta siajn malpurajn manetojn en siajn malsekajn okulojn ĝis li fariĝis “vidaĵo pri kiu sonĝi, ne rakonti”.

Pip diris ke tio estas ĉar li estas malkuraĝulo al kiu mankas la animforto ekdormi kun mensogo sur la koro, pro timo ke li vekigĝos kaj vidos anĝelon kun flamanta glavo staranta apud lia lito. Kaj dolore mi devas agnoski ke tio ŝajnas pli probabla takso pri la afero ol kredi ke la knabo efektive impresiĝis de la abomeneco de sia ofendo kaj deziras kompensi pro ĝi, ĉar jam en la sekvanta tago, se okazo sin sufiĉe forte prezentis li falis denove kaj jam en la sekvanta

vespero li ŝtelpaŝis al iu kaj plendploretis kun la fingroartikoj en la okuloj ke li “d-d-diris m-m-malveron, ho ve-e-e!”

Je la sepa en tiu aparta vespero li estis jam malgajege pentema; kelkaj larmoj estis fluetintaj laŭ liaj vangoj kaj miksiĝis kun la inko de la landkarto super kiu li laboris por Fino Marsh. Li sin lokigis ĉe la kubuto de Meg kaj jen kaj jen rigardis en ŝian vizaĝon kun sopira amu-kaj-pardonu-min-maniero kiun ŝi trovis ege embarasa, ĉar ŝi eksuspektis, pro lia stranga konduto, ke li iel informiĝis pri la enhavo de ŝia letereto kaj provas deturni ŝin de la entrepreno. Ju pli li rigardis ŝin despli ruĝa kaj maltrankvila ŝi fariĝis.

“Vi povas havi mian novan ŝ-ŝ-ŝtonĵetilon,” li iufoje flustris, donante al ŝi larman, petegan rigardon kiun ŝi interpretis kiel peton resti sekura ĉeĥejme.

Fine la montrilo de la horloĝo atingis ok kaj ĉar la infanoj sin okupis per vorta milito pri la posedo de erarvaginta hundo kiu venis al Misrego en la posttagmezo ŝi sukcesis eliri la ĉambron neobservata. Neniu estis en la enirejo kaj ŝi prenis la ĉarman lanecan skarpon kiun ŝi kaŝis tie, vindis ĝin ĉirkaŭ sian kapon kaj ŝteliris el la flankpordo kaj laŭ la unua pado.

Malsupre en la ĝardeno la tero estis blanka de falintaj rozpetaloj kaj la aero plenis de ilia mortospiro; amaso da pampoherbo staris alta kaj mola kontraŭ la ĉielo; kelkaj indiĝenaj arboj, lasitaj kreski inter la kulturitaj arbustoj, etendis arĝenteblankajn brakojn en la direkto de la luno kaj la rapidanta figureto ekhavis fantomecan aspekton. El la kradpordo kaj en la unuan kampon, kie la rozparfumo tute ne atingis kaj la maldensa senmova aero enhavis nur penetran odoron de mimoso. Pli da eŭkaliptaj arboj kaj pli da blankaj, fantomecaj brakoj; jen, abrupta ekmovo apud la barilo, obtuza, sepulteca flustro, kaj subpremita krio de Meg.

“Jen la ŝ-ŝ-ŝtonĵetilo, M-Meg; p-prenu ĝin,” diris Bundy, lia vizaĝo blanka kaj malfeliĉa.

“Stultuleto! Kion vi celas, tiele ŝtelirante ĉi tien?” Meg diris, kolera tuj kiam ŝia koro ekbatis denove.

“Mi nur v-volis p-plaĉi al vi, Menjo,” la knabeto diris kun amara singulto en sia voĉo.

Li metis ambaŭ brakojn ĉirkaŭ ŝian talion kaj ekkaŝis la nazon en ŝian robon el blanka muslino. Ŝi rapide forskuis lin.

“Nu, bone; do dankon,” ŝi diris. “Nun hejmeniru, Bunty; mi deziras trankvile promeni sola en la lunlumo.”

Li boris siajn fingroartikojn kiel eble plej profunde en la okulojn, lia buŝo malfermiĝis kaj lia suba lipo pendis, pendegis.

“Mi d-d-diris al vi g-g-grandan m-m-malveron,” li ploris, balanciĝante tien kaj reen sur la piedoj.

“Ĉu jes? Ho, negrave! Nun iru hejmen,” ŝi diris senpacience. “Vi ĉiam estas diranta malverojn, Bunty, ĉu ne? Do mi tute ne miras. Jam forkuru.”

“Ssed mi devas r-rakonti al v-vi pri ĝi,” li diris, ankoraŭ klopodante enŝovi la okulojn en la kapon.

“Ne, ne necesas; mi pardonos al vi ĉifoje,” ŝi diris grandanime, “nur ne tion faru denove. Nun forkuru, jam tuj aŭ mankos al vi tempo kompletigi vian mapon kaj Fino Marsh punos vin.”

Liaj okuloj revenis al la kutima loko, same la manoj. Lia koro denove estis tute malpeza kiam li sin turnis por reveni al la domo. Foririnte kelkajn paŝojn li revenis.

“Ĉu vi tre deziras havi tiun ŝtonĵetilon, Meg?” li diris milde. “Vi estas nur knabino, do mi ne s’pozas ke ĝi estus tre utila al vi?”

“Ne, mi ne deziras ĝin. Jen, prenu, kaj rapidu domen;

pensu pri via mapo,” Meg respondis, febre malpacienca pro lia malrapidemo.

Kaj post tio Bunty, tute feliĉa denove, sin turnis kaj gaje kuris supren ĝis la domo.

Kaj Meg mallevis la glitstangon, remetis ĝin en ĝian lokon per tremantaj fingroj, kaj kuris kun freneza rapido tra la du restantaj kampoj.

La mimosovepro ĉe la fino estis tre silenta. Estis nenia susuro, nenia voĉsono, nenia sono de la afekta ekrido kiu kutime informis, ke Aldita ĉeestas.

Meg haltis senspira kaj strabis inter la arbustoj; alta figuro kliniĝis kontraŭ la barilo.

“Andreo!”, ŝi diris per akra flustro, forgesante en sia maltrankvilo ke ŝi neniam nomis lin per lia antaŭnomo—”Kie estas la aliaj? Ĉu Aldita ne venis?”

Estisodoro de cigaro kaj intense rigardante ŝi vidis kun teruro ke estas Alan.

“Ho!” ŝi diris per nepriskribebla voĉtono. Ŝia koro donis unu timan, hontan salton kaj poste ŝajnis tute ĉesigi la batadon.

Ŝi suprenrigardis al li kvazaŭ petegante ke li ne tro malbone taksu ŝin, sed lia vizaĝo portis la malestimigan rigardon kiun ŝi jam kutimis antaŭtimi kaj liaj lipoj montris malŝaton.

“Mi—mi nur eliris por iom promeni; la vespero estas tiel bela,” ŝi diris, mizere malkonvinke kaj per voĉtono sinpraviga ŝi aldonis: “ankaŭ la kampo apartenas al mia patro.”

Li sin klinis malantaŭen, kontraŭ la barilon, kaj mal-suprenrigardis al ŝi.

“Flonjo transdonis al mi vian letereton, kaj ĉar ĝi ŝajnis esti adresata al mi, kaj oni informis min ke ĝi estas por mi, mi

malfermis ĝin,” li diris.

“Vi sciis ke ĝi estas por Andreo,” ŝi diris—tamen ne rigardante lin.

“Tiel mi supozis, jam leginte ĝin,” li respondis malrapide; sed Andreo ankoraŭ ne revenis ĉivespere, do mi venis anstataŭe; estas egale se nur estas knabo, ĉu ne?”

La knabino faris nenian respondon sed levis sian manon kaj tiris la skarpon pli firme ĉirkaŭ sian kapon.

Liaj lipoj malŝate kurbiĝis ankoraŭ iom.

“Kaj mi ankaŭ scias kiel kisi, mi certigas vin. Mi estas iom lerta pri tio kvankam vi eble pensas tion neverŝajna. Ho jes, mi scias ke vi diris ke vi ne volas esti kisata; sed knabinoj ĉiam diras tion, ĉu ne?—eĉ kiam ili plej atendas ĝin.”

Meg daŭre silentis, kaj la trankvila, senkompata voĉo daŭrigis—

“Mi sentas ke estas apenaŭ sufiĉe mallume por vi, ĉu? La luno tre ĝenas, ĉu ne? Tamen ni eble povos trovi pli malhelan lokon iom for de ĉi tie kaj tiam mi povos sendanĝere kisi vin. Kio estas al vi—ĉu vi ĉiam estas same silentema kun Andreo?”

“Ho ĉesu!” diris Meg per sufoka voĉo.

La moka tono tuj formortis el lia voĉo.

“Fraŭlino Meg, vi antaŭe ŝajnis tia ŝatinda knabineto,” li diris mallaŭte, “Kial vi permesis al tiu aĉa knabino McCarthy delogi vin? Ĉar ŝi estas aĉa kvankam vi eble ne tion opinias.”

Meg nek parolis nek sin movis kaj li daŭrigis kun tia milda seriozo kian ŝi ne atendis trovi ĉe li.

“Mi longe observis ŝin surŝipe entrepreni la taskon devojigi vin, kaj ne povas ne pensi tion tre bedaŭrinda. Mi prezentis al mi miajn sentojn se mia fratineto Flonjo iam intimiĝus kun tia knabino kaj ekflirtus kaj farus sin malfavore rimarkebla kaj mi demandis al mi ĉu vi ĉagreniĝus se mi

parolus al vi pri tio. Ĉu vi tre koleras pri mi, Fraŭlino Meg?”

Sed Meg apogis sian kapon kontraŭ la krudan barilon kaj plorsingultis—sekajn, korrompitajn singultetojn kiuj tuŝis la varman koron de la knabo.

“Mi ne rajtis paroli al vi kiel mi komence faris—mi estis absoluta brutulo,” li diris kulposcie, “bonvolu pardoni al mi, mi petas, Fraŭlineto Meg—Mi prefere fortranĉus mian manon ol vere vundi vin.”

Ĉilasta almenaŭ estis iom konsola kaj Meg dum duona sekundo levis sian vizaĝon, blankan kaj patosan en la lunlumo kaj tute malseka de malĝojegaj larmoj.

“Mi-mi-ho! mi ja ne estis tute tiel aĉa kiel vi supozas,” ŝi diris rompите; “Mi ne volis partopreni al ĉi tiu promenado—kaj ho! mi ja, ja, ja ne permesus al iu ajn min kisi. Ho bonvolu kredi min!”

“Mi tion faras, mi ja tion faras,” li diris volontege; “mi nur diris tion ĉar—nu, ĉar mi estas granda kruda brutulo kaj ne scias kiel paroli kun malgranda, facile vundebla knabino. Kara Fraŭlino Meg, bonvolu manpremi kaj diri al mi ke vi pardonas mian krudulan konduton.”

Meg etendis blankan maneton kaj li premis ĝin varme. Poste ili kune trapromenis la kampojn kaj disiĝis ĉe rompita kradpordo kondukanta en la ĝardenon.

“En mia tuta vivo mi ne plu flirtos,” ŝi diris kun granda seriozo dum li adiaŭis ŝin; kaj li respondis kuraĝige:

“Ne, mi estas tute certa ke ne—lasu tion al knabinoj kiaj Aldita, ĉu ne? Vi nur bezonis ke oni vin metu sur la ĝustan vojon. Adiaŭ Fraŭlineto Meg.”

<<<<<>>>>



## Ĉapitro IX

### Sekvoj

La afliktoj de Meg tamen ankoraŭ ne tute finiĝis eĉ nun. Kiam ŝi eniris la domon Nelli renkontis ŝin en la enirejo kaj rigardegis ŝin.

“Kie vi estis?” ŝi diris kun miro en siaj rondaj okuloj. “Mi serĉis kaj serĉadis vin.”

“Kial?” diris Meg abrupte.

“Ho, D-ro Gormeston kaj Sino Gormeston kaj du Finoj Gormeston estas en la salono, kaj mi pensas ke ili restos eterne.”

“Nu?” diris Meg.

“Kaj la Generalo denove malsanas, kaj Estera diras ke ŝi ne lasus lin dum sekundo, eĉ se Gog kaj Magog ĉeestus kaj deziregus vidi ŝin.”

“Nu?” diris Meg denove.

“Kaj patro estas kiel eble plej kolera kaj estas devigata mem distri ilin ĉiujn. Li jam kantis ‘Mia amato kiam knabo’ kaj ‘Mona’, kaj li ĉion rakontis al ili pri siaj ĉevaloj kaj nun mi s’pozas ke li ne scias kion fari.”

“Nu, mi nenion povas fari pri tio,” Meg diris lace kvazaŭ la temo ne havis intereson por ŝi.

“Sed vi simple devos!” akre kriis Nell. “Mi jam faris mian plejblon; li ordonis ke ni knabinoj eniru kaj vi estis nenie, do estis nur Bebinjo kaj mi.”

“Kaj kion vi faris?” Meg demandis, malgraŭvole sciema.

“Ho Bebinjo parolis al Fino Gormeston kaj oni petis ke mi pianludu,” ŝi respondis, do mi ludis “Ŝipon Remu”. Nur mi forgesis ĝis mi finludis ke ĝi havas du diesojn,” ŝi aldonis malgaje. “Kaj poste Bebinjo ĉion rakontis al Sino Gormeston pri tio ke Judi lasis la Generalon ĉe la Kazerno kaj ke oni sendis ŝin al pensiona lernejo pro tio kaj pri la verda rano kiun Bunty donacis al ŝi kaj post tio patro diris ke jam estas tempo ke ni enlitiĝu kaj demandis kial okazis ke vi ne envenis.”

“Mi iros, mi iros,” Meg diris rapide. “Li estos terure kolera pri la afero morgaŭ. Ho! kaj Nell—iru diri al Marta ke ŝi ensendu la vinon kaj biskvitojn kaj tiel plu post duonhoro.”

Ŝi rapide fortiris sian skarpon, glatigis siajn taŭzitajn harojn kaj ekrigardis en la spegulon de la ĉapelstablo por kontroli ĉu la vespera vento estis foriginta la signojn de ŝiaj lastatempaj larmoj.

Tion farinte ŝi eniris la salonon kie ŝia patro aspektis tute varma kaj malfeliĉa pro siaj klopodoj distri la kvar gastojn kiuj estis el la speco populare aluditaj kiel ‘pezaj ĉemane’.

“Ludu ion, Meg,” li baldaŭ diris kiam finiĝis la inter-salutado kaj silento ŝajnis ekregonta inter ili denove, “aŭ kantu ion, tio estus preferinda—ĉu vi ne havas ion por kanti?”

Nu Meg ordinare havis plaĉan, freŝan voĉeton kiun oni povus aŭskulti kun iom da plezuro, sed ĉivespere ŝi estis laca kaj nervostreĉita kaj malfeliĉa. Ŝi kantis “Within a mile of Edinboro’ town” kaj estis ege subpiĉa de komenco ĝis fino.

Ŝi sciis ke ŝia patro sidas nerveze la tutan tempon kaj ke ŝiaj eraroj agacas lin kaj je la fino de la kanto, prefere ol tuj sin turni kaj fronti ilin ĉiujn ŝi ekludis la “March Hongroise” de Kowalski. Sed la klavoj ŝajnis sin levi kaj frapi ŝiajn manojn kaj la fortepiano iĝis nestabila, balanciĝante tien kaj reen laŭ

timiga maniero; ŝi faris aĉan sonmiksaĵon kiam ŝi ekkaptis la muziktenilon por sekureco kaj momenton poste ŝanceliĝis for de la tabureto kaj falis pro profunda sveno en la brakojn de D-ro Gormeston, providence etenditajn ĝustatempe.

La peza, varmigita atmosfero superfortis ŝin en ŝia malordigita mensostato.

Kapitano Woolcot estis eksterordinare ĉagrenita de la afero; eĉ ne unu el liaj infanoj iam antaŭe faris ion tian kaj kiam Meg kuŝis sur la sofo kun sia blonda kapeto kliniĝanta sur la ruĝajn krispe broderitajn kusenojn, ŝia vizaĝo blanka kaj senkonscia, ŝi strange similis sian patrinon kiun li estis enteriginta en la tombejo antaŭ kvar jaroj. Li iris al la filtrilo por glaso da akvo, kaj, dum la akvo fluetis, demandis al si obtuze, mekanike, ĉu lia mortinta edzineto pensas ke li tro rapide transdonis ŝian regnon al Estera. Kaj poste, dum li staris apud la sofo kaj rigardis la mortecan vizaĝon, li sin demandis kun malvarma tremo ĉe la koro ĉu Meg ankaŭ estas mortonta kaj se jes, ĉu ŝi povos diri al tiu sama edzineto ke Estera ricevas pli teneran traktadon ĉe li ol ŝi ricevis.

Lian revadon interrompis la akra, mira voĉo de la kuracisto. Li alparolis Esteran kiun oni urĝe alvokis al la loko kaj kiu estis helpinta malfiksi la belan korsaĵon.

“Rigardu! La infano estas strikte laĉita!” li diris; “vi nepre rimarkis tion, sinjorino. Tiu premado, se daŭra, sufiĉis por duonmortigi ŝin. Ĉut, ĉut! sveni! mi miras ke ŝi ankoraŭ nek konvulsiis nek suferis marasmon.”

Je tio nubo de ĉagreno aperis sur la bela vizaĝo de Estera—ŝi estis denove kulpinta mankon en la plenumo de sia devo. Ŝia edzo rigardis ŝin preskaŭ moroze de la sofo kie la malgranda figuro kuŝis en sia ĉifita muzlina robo, kaj ŝia koro diris al ŝi ke ĉi tiuj infanoj ne ricevas patrinan zorgon ĉe ŝiaj

manoj.

Poste, kiam Meg jam kuŝis sekure en la lito kaj la furoro ĉesis, ŝi iris al sia edzo preskaŭ timeme.

“Nur dudek jarojn mi havas, Joĉjo; Ne juĝu min tro severe!” ŝi diris kun plorspasmeto en la voĉo. “Mi ne povas esti al ili ĉio kio ŝi estis, ĉu?”

Li kisis la belan kapon kontraŭ sia ŝultro kaj konsolis ŝin per unu-du teneraj vortoj, sed foje kaj denove venis al li tiunokte la blanka, senmova vizaĝo de Meg kiel ĝi kuŝis sur la skarlataj kusenoj, kaj li sciis ke la vento kiu movetis la kurtenojn ĉe la fenestro estis ludinta kun la longa herbo en la tombejo antaŭ nur kelkaj minutoj.

<<<<<>>>>

## Ĉapitro X Bunty En La Rolo De Heroo

La cirkonstancoj kaŭzis al Bunty denove mensogi. Fakte li mensogegis kaj estis samgrade malfeliĉa. Ĉiuj aliaj estis elirintaj krom Meg kiu ankoraŭ ripozis enlite post la svenado, kaj li solece kriketludis en unu el la kampoj. Sed eĉ kun tute nova pilko tia ludo fariĝas nekontentiga post iom da tempo kiam oni devas sola sendi, batilumi kaj gardi. Do li baldaŭ formetis en la ĝardenon sian batilon kaj komencis sencele ĵetadi la pilkon dum li cerbumis kion poste fari. La rajdĉevalo de lia patro staris ĉe la malproksima fino de la kampo kaj senpripense Bunty ekiris tien kaj rotacie sendis sian pilkon rapide trans la teron al ĝi kun intenco simple "saltigi ĝin". Li neniel celis vundi ĝin kaj kiam la pilko forte kontraŭfrapis ĝian kruron kaj ĝi lamis for li rapidis al ĝi palvizaĝa kaj zorgoplana.

Li povis vidi ke li grave malutilis al ĝi ĉar la kompatinda besto fortiris de la tero sian kruron kaj tremis kiam li tuŝis ĝin. Teruro lin tuj kaptis kaj li rapide sin turnis kun la kutima intenco sin kaŝi. Sed konsternis lin vidi kiam li estis duone reirinta trans la kampon ke lia patro kaj iu oficirokolego trairas la pordeton el la ĝardeno kaj malrapide paŝas en la direkton de la bela kaj valora ĉevalo.

Pro timego pri sia faro li glitigis la kriketpilkon en la antaŭaĵon de sia maristeta bluzo kaj, rapide genuiĝinte, ekludis sinabsorbe per globetoj. Lia tremanta dikfingro estis sencele

frapinta proksimume seson kiam li aŭdis voki lian nomon per voĉo stentora.

Li sin levis, skuis la polvon for de siaj tremantaj genuoj, kaj paŝis malrapide al sia patro.

“Iru diri al Patriĉjo ke mi deziras ke li tuj venu,” diris la Kapitano. Li tenis la kruron de la ĉevalo permane kaj ĝin zorge ekzamenadis. “Se li ne troveblas, almenaŭ Pip. Mi ne povas imagi kiel tio okazis—ĉu vi ion scias pri la afero, Bunty?”

“Ne. Kompreneble ne! Mi n...neniam n...enion faris,” diris Bunty, dentoklake, sed lia patro tro okupiĝis por rimarki lian evidentan kulpecon, kaj diris ke li iru tuj.

Do li iris al la stalo kaj irigis Patriĉjon rapide al lia patro.

Tion farinte li ŝtele eniris la domon kaj senrajte forprenis de la manĝoĉambro du pomojn kaj pecon da kuko kaj foriris por esti tute malfeliĉa ĝis li konfesos.

Li ŝteliris en neuzitan kabanon je kelka distanco de la domo; iam ĝi estis stalo kaj havis duoblan subtegmentejon atingeblan nur per ŝtupetaro kadukega. Bunty suprenigis sin kaj sidiĝis, malgaja amaseto, sur iom da pajlo kaj penseme ekmordis pomon.

Se iam estis knabo kiu bezonis saĝan, aman, patrinecan patrinon, estis tiu same malpurvizaĝa pezakorulo kiu sidante apogis sian malglatan kapeton kontraŭ araneajkovritan trabon kaj malgaja murmuris, “Ne mi kulpis. Estis la ĉevalo.”

Ŝajnis al li ke io moviĝas en la dua subtegmentejo kiu per malalta vando estis apartigita de tiu kie li sidis.

“Huŝ-huŝ, iru for!” li vokis, pensante ke estas ratoj. Li frapis la plankon kelkfoje per siaj pezaj botetoj.

“Huŝ!” li diris.

“Bunty.”

La knabo iĝis pala ĝis la lipoj. Tiu neklarigebla mallaŭta

flustro de lia nomo, tiu stranga susuro tiel proksime de li—ho kion ĝi povus signifi!

“Bunty.”

Denove la nomo sonis. Pli laŭte ĉifoje, sed per voĉo laca, kiu iel trafis lin kun stranga vibro. La susurado plilaŭtiĝis, io transiris la vandon, irante al li. Terurite li singultis kaj sin ĵetis vizaĝalplanke, kaŝante sian blankiĝintan vizaĝeton inter la pajlo.

“Bunty,” diris la voĉo denove, kaj delikata mano tuŝis lian brakon.

“Helpu min—helpu min!” li kriegis, “Meg—ho! patro—Ester!”

Sed unu mano rapide kovris lian buŝon kaj alia lin tiris en sidan pozicion.

Li estis forte ferminta siajn okulojn, por ne vidi la fantoman vizitanton kiu, liakrede, estis veninta por puni lin propeke. Sed io devigis lin malfermi ilin, kaj tiam li sentis ke li neniam plu povos fermi ilin pro mirego.

Ĉar estis la mano de Judi kiu kovris lian buŝon, kaj estis Judi mem kiu staris apud li.

“Ĉielo!” li diris per voĉo konsternita. Li rigardegis ŝin por certiĝi ke ŝi estas el vera karno kaj sango. “Kiel ajn vi alvenis ĉi tien?”

Sed Judi mem faris nenian respondon. Ŝi nur forprenis el liaj manoj la restantajn pomon kaj kukon kaj, eksidante, senvorte manĝegis ilin.

“Ĉu vi ne havas ion pluan?” ŝi demandis avide.

Li tiam rimarkis kia altkreska, osteca, strangaspekta Judi tiu estas. Ŝiaj vestoj ĉirkaŭpendis ŝin kvazaŭ ĉifonaĵoj, ŝiaj botoj estis krevintaj kaj blankaj pro polvo, ŝia bruna vizaĝo estis malgrasa kaj pinta kaj ŝiaj haroj implikitaj kaj malglataj.

“Mi—mi forkuris, Bunty,” Judi diris per tremanta voĉo. “Mi marŝis la tutan distancon de la lernejo. Mi tiom volis vidi vin ĉiujn.”

“Mia mistifiko!” Bunty diris.

“Mi elpensis la tutan aferon,” Judi daŭrigis, lace forŝovante la harojn de la vizaĝo. “En la nuna momento mi ne povas ĉion bone memori, mi estas tiel laca, sed ĉio sin ordigos.”

“Sed kion li diros?” Bunty diris, timokule, dum bildo de la patro trapasis lian menson.

“Li ne scios, kompreneble,” Judi respondis aplombe. “Mi simple loĝos ĉi tie en la subtegmentejo dum kelka tempo, kaj vi ĉiuj povos viziti min kaj alporti al mi manĝaĵojn kaj tiel plu kaj iom poste mi reiros al la lernejo.”

Ŝi malleviĝis inter la pajlon kaj lacege fermis la okulojn dum unu-du minutoj, kaj Bunty ŝin rigardis, duone sorĉita.

“Kiom for estas via lernejo?” li fine diris.

“Sepdek sep mejlojn.” Judi iom horortremis. “Mi senpage iris en ŝarĝvagonaro de Lawson ĝis Springwood, kaj rajdis en ĉaro dum mallonga distanco, sed krom tio mi marŝis. Dum preskaŭ semajno mi venadis,” ŝi aldonis post paŭzo kaj denove fermis la okulojn dum iom longa tempo. Poste unu-du larmoj de malforteco kaj sinkomparto eliĝis el sub ŝiaj nigraj okulharoj kaj faris purigan vojon laŭ ŝiaj vangoj. La gorgo de Bunty ŝvelis je tiu vido, ĉar li neniam antaŭe vidis Judi plori kiom li povis memori. Li frapetis ŝian maldikan manon, frotis sian kapon kontraŭ ŝian ŝultron, kaj diris,

“Negrave, injo,” per malklara voĉo.

Sed tio igis seson da grandaj, pezaj larmoj rapidi el sub la fermitaj okulharoj, kaj la knabino sin turnis kaj kuŝis vizaĝonsube por ilin kaŝi. Poste ŝi sin ŝovis al sida pozicio kaj eĉ ekridis.



“Se la Fraŭlinoj Burton povus vidi min!” ŝi diris. “Ho, mi ĉion organizis tiel bele; oni pensas ke mi pasigas duŝemajnon en Katoomba—ho Bunty, vi devus vidi la buklojn kiujn portas Fino Mariana Burton alfiksitaj ambaŭflanke de la vangoj!” Ŝi ĉesis paroli, ridante preskaŭ histerie kaj poste tusante ĝis larmoj revenis en ŝiajn okulojn.

“Bonvolu alporti al mi ion por manĝi,” ŝi diris kolerete kiam ŝi denove povis spiri glate—“vi devus memori ke mi nenion manĝis de post hieraŭ matene; sed vi ĉiam estis egoisma, Bunty.”

Li ekstaris kaj rapidege sin formovis. “Kion vi povus manĝi? Kion mi alportu?” li diris kaj mallevis unu kruron tra la klappordo.

“Ion ajn, se nur estas multo,” ŝi diris, “Ion ajn! Mi sentas ke mi povus manĝi ĉi tiun pajlon, kaj krakmaĉi la trabojn kvazaŭ ili estus biskvitoj. Fakte, mi devis forturni la okulojn de vi, Bunty; vi estas tiel dika ke mi sopiradas demanĝi viajn ostojn.”

Ŝiaj okuloj brilis kun fajrero de sia malnova gajeco, sed tiam ŝi komencis tusi denove kaj post la kvietigo de la paroksismo sterniĝis elĉerpita.

“Ja venigu iujn el la aliaj,” ŝi vokis malforte dum lia kapo malaperis. “Vi sola malmulte utilas, vi sciu.”

Lia kapo momente reaperis, kaj li provis forrideti la doloron kiun kaŭzis al li ŝiaj vortoj, ĉar ĝuste en tiu momento li estus mortinta por ŝi sen protesta murmuro.

“Mi tre bedaŭras, Judi,” li diris delikate, “sed ĉiuj la aliaj estas for. Ĉu mi ne taŭgas? Mi farus ion ajn, Judi—mi petas.”

Judi ignoris la ploreteton kiu akompanis la finajn vortojn kaj turnis sian vizaĝon al la muro.

Denove du grandaj larmoj fluetis.

“Ili devintus resti hejme,” ŝi diris kun singulto. “Ili ja devintus scii ke mi penos veni. Kie ili estas?”

“Pip iris fiŝkapti,” li diris, “Kaj Nell portas la korbon por li. Kaj Bebinjo estas ĉe la Courtney-oj, kaj Estera iris en la urbon kun la Generalo. Ho kaj Meg malsanas enlite ĉar ŝia korseto estis tro strikta hieraŭ vespere kaj ŝi svenis.”

“Supozeble ili tute ne sentas mian foreston,” ŝi pensis amare kiam ŝi aŭdis ke ĉio ŝajne daŭris kiel kutime dum ŝi tiom travivis nur por vidi ilin ĉiujn.

Tiam la stranga svenemo revenis, kaj ŝi denove fermis la okulojn kaj kuŝis senmova, nekonscia pri tempo, pri loko, nek pri malsato.

Bunty rapidis trans la kampon per flugilhavaj piedoj; ekvido pri la patro proksime de la stalo skuis lin momente kaj memorigis lin pri la propra aflikto, sed li forigis la penson denove kaj daŭre rapidis. La pordo de la manĝaĵejo estis ŝlosita. Marta, la kuiristino, kutime tenis ĝin tia ĝuste pro lia emo forpreni ŝiajn tortojn kaj kukojn; nur estis per lerta ruzado ke li okaze penetris ĝin, kiel li malgaje rememoris.

Sed la malsato de Judi! Neniom por manĝi jam de hieraŭ matene!

Li memoris, eĉ nun kun dolorsento, la teruran senton de malpleneco kiun li spertis pasintsemajne kiam oni pune sendis lin al la lito sen la vespera manĝo. Kaj Judi malhavis tri manĝojn! Li fermegis la lipojn kaj lumo de preskaŭ heroeca decidemo aperis en liaj okuloj. Ĉe la flanko de la domo estis la fenestro de la manĝaĵejo; ofte li sopire rigardadis supren al ĝi, sed neniam provis ascendi al ĝi, ĉar estis aĉa kaktogrimpaĵo sur la muro.

Sed nun, pro Judi, li riskos la vivon por tion fari.

Li ĉirkaŭmarŝis la domon ĝis la flanko fenestro; neniom

videblis, la tuta domo ŝajnis tre kvieta. Marta, kiel li vidis, kuiris en la kuirejo, kaj la alia knabino okupiĝis pri la blankigado de la fronta verando. Li mallonge kaj sobre fiksrigardis la grandajn pikajn dornojn, kaj en la sekvanta minuto suprengrimpis inter ilin.

Ho kiel ili boris kaj ŝiris lin! Estis granda zigzaga vundo laŭ unu brako, lia maldekstra ŝtrumpo estis forŝirita kaj profunda ruĝa skrapvundo vidiĝis trans lia kruro, liaj manoj sangis kaj tremis pro doloro.

Sed li atingis la sojlon de la fenestro, kaj tio sola gravis.

Li suprenŝovis la mallarĝan fenestron, kaj kun granda malfacilo enigis sian dikan korpeton. De tie li lasis sin fali ĝis breto kaj singarde mallevis sin ĝis la planko. Mankis tempo paŭzi kaj esplori liajn multajn vundojn, li simple rigardis la plej grandan skrapaĵon per malgajaj okuloj kaj ekserĉis manĝaĵojn. La manĝaĵejo estis rimarkinde malplena—nenia indiko pri kukoj, neniom da ĵeleo, neniam restaĵoj de kortbirdo.

Li detranĉis grandan pecon for de panbulo, kaj zorge envolvis iom da butero en peco de gazeta folio. Estis iom da konservita bovaĵo sur plado kaj li detranĉis dikan bulon kaj kunvolvis ĝin kun la restaĵo de eriobotria torto. Ĉi tiujn pakaĵojn li lokigis en la malstrikta antaŭaĵo de sia marista bluzo, plenigante siajn poŝojn per sekvinberoj, sekigita citronŝelaĵo, korintoj kaj similaj frandaĵoj laŭ la enhavo de la tenboteloj. Kaj tion farinte li pretiĝis fari sian dolorigan eliron.

Li grimpis denove sur la breton, ŝovis la kapon tra la fenestron, kaj malespere rigardis la kakton. Jam dum li genuis tie aŭdiĝis malantaŭ li la akra klaketo de turniĝanta ŝlosilo.

Li sin turnis terurite, kaj jen estis Marta ĉe la pordo kaj je lia absoluta hororo ŝi parolis kun lia patro kiu estis en la trairejo tute proksime.

“La Linimento de Rowe aŭ arnikaĵo,” la Kapitano estis diranta “Ĝi probable troviĝas en ĉi tiu manĝaĵejo, mia bona knabino, ĉar tio estas la lasta loko en kiu mi atendus trovi ĝin. Mi lasis ĝin sur la kamenbreto en mia litĉambro, sed iu prenis sur sin forigi ĝin. Kial pro la nomo de ĉio mistera vi ne povas lasi netuŝitaj miajn aĵojn?”

“Kaj pro kio mi formovu ĝin?” Marta ripostis. “Mi ne kirlas la paston kun ĝi por fari tion malpeza, almenaŭ ne ordinare.”

Ŝi skuis la kapon, kaj la ago vidigis la malgrandan, genuantan, teruritan figuron ĉe la fenestro.

Okazis ke la pordo estis nur duone malfermita, kaj ŝia mastro staris ĝuste apud ĝi ekstere, do nur ŝi estis regalita per tiu vidaĵo.

Dufoje ŝi malfermis la buŝon por ekparoli, sed Bunty grimacis tiel freneze kaj petege al ŝi ke ŝi fermis ĝin denove, kaj eĉ komencis ekzameni la botelojn sur la breto apud la pordo por doni al la knabo ŝancon malaperi.

Unu minuton kaj li estintus sekura—unu minuton kaj li estus meze de la kaktio kiu jam tute perdis sian kapablon timigi.

Sed la Sorto estis tro potenca kontraŭ li. Kaj ĉio misokazis ĉar la kalkanumo de la ŝuo de Marta Tomlinson estis iom foruzita. Kiam ŝi sin turnis ĝi iom tordiĝis sub si, kaj klopodante restarigi la ekvilibron, ŝi etendis unu manon. Kaj etendante unu manon ŝi renversis kruĉon. Kaj la kruĉo komunikis sian ŝokon al plado. Kiu renversiĝis kaj aplombe forŝovis la grandan pelvon da lakto de la breto sur la plankon. Mi ne scias ĉu vi iam provis purigi lignan plankon post lakto, sed mi estas certa ke vi povas kompreni ke tio estus malagrabla tasko—precipe se vi estus bone broslavinta ĝin jam

tiumatene. Do ne estis mirinde ke Marta, ege agacita pro la katastrofo, kolere sin turnis kaj montrante al la figuro nun pleniganta la fenestron, demandis ĉu la benataj sanktuloj povus plu toleri tiun malbenindan knabon, ĉar ŝi ja ne povos.

La Kapitano per unu paŝo eniris la manĝaĵejon kaj muĝe ordonis al Bunty malsupreniri.

La knabo sin lasis fali ĝisplanke, angore tima kaj kuntiriĝanta.

“Ĉiam liaj manoj forprenas kaj ŝtelas kaj lia lango mensogas,” diris Marta Tomlinson, malafable rigardante la malfeliĉan infanon.

Du, tri, kvar, kvin koleraj batoj de la rajdvipo en la manoj de la Kapitano kaj Bunty sin savis sub lia brako kaj ploraĉante fuĝis laŭ la trairejo kaj el la malantaŭa pordo.

For trans la kampojn li iris, singultante je ĉiu paŝo, sed sin forte gratulante ĉar ĉion ĉi li trasuferis pro iu alia.

Li apenaŭ estus kredinta, se iu antaŭdirus al li ke li kapablas fari ion tiel absolute noblan, kaj la penso konsolis lin eĉ dum la vundoj kaj skrapaĵoj doloris. Li penis subpremi siajn singultojn kiam li atingis la kabanon, kaj eĉ tiucele ŝovis duonan manplenon da korintoj en ŝian buŝon.

Sed estis tre larmoplena, skrapita, malgaja vizaĝo kiu ekaperis denove ĉe la malfermaĵo proksime de Judi.

Ŝi ne moviĝis, kvankam ŝiaj okuloj estis duone malfermaj, kaj li genuiĝis kaj skuis ŝian ŝultron delikate.

“Jen kelkaj aĵoj, Judi—ĉu vi ne manĝos ilin?”

Ŝi iomete skuis la kapon.

“Havu iom da konservita bovaĵo, aŭ kelkajn korintojn; estas iom da ŝelaĵo ankaŭ, se vi preferus.”

Ŝi skuis la kapon denove. “Bonvolu forpreni ilin,” ŝi diris kun ĝemeto.

Rigardo nekredeme disreviga ekaperis sur lia malgranda, varmigita vizaĝo.

“Kaj mi duone mortigis min por ilin akiri! do vi ja estas malŝatinda knabino!” li diris.

“Ho nepre foriru,” Judi ĝemis, movante la kapon senripoze de flanko al flanko. “Ho kiel miaj piedoj doloras! ne—mia kapo, kaj mia flanko—ho! Mi ne scias kio ĝi estas!”

“Mi batiĝis tie kaj tie,” Bunty diris, indikante la lokojn kaj forviŝante per la maniko de sia bluzo larmojn de varma sinkomato. “Mi havas skrapvundojn ĉie pro tiu aĉa kakto.”

“Ĉu vi supozas ke estas ankoraŭ multaj mejloj?” Judi diris tiel rapidmaniere ke la vortoj ŝajnis ĉiuj kuniĝi, “Mi jam marŝis centojn kaj centojn, kaj ankoraŭ ne atingis la hejmon. Mi supozas ke estas ĉar la mondo estas ronda, kaj baldaŭ mi enmarŝos la lernejan pordegon.”

“Ne estu idioto!” Bunty diris raŭke

“Vi estu tutcerta, Mariana, ke vi absolute nenion iam diros pri la afero; mi fidis al vi, kaj se vi restos fidinda mi povos iri hejmen kaj reveni kaj neniuj iam scios. Kaj ĉu vi povus prunti al mi du ŝilingojn? Malmulte restas al mi. Bunty, vi egoisma porko, kial vi ne alportas al mi iom da lakto! Mi petegis kaj petegis al vi jam de horoj kaj mia kapo faras turnofajraĵojn pro manko de ĝi”

“Havu iom da konservita bovaĵo, Judi kara—ho Judi, ne estu tiel stulta kaj malafabla, ĉar mi estis preskaŭ mortigita pro vi,” Bunty diris, penante per tremaj fingroj ion ŝovi en ŝian buŝon.

La knabineto sin rulis kaj ekmurmuris denove.

“Sepdek sep mejlojn,” ŝi diris, “kaj mi marŝis dek unu hieraŭ, kio faras dek unu cent kaj sepdek sep—kaj ses la antaŭan tagon ĉar mia piedo havis haŭtvezikon—tio sumas

dek unu cent kaj okdek tri. Kaj se mi marŝos po dek mejloj tage mi atingos la hejmon post dek unu cent kaj okdektrioble dek, tio sumas milon kaj—kaj—ho! kiom tio estas? kiom ajn tio estas? Bunty, vi aĉa porketo, ĉu vi ne povas diri al mi kiom tio estas? Mia kapo tro doloras por labori, kaj mil kaj iom pli da tagoj— tio estas jaro —du jaroj—du jaroj—tri jaroj antaŭ ol mi estos tie. Ho, Pip, Meg, tri jarojn! ho Estera! petu lin, petu lin permesi al mi veni hejmen! Tri jaroj—jaroj— jaroj!”

La lasta vorto estis preskaŭ ŝrikita kaj la infano barakte ekstaris kaj penis marŝi.

Bunty kaptis ŝiajn brakojn kaj tenis ŝin. "Volu lasi min," ŝi diris raŭke. Mi neniam atingos la lokon je la nuna rapideco. Tri jarojn kaj tiomege da mejloj!”

Ŝi ŝovis lin for kaj provis marŝi trans la subtegmentejon, sed ŝiaj kruroj ŝancelis sub ŝi kaj ŝi falis en sensentan amaseton.

“Meg—mi venigos Meg,” diris la knabeto per trema, tima voĉo kaj li glitis suben tra la malfermaĵo kaj rapidis al la domo.

<<<<<>>>>

## Ĉapitro XI

### La Forvaginto

Li eniregis la ĉambron de Meg kvazaŭ li estus turno-ventego.

“Ŝi estas en la malnova kabano, Meg, kaj mi ne estas certa, sed ŝajnas al mi, ke ŝi freneziĝis; kaj mi ricevis la plej teruran batadon, kaj estis preskaŭ mortigita de la kanto pro ŝi, kaj nenion konfesis. Krome, ŝi tamen ne povas manĝi la konservitan bovaĵon. Ŝi forkuris—kaj ho, mi estas certa ke ŝi estas freneza!”

Meg levis palan, alarmitan vizaĝon de sur la kusenoj.

“Pri kiu en la mondo temas—kio?”

“Judi,” li diris kaj eksingultis pro ekscitiĝo. “Ŝi estas en la malnova kabano, kaj mi kredas ke ŝi estas freneza!”

Meg malrapide eliris la liton, iel surmetis vestojn kaj ankoraŭ tute ne kredante la strangegan rakonton mal-supreniris la ŝtuparon kun li.

En la enirejo ili renkontis sian patron kiu estis tuj elironta.

“Ĉu vi resaniĝis?” li diris al Meg. “Vi devintus resti en la lito dum la tuta tago; tamen povas esti ke la aero pli bone efikos sur vin.”

“Jes,” ŝi respondis aŭtomate.

“Mi estos for dum la cetero de la tago, efektive mi atendas ke nek Eŝtera nek mi revenos antaŭ morgaŭ matene.”

“Jes,” ripetis Meg.



“Ne permesu al la infanoj eksplodigi la domon, kaj vin bone gardu— ho! kaj sendu Bunty al la lito sen ia manĝo— mi estas certa ke li jam havis sufiĉon por unu tago.”

“Jes,” diris la knabino denove, nur konstatinte la signifon de sia fina promeso kiam Bunty feroce flustris, “Perfidulino” ĉe ŝia kubuto.

En tiu momento la kariolo brue alvenis, kaj la Kapitano foriris, je ilia nedirebla senpeziĝo.

“Nu, kiun frenezaĵon vi rakontis?” Meg diris, sin turnante al sia frateto. Mi supozas, ke estas unu el viaj malveraĵoj, vi malbonuleto.”

“Venu rigardi,” Bunty replikis, kaj li kondukis tra la kampojn. Mezvoje ili renkontis Pip kaj Nell, revenantaj pli frue ol atendite de la fiŝkaptista ekskurso. Nelli malgaje aspektis kaj marŝis je sekura distanco malantaŭ sia frato.

“Same efikus se oni kunprenus fonografon kiel Nellion,” li diris, kun velkige malestima rigardo al tiu misfarulino. “Ŝi babilis la tutan tempon kaj ne donis al mi ŝancon por ekmordo fiŝa.”

“Judi estas hejme,” diris Bunty, preskaŭ krevante pro la graveco de sia scio. “Ankoraŭ neniu krom mi vidis ŝin. Mi preskaŭ mortis pro grimrado inter kaktosoj kaj tra fenestroj kaj tiel plu, kaj mi ricevis batadojn de patro kaj ĉion, sed mi neniam diris nenion, ĉu ne, Meg? Mi havas ŝin ĉi tie supre en la kabano kaj mi iris kaj alportis konservitan bovaĵon kaj ĉion—nur rigardu miajn kruojn.”

Li fiere montris siajn cikatrojn, sed Meg plurapidis, kaj Pip kaj Nell sekvis en nekredema miro. Ĉe la kabano ili haltis.

“Estas inventaĵo de Bunty,” Pip diris malestime. “Ankoraŭ ne estas la 1a de Aprilo, mia filo.”

“Venu rigardi,” Bunty respondis, rapide suprenirante. Pip

sekvis kaj eligis mallaŭtan krion; post ili Meg kaj Nell kun iom pli da malfacilo barakte suprengrimpis, kaj la sceno estis kompleta.

La deliro jam ĉesis, kaj Judi kuŝis kun larĝe malfermitaj okuloj lace rigardantaj la ĉevronojn.

Ŝi suprenridetis al ili dum ili ariĝis ĉirkaŭ ŝin. “Se Mahometo ne venos al la monto,” ŝi diris kaj poste tusadis dum du-tri minutoj.

“Kion vi estas farinta, Ju, injo?” Pip diris, kun stranga tremo en la voĉo. La vido al lia preferata fratino, maldika, kavavanga, elĉerpita, venkis lian knaban virecon. Ia malsekeco eniris liajn okulojn.

“Kiel vi venis, Ju?” li diris, palpebrumante ĝin for. Kaj la knabino donis al li sian antaŭan vervan rigardon.

“Nu, poneon oni ne tenas ĉe la lernejo krom tiu de la tibioj,” ŝi diris. Ĉu vi pensis ke mi luus balonon?”

Ŝi tusis denove. Meg surgenuiĝis kaj brakumis sian maldikan fratineton.

“Judi,” ŝi vokis, “ho Judi, Judi! mia kara, mia kara!” Judi iom ridis kaj nomis ŝin kara stultulino, sed baldaŭ ŝi ekploris kaj singultis konvulsie. “Mi estas tiel malsata,” ŝi fine diris patose.

Ili ĉiuj ekaktivis, kvazaŭ ili venigus la magazenojn de Sidnejo por kontentigi ŝin. Poste Meg sidiĝis denove kaj levis la malglatan, buklan kapon sur siajn genuojn.

“Vi iru, Pip,” ŝi diris, “kaj alportu vinon kaj glason, kaj en la vianda gardoŝranko estas iom da rostita kokidaĵo; mi iom havis por mia lunĉo, kaj Marta diris ke si metos la restaĵon tie ĝis vespermanĝo; kaj rapidu, Pip.”

“Mia vorto!” Pip diris al ŝi kaj li malsuprenglitis kaj flugrapidis transen al la domo.

“Je mia vorto!” diris Marta, lin renkontante en la enirejo kvin minutojn poste, karafo el facetita kristalo sub la brako, vinglaso tenita inter la dentoj per la tigo, pleto de malvarma kokidaĵo en la mano kaj staketo da buterpanoj flanke de la kokidaĵo. “Je mia vorto! Kaj kion post tio, mi volas scii?”

“Ho fermu la buŝon kaj pendigu vian avinon!” diris Pip, ŝove preterpasante ŝin kaj irante al la kabano per ĉirkaŭa vojo pro timo ke ŝi eble rigardas.

Li genuis apud sia fratineto kaj manĝigis ŝin per pecetoj de kokidaĵo kaj trinketoj da vino, kaj karesis ŝiajn taŭzitaĵojn kaj kvindekfoje nomis sin ‘injo’ kaj petegis al si manĝi iometon pli kaj ankoraŭ iometon pli.

Kaj Judi, kaptinte la rigardon en la brunaj, malsekaj okuloj, supre de ŝi, manĝis ĉion kion li proponis, kvankam la unua buŝpleno preskaŭ sufokis ŝin; ŝi estus manĝinta ĝin eĉ se ĝi estus la haŭto de elefanto, ĉar ŝi amis tiun knabon pli ol ion ajn en la mondo kaj li estis tiel ĉagrenita. Ĝi bone efikis sur ŝin ankaŭ, kaj ŝi eksidis kaj post iom da tempo parolis tute nature.

“Tion vi ne devintus fari, vi vere ne devus, injo; kaj mi eĉ ne kuraĝas pensi kion la patro diros al vi.”

“Li tute ne scios,” si respondis rapide. “Mi neniam pardonos tiun kiu informus lin. Mi povas resti nur semajnon. Mi bele organizis la tutan aferon, kaj mi loĝos ĉi tie en ĉi tiu subtegmento; patro absolute neniam venas ĉi tien, do estas tute sekure, kaj vi ĉiuj povos alporti al mi manĝaĵojn. Kaj tiam, post semajno,”—si vespiregis—”Mi devos reiri.”

“Ĉu vi vere marŝis tiom da mejloj nur por vidi nin?” Pip diris, kaj denove lia voĉo strange sonis.

“Mi havis unu-du rajdojn survoje,” si diris, “sed mi piediris preskaŭ la tutan distancon, mi venadis jam de preskaŭ semajno.”

“Kiel vi kuraĝis? Kie vi dormis, Judi? Kion vi manĝis?”  
Meg ekkriis, tre ĉagrenite.

“Mi preskaŭ ne plu memoras,” Judi diris, denove fermante siajn okulojn. “Mi petadis manĝaĵojn ĉe malgrandaj dometoj kaj iafoje oni invitis min tranokti, kaj mi havis tri ŝilingojn kaj ses pencojn tio iom longe sufiĉis. Nur dufoje mi dormis ekstere, kaj mi havis mian jaketon tiam.”

La vizaĝo de Meg estis pala de konsterniĝo pro la aventuro de ŝia fratino. Supozeble neniu knabino en la tuta mondo krom Judi Woolcot entreprenus tian frenezetan projekton kiel marŝi tiom da mejloj kun nur tri ŝilingoj kaj ses pencoj en la poŝo.

“Kiel vi povis?” estis la sola rimarko kiun ŝi sukcesis fari.

“Mi komence ne intencis marŝi la tutan distancon,” diris Judi kun apenaŭ perceptebla rideto. “Mi havis sep ŝilingojn en paperpeco en mia poŝo aldone al la tri ŝilingoj kaj ses pencoj, kaj mi sciis ke tio pagus iom longan trajnveturon. Sed mi perdis tion post la ekiro kaj ne volis reiri nur pro tio, do kompreneble mi devis piediri.”

Meg delikate tuŝis ŝian vangon.

“Ne estas mirinde ke vi tiel maldikiĝis,” ŝi diris.

Ĉu la Finoj Burton ne distrumpetos pri via malapero?” Pip diris. “Estas mirinde ke ili ne skribis al patro por informi ke vi vin pafis for.”

“Ho! Mariana kaj mi bone sekurigis tion,” Judi diris kun rideto de rememora plezuro. “Mariana estas mia speciala amikino, vi komprenu, kaj agas laŭ miaj ordonoj. Kaj ŝi loĝas ĉe Katoomba.”

“Nu?” diris Meg, ne komprenante, kiam paŭzis la fratino. “Nu do, vi komprenu ke multaj el la knabinoj suferis pro morbilo, do oni petis sendi Marianan hejmen, pro timo ke ŝi

infektiĝos. Kaj ŝia patrino invitis min ankaŭ iri tien dum du semajnoj; do Fino Burton skribis al patro kaj demandis ĉu permesate? Kaj mi skribis kaj petis ĉu mi ne rajtas veni hejmen anstataŭe dum tiu periodo?”

“Li tute ne informis nin,” Meg diris mallaŭte.

“Ne, mi s’pozas ke ne. Nu li responde skribis kaj diris ‘ne’ al mi kaj ‘jes’ al ŝi. Do iun tagon oni sekure kondukis nin sur la trajnon kaj aranĝis ke oni atendu nin ĉe Katoomba. Kaj la penso saltis en mian kapon dum ni veturis. Kial mi ne kaŝe venu hejmen? Do mi diris al Mariana ke ŝi klarigu al la gepatroj ke mi iris hejmen anstataŭe, kaj ke ŝi certigu ke oni nenion suspektos por eviti ke oni skribu al Fino Burton. Kaj la trajno haltis ĉe Blackheath, kaj mi tuj elsaltis, kaj ŝi daŭrigis la vojaĝon al Katoomba, kaj mi venis hejmen. Tamen, vi komprenu, ĉar mi estis perdinta mian monon restis neniam alternativo krom piediri.”

Meg glatigis la polvokovritan, nodhavan, implikiĝon de ŝiaj haroj.

“Sed vi ne povos loĝi ĉi tie ekstere dum semajno,” ŝi diris per maltrankvila voĉo. “vi ricevis aĉan tuson pro dormado ekstere, kaj mi estas certa ke vi malsanas. Ni devos informi patron pri tio; mi tamen petegos al li ne resendvi.”

Judi vigliĝis, flamokula.

“Se vi tion faros, mi forkuros, jam ĉinokte kaj marŝos al Melburno aŭ Jerusalemo, kaj neniam denove vidos iun el vi! Kiel vi povus tion fari, Meg! Post kiam mi faris ĉion ĉi por ke li ne sciu! Ho, kiel vi povus?”

Ŝi sin incitis ĝis forta ekscitiĝo.

“Nu, oni simple resendus min jam morgaŭ—vi tion bone scias, Meg. Ĉu ne estas vere, Pip? Kaj mi krome trafus en kaĉon ĉe la lernejo. Mia plano estas bele simpla. Post semajno

da amuziĝo ĉi tie kun vi mi simple reiros—vi ĉiuj povos prunti al mi iom da mono por pagi la trajnveturadon. Mi simple renkontos Marianan ĉe Katoomba je la 25a; ni ambaŭ reiros al la lernejo kune, kaj neniu ion scios. Mia tuso ne gravas; vi scias ke mi ofte suferis pro tuso hejme kaj tio neniam malutilis al mi. Kondiĉe ke vi portos al mi abundon por manĝi, kaj restos kun mi, estos al mi bone.”

La ripozo kaj vido al amataj vizaĝoj jam bone efikis sur ŝin. Ŝia vizaĝo aspektis jam malpli streĉita, kaj iom pli da sana koloro grade vidiĝis sur ŝiaj vangoj.

Meg spertis maltrankviligan senton pri respondeco, kaj la sento ke ŝi devus informi iun forte premis sur ŝin; sed finfine ŝi cedis al la juĝo de la aliaj.

“Vi ne povus esti tiel malnobla, Meg,” Judi estis dirinta varme kiam ŝi petegis permeson informi Esteran.

“Tia malkaŝulo!” Bunty aldonis.

“Tia hontinda perfidulo!” Pip diris.

Do Meg silentis, sed estis ege malfeliĉa.

<<<<<>>>>

## Ĉapitro XII

### Vergado

La kvaran tagon de la loĝado de Judi en la subtegmento Marta Tomlinson rimarkis al sia kunservistino kaj kunsuferanto, Bridget, ke ŝajnas al ŝi ke tiuj malbenitaj infanoj konspiras por sendi ŝin “trans la riveron”.

La digesto de Bridget ne bone funkciis en tiu mateno, kaj ŝi simple respondis ke ŝi supozas ke la karaj etuloj nur sentas deziron vidi ŝin en taŭga loko.

Mi eble devus klarigi al vi, ke “trans la rivero” signifis Gladesville, kiu estas mensa malsanulejo de Sidnejo.

Multaj aferoj kaŭzis al la malfeliĉa Marta kredi pri tia konspiro. Ekzemple, kiam ŝi iris iun matenon, aranĝi la liton de Pip kiel kutime, la litkovriloj estis ĉiuj malaperintaj. La blanka ekstera kovrilo estis glate sternita super la matraco, sed nenie troveblis la lankovriloj, littukoj kaj kapkusenoj. Ŝi serĉis en ĉiu ebla kaj neebla loko, pridemandis la infanojn, kaj eĉ sin turnis al Estera sed la mankantaj objektoj restis netroveblaj.

“Estas viro en korduroja pantalono kiu ĉiuvespere ŝtelvagis proksime de la domo,” diris Pip, melankolie rigardante sian kovrilomankan liton. “Mi ne mirus se li iel respondecas en la afero.”

Tiu sugesto estis nete malbonvola, ĉar la viro en korduroja pantalono estis la plej fervora kaj favorata admiranto de Marta.

La sekvantan tagon malaperis la lavpelvo el la ĉambro de Meg, kaj post tio seĝo el la infanejo, kaj tapiŝopeco de la interŝtuparo por ne mencii tiajn bagatelajn aferojn kiaj tepoto, oleolampo, taso kaj teleroj, duono de ŝinko kaj tuta bakitaro da zingibraj biskvitoj.

La malaperoj mistifikis Martan, ĉar la objektoj ŝajnis malaperi dum la infanoj estis en la litoj: kaj kvankam ŝi suspektis ilin kaj ilin daŭre gvatis, ŝi ne povis trovi rektan pruvon pri ilia kulpeco, nek eĉ ian motivon por ilia forpreno de tiaj objektoj.

Post ĉiu nova malapero de objekto Pip demandis ĉu la viro en korduroja pantalone estis vizitinta la domon en la antaŭa vespero. Kaj ĉar ĉiam estis tiel, Marta nenion povis fari krom kolere rigardi la knabon kaj altamentone forlasi la ĉambron.

Iun nokton la malgranda ŝakotablo forflugis de la infanejo.

Frue en la sekvanta mateno, dum ŝi balais la tapiŝon, Pip kolapsis sur la nukon de Marta kaj ŝajnigis plori,

“Ni neniam aprecas violon...” li diris per rompita voĉo. “Ha Marta, Marta, ni neniam sentis kian trezoron ni havas en vi ĝis nun, kiam via ĉeesto inter ni baldaŭ finiĝos.”

“Ĉesu arlekeni!” ŝi diris, minacante lin per la balailstango.

“Kaj mi ne intencas lasi la postenon, do ne tiel pensu. Tiam tro mankus iu por bridi vin. Ne, vi ne vin senigos de Marta Tomlinson tiel baldaŭ, mia vireto.”

“Sed ĉu li ne propetos vin, Marta?” li diris mole, “Lia domekipado ja devas esti preskaŭ kompleta nun. Li ankoraŭ ne forprenis kaserolon, nek gladilon, certe, sed ariĝis ĉio alia, Marta, kaj mi pretas diri al vi konfidence, ke mi pripensas ĉu mem donaci al vi gladilon kiel geedziĝan donacon, tiel ke vi ne devos atendi ĝis li forprenos tion.”

“Ĉesu petoli!” diris Marta denove, ŝovante al li la balailan



kapon rekte en la vizaĝon kaj preskaŭ lin sufokante per polvo. “Sendito de la diablo mem vi ja estas.”

Fore en la subtegmento iĝis jam tre komforte. Du lankovriloj pendigitaj surmure fortenis trablovojn. La lito de Judi, mola kaj varma, estis en angulo; ŝi disponis pri seĝo sur kiu sidi, tablo ĉe kiu manĝi, eĉ pelvo en kiu sin lavi. Kaj tuttage ŝi havis kunulo(j)n kaj preskaŭ ĉiam tutnokte. Unufoje Meg forŝteliĝis, ŝlosinte sian litĉambron, kaj dividis la liton en la subtegmento; unufoje Nelli iris, kaj en alia nokto Pip prenis lankovrilojn kaj faris al si provizoran litaĵon inter la pajlo. Ili vizitadis ŝin en kiu ajn horo de la tago, rampante laŭ la knaranta ŝtupetaro unu post alia kiam ajn ili povis neobservate malaperi.

Okazis ke la gubernistino estis ricevinta dusemajnan forpermeson por flegi malsanan patrinon, do la knabinoj kaj Bunty liberiĝis de deĵoroj. Pip iradis malfrue al la lernejo kaj frue revenis, kaĵolate de Estera, kiam eblis, senkulpigajn leteretojn. Li eĉ unu tagon senpermeso forestis de la lernejo, akceptante tute bonhumore vergadon pro tio.

Judi ankoraŭ pale kaj lace aspektis kaj ŝia tuso iom ĝenis; sed ŝi estis rapide reakiranta sian vervon kaj ege ĝuis sian aventuron.

La sola malavantaĝo estis la prema spacomanko de la subtegmento.

“Vi nepre devos organizi aferojn por ke mi povu fari kuron,” ŝi diris decideme iun matenon. “Mi certas, ke miaj kruroj mallongiĝas pro manko de ekzercado. Antaŭ la fino de la semajno mi estos jam forgesinta kiel marŝi.”

Pip ne kredis ke tio eblas. Meg petegis ke ŝi ne risku sin malkovri; sed Bunty kaj Nell estis tute favoraj.

“Meg povus paroli kun patro,” Bunty diris, “kaj Pip povus

turmentadi Generalon ĝis Estera timus lasi la ĉambron kaj intertempe mi kaj Judi povus malsuprenpafi nin kaj kuradi kaj esti jam revenintaj antaŭ ol vi liberigus ilin”.

Judi skuis la kapon. “Tio estus ege banala,” ŝi diris. “Se mi iros mi volos resti for kelkan tempon. Kial ni ne pikniku ĉe la rivero?”

“Ho jes, ni tion faru!” kriis Bunty, brilokula.

“Mi estas certa ke ni povos organizi tion, precipe ĉar estas sabato kaj Pip ne devas iri al la lernejo,” Judi daŭrigis, rapide elpensante la aferon. “Du el vi povus iri por havigi manĝaĵojn. Diru al Marta ke vi ĉiuj piknikos—ŝi estos kontenta ne devi prepari tablon por ĉefmanĝo—tiam vi povos pluiri. Du aliaj povos kontroli ke estas sendanĝere dum mi malsupreniros kaj transiros la kampojn, kaj jam atinginte la angulon de la vojo ni estos sekuraj.

Ŝajnis tute fareble, kaj oni baldaŭ faris ĉiujn preparojn. Pip gardostaris ĉe la kabano, kaj akceptis la respondecon certigi ke Judi foriros sen malkovro kaj Bunty sin lokis sur la malantaŭa verando por gvati kaj fajfi trifoje se minacus ia danĝero.

Oni instrukiis ke li atendu kvaronhoron laŭ la kuireja horloĝo, kaj tiam, se ĉio bone marŝis, li devos kunporti la grandan tesitelon kaj panbulon, kaj kuratingi la aliajn survoje.

Estis tede atendi tie, kaj li staris sur unu piedo, kvazaŭ meditema kortbirdo, kaj pripensis la eventojn de la pasintaj kelkaj ekscitaj tagoj.

Li sentis deprimon ĉe la koro sed apenaŭ sciis kial. Eble estis pro la mensogo kiun li diris al la patro kaj ankoraŭ ne konfesis, ĉar la ĉevalo iom grave lamis, kaj lia kuraĝo forfluetis ĉiufoje kiam li pripensis tiun rajdvipon.

Eble estis la reakcio post la granda ekscitiĝo. Aŭ eble estis persista sento de maljusta traktado pro la mizera rikolto de

gloro kiun elvokis ĉe la aliaj liaj kuraĝaj faroj por helpi al Judi. Oni verŝajne nur malalte taksis ilin, kaj, ja, eĉ ridis ĉiufoje kiam li aludis pri ili aŭ publike atentigis pri siaj vundoj. Du-tri el la skrapvundoj sur liaj kruroj estis vere severaj, kaj dum li atendostaris li malsuprenrulis siajn ŝtrumpojn kaj rigardis ilin per kompatemaj okuloj kaj kun io simila al singulto en la gorĝo.

“Neniu bone taksas min!” li murmuris, kaj unu el liaj ĉiam pretaj larmoj plaŭde falis sur etenditan nudan kruron. “Judi preferas Pip kaj li tute ne grimpis la kakton; Meg opinias min mensogulo, kaj Nelli diras ke mi estas manĝavida porko — neniu min juste aprezas!”

Nova, granda, dika larmo formiĝis kaj falis.

“Ĉu vi enradikiĝis tie?” voĉo demandis.

Lia patro, kiu fumis ĉe la malferma fenestropordo lin estis observinta kaj miris pri lia malofta kaj ega kvieto.

Bunty saltetis kulpece, kaj suprentiris siajn ŝtrumpojn.

“Mi ne faras nenion,” li diris, ofendite, post momenta paŭzo.

Bunty ĉiam pekis kontraŭ gramatiko kiam li nervoziĝis. “Absolute nenion. Mi estas ironta al pikniko.”

“Ha ĉu?” diris la kapitano. “Vi aspektis kiel se vi aŭ primeditus iun freŝan misfaron, aŭ malĝojus pri iu malnova— pri kiu el la du temis?”

Bunty iom paliĝis, sed denove asertis, ke li “ne faris nenion”.

La Kapitano estis en mallaborema, turmenta humoro, kaj lia malgranda, dika, malpura filo estis la sola proksima viktimo.

“Mi proponas ke vi venu ĉi tien kaj konfesu absolute ĉiun misfaron kiun vi ĉisemajne kulpis,” li diris serioze. “Mi povas

disponigi tutan matenon kaj jam estas tempo ke mi iom esploru vian konduton.” Bunty alproksimiĝis la indikitan seĝobrakon, sed ankoraŭ pli paliĝis.

“Ha, nun ni estas komfortaj. Nu, estis la ŝtelo el la manĝaĵejo je mardo, jen unu,” li diris kuraĝige. “Nu, do?”

“Mi n—ne faris n—nenion alian,” anhelis Bunty. Li sentis ke ĉio ĉe li sendube perdiĝis kaj ke oni jam malkovris la epizodon pri la kriketa pilko. Li eĉ nerveze ĉirkaŭrigardis por kontroli ĉu rajdvipo apudestas. Jes, tie estis tiu arĝente ornamita, apartenanta al Estera, malzorge ĵetita sur seĝon. Li trovis la tempon fervore deziri ke Estera estus ordema virino.

“Ĉu absolute nenion, Bunty? Ĉu vi diras la veron?” diris lia patro per impona voĉtono.

“Mi l-ludis per g-globetoj”, li diris per tremanta voĉo. “Kiel mi p-povis ion p-pafi kontraŭ v-v-via ĉevalo?”

“Ĉevalo? ha!” diris lia patro. La afero eklumiĝis kaj lia vizaĝo severiĝis. “Kion vi ĵetis kontraŭ Mazeppo por lamigi lin? Respondu al mi tuj.”

Bunty horortreme ekrigardis la vipon.

“N-n-nenion,” li respondis, “a-a-absolute n-nenion. Mia k-k-kriketpilko estis s-supre en la st-stalo. Mi nur l-ludis per globetoj.”

La Kapitano malforte skuis lin.

“Ĉu vi lamigis Mazeppon per la kriketpilko?” li demandis severe.

“N-n-ne, mi n-neniam,” flustris Bunty, ĝislipe blanka. Tion dirinte li duone pentis kaj aldonis; “Ĝi nur ruliĝis el mia p-p-poŝo kaj M-Mazeppo preterpasis kaj f-f-frapis per ĝ-ĝisian k-kruron.”

“Diru la veron aŭ mi draŝos vin preskaŭ ĝismorte,” la Kapitano diris, ekstarante kaj kaptante la vipon de Estera, “Nu

do, sinjoro, ĉu estis vi kiu lamigis Mazepon?”

“Jes,” diris Bunty, brue ekplorante kaj freneze penante eviti la vipon.

Tiam, dum la frapoj falis sur liajn malfeliĉajn ŝultrojn li plenigis la aeron per siaj konataj vekrioj: “Ne estis mi, mi ne kulpis!”

“Vi malŝatinda juna hundaĉo!” diris la patro dum momenta paŭzo ĉar lia brako doloris pro la ekzercado de la vipo. “Mi aŭ draŝos el vi ĉi mizeran emon al mensogado kaj poltroneco aŭ mortigos vin dum la provo.” Sibladis la vipo. “Kiaspeca viro vi fariĝos, viaopinie?” Denove siblis. “Mensogi nur por konservi netuŝita vian malbenitan haŭton!” Siblilis foje kaj denove.

“Vi mortigis min!—ho vi jam mortigis min! Mi scias ke vi tion faris!” kriis la malfeliĉega infano, sin tordiĝante ĉiudirekten surplanke. “Ne estis mi, ne estis mia kulpo—iom vergu la aliajn!”

Sibladis denove. “Ĉu vi opinias ke la aliaj tiel fie mensogis? Pip neniam mensogis al mi. Judi prefere eltranĉus sian langon.” Sibladis. “Survoje al pikniko, ĉu? Vi povos pikniki en via ĉambro ĝis la morgaŭa matenmanĝo.” Siblado de la vipo. “Fu—iru for!”

Homa eltenemo atingis sian limon. La fina svingo de la vipo kaŭzis al liaj dolorantaj, tremantaj ŝultroj kaj dorso veran angoron. Li pensis pri la aliaj, feliĉaj kaj senzorgaj, ekstere en la sunbrilo, gaje plandumante riveren, neniel pensante pri liaj suferoj, kaj lia koro mem ŝajnis krevi pro la grandeco de sia amaro kaj malespero.

“Judi estas hejme!” li diris per sufoka, pasia voĉo. “Ŝi loĝas en la malnova kabano en la bovina kampo. Ve, ho ve! Oni kaŝas al vi la aferon. Ve, ve! Ŝi iras al la pikniko, kaj ŝi forkuris

el la lernejo.”

<<<<<>>>>

### Ĉapitro XIII Gastoj Sen Invito

La Kapitano malrapide paŝis tra la kampoj, la livistona\* ĉapelo kiun li portadis en la ĝardeno malantaŭen ŝovita for de lia frunto. Estis al li iom varme post la barakto kun sia dua filo, kaj estis pensema rigardo en liaj okuloj. Li ne kredis vera la finan rimarkon de Bunty, sed li tamen konsideris ĝin sufiĉe probabla por fari viziton al la kabano ne tute superflua.

Ne estis, cetere, ke li atendis trovi tie sian erarvagintan filinon, ĉar Bunty ja diris ke okazos pikniko ĉe la rivero, ĉu ne? sed li pensis ke eble estos ia spuro.

La pordo de la kabano malantaŭen svingiĝis sur siaj ebriaj ĉarniroj kaj la sunbrilo enverŝiĝis kaj faris strion el lumanta polvo trans la ejo.

Estis tie neniam signoj de loĝado, krom se oni konsideras tia harrubandon de Meg kaj iom da oranĝŝelo.

Li vidis la malfortikan, hejmfaritan ŝtupetaron ripozantan kontraŭ la truon en la plafono, kaj kvankam li kutime pli alte taksis la sekurecon de sia nuko ol faris liaj infanoj pri iliaj, li fidis sian sekurecon al ĝi. Ĝi knaris malbonaŭgure kiam li atingis la plej altan ŝtupon kaj trarampis en la subtegmenton.

Ĉiflanke de la vando estis ŝinkoosto, skatolo da domenoj kaj krevinta kapkuseno, nenio alia, do li marŝis pluen kaj rigardis transen.

“Tre komforte,” li murmuris, “Mi estus kontenta mem loĝi

ĉi tie mallongan tempon,” kaj eĉ eniris lian kapon la penso ke li tion faru, kaj estu tie kiel “surprizfesteno” kiam revenos Judi. Sed li forigis la ideon kiel neakordigeblan kun digno. Li rememoris aŭdi famojn pri malaperantaj mebloj el la domo, kaj preskaŭrideto venis en liajn okulojn kiam li vidis la malnovan tableton kun oleolampo kaj tepoto tie metitaj, la litajon kaj lavpelvon. Sed severa mieno ĝin sekvis. Ĉu sepdek sep mejloj ne estas sufiĉa obstaklo al la petolaj planoj de Judi? Kiel ŝi kuraĝis tiel spiti lin?, infano dek tri jara kaj li ŝia patro? Liaj lipoj kunpremiĝis misaŭgure kaj li malsupreniris kaj peze paŝegis reen al la domo.

“Estera!” li vibravoĉe vokis de la fino de la ŝtuparo.

Kaj “Venos, kara, post duonminuto,” responde malsupren flosis.

Duonminuto dekfoje preterpasis kaj tiam ŝi venis, la bela juna patrino kun sia ridvizaĝa fileto en siaj brakoj. Ŝiaj okuloj aspektis tiel teneraj kaj molaj kaj amemaj ke li forturnis sin malpacience; li bone sciis kiel estos; ŝi petos kaj petegos al li pardoni sian filineton kiam ŝi aŭdos, kaj kiam ŝi tiel hele kaj bele aspektas kiel ĝuste nun li povos nenion rifuzi al ŝi.

Li staris unu-du minutojn en profunda meditado.

“Kion vi volas, Johano?” ŝi diris, “Ho! kaj kion vi opinias? Mi ĵus trovis novan denton, duoblan— venu rigardi” Li venis, iom malvolonte, kaj ŝovis sian plej malgrandan fingron en la buŝon de sia filobebo.

Estera ĝin gvidis ĝis ĝi tuŝis etan malmolan substancon.

“La tria,” ŝi diris fiere; “Ĉu vi ne estas kontenta?”

“H’m!” li diris. Li ankoraŭ iom meditis, kaj post du-tri minutoj kunfrotis la manojn kvazaŭ li estus sufiĉe kontenta pri si mem.

“Surmetu vian ĉapelon, Estera, kaj tiun de la Generalo,” li



diris, ame frapetante la kapon de tiu sinjoreto, “Ni promenu ĝis la rivero; la infanoj piknikas tie, do ni povos esti certaj pri iom da teo.”

“Nu, jes, estos tre agrable,” ŝi diris, “ĉu ne, Bebĉjo, ĉu ne, dolĉa filo?”

Ŝi vokis al Marta, kiu estis senpolviganta la sidĉambron laŭ maniero bonhumore blinda kiu estis propra al ŝi.

“La ĉapelon de la Generalo, mi petas, Marta, la blankan sunĉapelon kun ligiloj; ĝi estas sur mia lito, mi kredas, aŭ sur seĝo aŭ ie—ho! kaj bonvolu ankaŭ malsuprenporti mian grandan kiu surhavas papavojn.”

Marta foriris, kaj post iom da serĉado revenis kun la kapvestoj.

Kaj Estera ligis la blankan sunĉapelon sur siaj propraj bukloj, krispaj haroj, kaj kaŭzis al la Generalo ride ĝojkrii ĉe sia sidloko sur la enireja tablo. Poste ŝi metis ĝin sur la kapon de la Kapitano kaj metis la livistonan sur tiun de sia filo kaj okupis kelkajn minutojn per ĉarma ludado tia.

Fine ili estis pretaj kaj transiris la enirejon.

“Sinjoreto Bunty estas enŝlosita en sia ĉambro; sub neniamaj cirkonstancoj malfermu la pordon, Marta,” estis la fina komando de la Kapitano.

“Ho, Joĉjo!” diris Estera riproĉe.

“Bonvole ne vin intermiksu,” li respondis, “Lasu al mi iom da libero en la regado de miaj propraj infanoj, Estera. Li estas malverema sentaŭguleto; mi hontas konfesi lin mia filo.”

Kaj Estera, meditante pri la multaj malfidindaĵoj de sia vicfilo, povis sin konsoli per la espero ke li profitos el la sperto.

Ili iris laŭ pli mallonga vojo tra la sovaĝejo por eviti la publikan vojon, kaj la blua, sunkisata, ridanta rivero etendiĝis antaŭ ili.

“Jen ili!” Estera kriis, “en la konata loko, kiel kutime; rigardu la fajron, dolĉa fileto; vidu la fumon, knabo kara—kvar kvin ili estas. Nu, kiun ili havas kun si?” ŝi diris mire, dum ili proksimiĝis al la grupo sur la herbo.

Antaŭ ol ili estis sufiĉe proksimaj por rekoni vizaĝojn la rondo ŝajnis subite sin rompi kaj disfali.

Unu el ĝiaj anoj sin turnis abrupte kaj fuĝis trans la herbon, saltante en la densajn pteridojn kaj vepron, kaj malaperis el la vido en malpli da tempo ol okupas la rakontado.

“Kiun ajn vi havis kun vi?” Estera demandis kiam ili atingis la infanojn.

Estis duonsekunda silento, post kio Pip ĵetis kelkajn lignopecojn sur la fajron kaj diris aplombe:

“Nur iu amikino de Meg, timema infano kiu ial timegas la patron. Mi supozas ke ŝi imagas ke soldatoj iradas kun siaj glavoj akriĝitaj, uzopretaj.”

Li ridis facilanime. Nell kunridis iom histerie kaj Bebinjo ekploris.

Meg, blankvizaĝa kiel la morto, ŝin levis kaj haste komencis rakonti al ŝi pri la tri ursoj por ŝin trankviligi.

Estera aspektis iom mistifikita, sed kompreneble neniel pense kunligis la forrapidantan figuron kun Judi.

Kaj la Kapitano ŝajnis rave blinda kaj sensuspekta. Li sin kuŝigis sur la herbo kaj lasis ke la Generalo rampadu sur li; li ŝercis kun Estera; li rakontis kelkajn epizodojn pri sia junaĝo, kaj eĉ tute ne ŝajnis rimarki ke lia aŭskultantaro ŝajnas malatenta kaj embarasita.

“Ĉu vi ne faris iom da teo?” Estera diris fine, “Ni tre ŝatas tesitelan teon kaj pensis ke vi nepre havos iom.”

“Bunty ne alvenis, li devis kunporti la tesitelon,” Pip diris

iom malafable. Li suspektis ke estas motivo por ĉi tiu granda afableco de lia patro kaj ne plaĉis al li esti ludobjekto.

“Ha,” la Kapitano diris serioze, “tio estas bedaŭrinda. Kiam mi foriris Bunty ŝajnis ne tre sana kaj pensis pasigi la ceteron de la tago en sia ĉambro”.

Pip aldonis hejtilojn al la fajro en obstina maniero kaj Meg donis timigitan ekrigardon al la patro kiu responde ridetis ame al ŝi.

Post horo da tiaspeca streĉa interrilato la Kapitano proponis ke oni revenu hejmen.

“Malvarmiĝas,” li diris, “Mi tre bedaŭrus se la novenaskita dento de la Generalo komencus sian vivon per dolorado—ni iru hejmen kaj kontentiĝu per tepota teo.” Do ili kolektis la ankoraŭ ne malpakitajn korbojn kaj sin formis en procesion. La Kapitano insistis ke Pip kaj Meg marŝu kun li kaj sendis antaŭen Bebinjon kaj Nell, unu ĉe ĉiu flanko de Estera, kiu alterne kondukis kaj portis la Generalon.

Ĉar la motivo por tiu aranĝo estis, kiel Pip sagace suspektis, malebligi interrilaton aŭ formadon de novaj planoj.

Kaj kiam ili alvenis hejme li invitis ilin ĉiujn veni en lian fumĉambron, malgranda kaj mallarĝa ejo enirata tra la manĝoĉambro.

Estera portis la Generalon al la supera etaĝo, sed la aliaj silente sekvis lin.

“Sidiĝu, Pip, mia knabo,” li diris afable. “Venu, Meg, faru vin hejmece, sidiĝu en tiu brakseĝo. Nell kaj Bebinjo rajtas okupi la kanapon.”

Ili ĉiuj sidiĝis senpove kie li indikis al ili, kaj tre streĉe rigardis lian vizaĝon.

Li elektis pipon el la vico super la kameno, fiksitis al ĝi novan buŝpecon, kaj zorge plenigis ĝin.

“Ĉar vi ĉiuj okupas mian ĉambron,” li diris per ĝentila voĉo, “mi bedaŭrinde apenaŭ povas iom komforte fumi ĉi tie. Mi poste venos kaj denove parolos al vi. Mi intencas fumi pipon en la malnova subtegmento en la bovina kampo. Ne miskondutu dum mia foresto.”

Li fajrigis alumeton, ekbruligis sian tabakon, kaj sen rigardo al la silentaj infanoj eliris la ĉambron, ŝlosante malantaŭ si la pordon.

Denove li transiris la kampojn, kaj denove ŝovis malferma la knarantan pordon. La oranĝŝelo kuŝis ĝuste kie li vidis ĝin antaŭe, nur ĝi estis iom pli seka kaj pli mortaspekta. La harrubando havis precize la saman nodon. La ŝtupetaro knaris en ĝuste la sama loko kaj denove minacis rompi lian nukon kiam li atingis la supron. La domenoj ankoraŭ estis tie, la ŝinkoosto kaj la kapkuseno okupis la samajn lokojn; la sola diferenco estis ke la unua nun havis nigran kovraĵon el formikoj, kaj la vento estis ludinta kun la kapkuseno kaj portis la plumojn ĉiudirekten.

Li transiris la plankon, ne delikate, sed per sia kutima, egalritma militista paŝado. Nenio moviĝis. Li atingis la vandon kaj rigardis transen.

Judi kuŝis trans la improvizita lito, dormante dormon de absoluta elĉerpiĝo post sia rapida fuĝo for de la rivero. Ŝi portis robon de Meg, kio aspektigis ŝin surprize longa kaj maldika; li miris pro la penso ke ŝi tiel multe kreskis.

“Ŝi kaŭzos senfinajn ĝenojn dum ŝi maturiĝos,” li diris duonvoĉe, forte sin kompatante pro tio, ke li estas ŝia patro. Poste granda kolero kaj inciteco leviĝis interne de li dum li observis ŝin tiel pace dormantan tie. Ĉu ŝi ĉiam estos perturbanto de lia paco? Ĉu ŝi ĉiam obstrukcos lin tiele?

“Judi,” li diris per laŭta voĉo.

La fermitaj palpebroj ŝire malfermiĝis, la nebulo de dormo kaj forgeso foriĝis de la malhelaj okuloj, kaj ŝi salte leviĝis, esprimo de absoluta hororo sur ŝia vizaĝo.

“Ĉu mi rajtas demandi kion vi faras ĉi tie?” li diris, tre malvarme.

Skarlata koloro fluis en ŝiajn vangojn, eĉ sur ŝian frunton, kaj poste malaperis, lasante ŝin blanka ĝis la lipoj, sed ŝi faris nenan respondon.

“Vi forkuris de la lernejo, mi supozas?” li daŭrigis per la sama senemocia voĉtono. “Ĉu vi havas ion pravigan por diri?”

Judi nek parolis nek moviĝis, ŝi nur kun malfermitaj lipoj rigardis lian vizaĝon.

“Ĉu vi volas defendi vian konduton, Helena?” li demandis denove.

“Ne, patro,” ŝi diris.

Ŝia vizaĝo portis lacan, streĉitan esprimon kiu, sub aliaj cirkonstancoj, eble estus tuŝinta lian koron, sed pro kolero li ne rimarkis ĝin.

“Absolute neniun pravigo aŭ defendo?”

“Ne, patro.”

Li sin movis en la direkton de la malfermaĵo.

“Trajno ekiros post horo kaj duono, kaj vi tuj revenos kun mi,” li diris per senemocia voĉo. “Mi antaŭzorgos ke oni tenu vin sub observado ĉe la lernejo ĉar vi ne estas fidinda. Vi ne revenos hejmen por la Kristnaska libertempo kaj probable ne por tiu de la sekvonta Junio.”

Tio egaligis al mortkondamno. La ĉambro kirliĝis antaŭ la okuloj de la knabino kaj en ŝiaj oreloj estis kantado kaj zumado.

“Venu tuj,” la Kapitano diris. Judi momenton retenis la spiron; tio jukigis al ŝi la gorĝon kaj ŝi komencis tusi.

Tia terura tusado, paroksismo kiu skuis ŝian maldikan korpon kaj kaŭzis al ŝi spasme spiri. Ĝi daŭris dum du-tri minutoj kvankam ŝi metis sian naztukon al la buŝo por peni ĝin haltigi.

Ŝi estis tre pala kiam ĝi ĉesis, kaj li unuafoje rimarkis la kavaĵojn en ŝiaj vangoj.

“Pli bone estus ke vi unue venu al la domo,” li diris, malpli severe, “por sciigi ĉu Estera havas ian medikamenton por tusoj.”

Tiam li siavice retenis la spiron kaj paliĝis sub la sunbronzon.

Ĉar la blanko de la naztuko kiun la infano forprenis de siaj lipoj surhavis skarlatajn timigajn makulojn.

<<<<<>>>>

\* Livistona ĉapelo: cabbage tree hat. Ĉapelo farita el la folioj de la brasikarbo (livistono).

## Ĉapitro XIV La Invito De La Bienisto

Do, malgraŭ ĉio ne estis kariolo por Judi, nek montara trajno nek hontiga reveno inter ŝiaj lernejoj kamaradoj nek perspektivo de longa sinsekvo da monatoj sen ferioj.

Sed anstataŭe ŝi ricevis varman, molan liton kaj delikatajn manĝaĵojn, kaj amajn voĉojn kaj senfinan flegadon. Ĉar la tro forta ekzercado, la neadekvata nutrado, kaj la du subĉielaj noktoj ja venigis la knabinon al danĝera stato. Unu pulmo grave inflamiĝis, diris la kuracisto; al li estas mistero, li diradis al ili, kiel ŝi tiel longe subpremis la malsanon; ordinara knabino subiĝus kaj enlitiĝus jam antaŭ longe. Li tamen ne konis la nevenkeblan spiriton kaj kuraĝon kiuj karakterizis Judi'n.

“Ĉu vi ne sentis doloron” li diris, konsternita trovi kune tian teniĝon kaj tiel seriozan fizikan staton.

“H'm, ĉe mia flanko iafoje,” ŝi respondis senzorge. “Ĉu baldaŭ mi povos forlasi la liton, doktoro?”

Ŝi faradis al li tiun demandon ĉiumatene kvankam, verdire, ŝi sekrete sin sentis ne tute sinfida pri la ideo denove stariĝi.

Estis malforto kaj laceco en ŝiaj membroj kiuj dubigis al ŝi ĉu ŝi kapablos multe kuradi kaj malpli rapidajn irmanierojn ŝi malestimis. Krom tio estis mordetanta doloro sub ŝiaj brakoj kaj doloregon ŝi sentis dum daŭris tusado.

Tamen ŝi ne estis sufiĉe malsana perdi intereson pri okazaĵoj kaj insistadis ke la aliaj informu ŝin pri ĉio kio okazis ekstere, kiu atingis la plej altan poentaron ĉe kriketludo, kiuj plantoj floras en ŝia propra disvaga ĝardenpeco, kiom da ovojn demetas la kokinoj en unu tago, kiel progresas la kobajoj kaj kanarioj kaj kiujn vestojn aŭ botojn lastatempe manĝis la nova trovhundo.

Bunty enportadis la blankajn musojn kaj la blindan francan kobajon kaj permesis al ili libere kuradi sur la litkovrilo; kaj Pip faris la plejparton de sia ĉarpentado sur malgranda tablo proksime por ke ŝi povu vidi ĉiun novan fazon kaj sugesti plibonigojn dumlabore.

Meg, kiu estis preskaŭ ĉesiginta sian kontakton kun Aldita, sin dediĉis al sia fratino kaj senrezerve servadis al ŝi; ŝi faris al ŝi ĉiaspecajn donacetojn—botsakon kun fakoj, sakon por broso kaj kombilo kun monogramo “J.W.” brodita per rozkolora silkfadeno; malgrandan kudrajokorbon ekipitan per kudrilolibreto kaj pinglokuseneto. Judi timis ke ŝi devos konvertiĝi al ordemaj kutimoj post la resaniĝo.

La plezuro kiun donis al ŝi tiuj modestaj donacoj starigis konkuremon inter la aliaj.

Dum tuta tago Pip malaperis, sed en la vespero li reaperis kaj paŝis al la litflanko kun fiero vizaĝo. Li estis konstruinta malgrandan tirkestaron, el kiuj kestoj tri efektive estis tireblaj se oni lerte manipulis ilin.

“Ne estas por pupvestoj,” li diris post kiam ŝi elĉerpis ĉiujn ordinarajn dankesprimojn, “ĉar mi scias ke pupojn vi malamas, sed en tiuj vi povos konservi ĉiujn viajn malgrandajn aĵojn, ĉu ne—harligilojn kaj fingringojn kaj tiel plu.”

Aŭdiĝis bruo de trenado ekster la pordo kaj baldaŭ Bunty envenis dorsantaŭe, tirante grandan strangan objekton.



Ĝi ŝajnis esti kvin aŭ ses pezaj tabuloj hazarde kunnajlitaj.

“Tio estas seĝo,” li klarigis, forviŝante la ŝviton desur sia frunto, “Ho! mi intencas meti iom da kanvaso transen, kompreneble, por ke vi ne trafalu; sed mi pensis montri ĝin al vi unue.”

La okuloj de Judi ridetis, sed ŝi varme dankis lin.

“Mi ne emis fari ian stultan aferon kiel faris Pip”, la junuleto daŭrigis, malestime rigardante la tirkestetojn, “Jen io vere utila, vidu; kiam vi ellitiĝos vi povos sidi sur ĝi, Judi, apud la fajro kaj legi aŭ kudri aŭ kio ajn. Vi preferas ĝin al tiu de Pip, ĉu ne?”

Judi respondis kun lerta evitemo tiel ke nek unu nek la alia ofendiĝu, petante ke oni metu la donacojn kun ĉiuj aliaj ĉe la litkapo

“Ja multajn objektojn vi havos por kunporti reen al la lernejo, Ju,” Nell diris, aldonante siajn kontribuojn en formo de kroĉeta manumparo kaj lana jako por pupo.

Sed Judi nur riproĉe ekrigardis ŝin kaj turnis sian vizaĝon al la muro dum la cetero de la vespero.

Jen kio forte turmentis ŝin dum ĉi longa dusemajno enlita—la penso pri lernejo en la estonto.

“Kio okazos al mi kiam mi resaniĝos, Estera?” ŝi demandis deprimate la sekvantan matenon kiam ŝia vicpatrino venis al ŝia lito. “Ĉu li rezervas por mi aron da batadoj? Kaj ĉu mi devos reiri la unuan semajnon?”

Estera trankviligis ŝin.

“Vi tute ne reiros en la nuna trimestro, probable ankoraŭ ne en la venonta, Judi kara. Li diras ke vi foriros kun iuj el la aliaj por ferii ĝis vi plifortiĝos, kaj inter ni mi pensas tre dubinde ĉu vi iam reiros.”

Post la forigo de tiu timego Judi resaniĝis pli rapide,

mirigante eĉ la kuraciston per sia kapablo refortiĝi.

Kiam jam pasis tri semajnoj ŝi denove povis iradi endome, maldika kaj grandokula, sed denove gaja kaj eĉ petolema. La vizitoj de la kuracisto ĉesis; li diris ke ĝis nun ŝi bone resaniĝis, sed devus sperti medioŝanĝon kaj esti forkondukita je iom granda distanco de la mara aero.

“Permesu al ŝi kelkmonate liberumi, Woolcot,” li diris, lastafoje vizitante; “Liberiĝi de la malsano kaj rericivi la forton kaj karnon postulos tempon.”

“Sendube, sendube; ŝi tuj foriros,” la Kapitano diris. Li ne povis forgesi la ŝokon kiun li ricevis en la malnova subtegmento antaŭ kvin-ses semajnoj kaj konsentus eĉ se oni ordonus al li forkonduki ŝin por restado ĉe la Saharo.

La kuracisto estis informinta lin ke la malutilo al ŝiaj pulmoj estis grava.

“Mi ne diras ke finfine ŝi mortos pro tuberkulozo,” li estis dirinta, “sed ĉiam estas risko en ĉi seriozaj kazoj. Kaj Fraŭlineto Judi estas tia sovaĝa, neripozema subjekto; ŝi ŝajnas ĉiam esti en absoluta febro de vivado kaj posedi kapablon por ĝojo kaj malĝojo kian ne konas malpli vervaj temperamentoj. Zorgu pri ŝi, Woolcot, kaj iam ŝi fariĝos admirinda virino—jes ja, honorinda virino.”

La Kapitano fumis kvar grandajn cigarojn en la soleco de sia kabineto sen atingi decidon pri kiel plej bone “zorgi pri ŝi”.

Unue li pensis ke li sendos ŝin kun Meg kaj la guvernistino al la montaro dum kelka tempo, sed tiukaze restus malfacilo pri lecionoj por la cetera tri. Li ja povus sendi ilin al lernejo aŭ dungi guvernistinon, sed jen denove problemo por konsideri pri la kosto.

Ne estus akceptebla ke la knabinoj iru sen akompano, ĉar Meg sin montris nur malsaĝulineto malgraŭ siaj dek ses jaroj;

kaj Judi bezonis flegadon. Tiam li rememoris ke ankaŭ Estera malsane aspektas; la flegado kaj zorgoj pri la Generalo kune troŝarĝis ŝin kaj ŝi aspektis nur ombro de sia kutime gaja memo. Li sciis ke li vere devus forsendi ankaŭ ŝin, kaj la infaneton, kompreneble.

Kaj denove la kosto.

Kaj denove la aliaj infanoj.

Li rememoris ke alproksimiĝas la Kristnaskaj ferioj; kio okazus pri la domo se Pip kaj Bunty kaj la du plej junaj knabinoj estus sen disciplino kaj estus neniu respondeca? Li forte suspiris kaj forigis la cindrojn de sia kvara cigaro sur la tapiŝon.

Tiam la poŝtisto alvenis laŭ la kaleŝvojo kaj preter la fenestron. Li rigardis supren kun larĝa rideto kaj tuŝis sian kaskon kvazaŭ tre kontenta. Preskaŭ ŝajnis, ke li sciis ke en unu el la leteroj kiujn li tenis kuŝas la solvo de la problemo kiu sulkigis la frunton de la Kapitano.

Kvina cigaro estis eltirata el la ujo, sulko ekprofundiĝis ĝuste super la maldekstra brovo kaj ekdoloro de io simila al podagro jam rezultigis unu-du vortojn de “fremda lingvo”, kiam Estera eniris kun rideto sur la lipoj kaj malfermita letero en la manoj.

“De la patrino,” ŝi diris. “Al Yarahappini mankas verovo, verŝajne kaj ŝi deziras ke mi iru tien kaj kunprenu la Generalon por kelksemajna restado”.

“Ha!” li diris.

Tio certe solvus unu el la malfacilaĵoj. La loko tre malproksimis, certe, kaj tamen ĝi estis la malnova hejmo de Estera, kaj ĝin ŝi ne vidis de post sia edziniĝo. Tie ŝi rapide refortiĝus.

“Ho, kaj Judi ankaŭ.”

“Haaa!” li diris.

Du el la sulkoj sin forigis de lia frunto.

“Kaj Meg, ĉar mi menciis ke ŝi pale aspektas.”

La Kapitano remetis la cigaron en la ujon. Li forgesis ke ekzistas tia afero kia podagro.

“La invito ne povus esti pli oportuna,” li diris. “Nepre akceptu; nenio povintus esti pli bona; kaj la loko havas ege sanigan klimaton. La aliaj infanoj povas—”

“Ho, patro aparte postulas ke Pip iru ankaŭ, ĉar li estas tia fripono.”

“Miavorte, Estera, viaj gepatroj ja havas grandan emon al filantropio. Ĉu iu alia estas inkludita en la invito?”

“Nur Nell kaj Bunty kaj Bebinjo. Ho, kaj la patrino diras, ke se vi povos iam veni por kelktaga pafĉasado vi ja scias ke ŝi estos kontenta vin vidi.”

“La gastamo de Aŭstraliaj grandbienuloj estas mondfama, sed ĉiokaze rompas ĉiujn antaŭajn rekordojn, Estera.” La Kapitano stariĝis kaj streĉis la membrojn kun teniĝo de homo liberigita el premsonĝo. “Nepre akceptu por ĉiu. Ili mem respondecu pri la rezultoj; sed mi timas ke Yarrahappini estos pli malgaja kaj multscia loko antaŭ la monatfino.”

Sed ĝuste kiagrade pli malgaja aŭ kiom pli multscia li ja ne konjektis.

<<<<<>>>>

## Ĉapitro XV Tricent Mejlojn Per Trajno

Ili plenigis tutan kupeon—kvankam unu sidloko ja vakis, sed aliaj vojaĝantoj verŝajne ne emis okupi ĝin post rapida ĉirkaŭrigardo al ili ĉiuj.

La tuta sep, kaj nur Estera kiel gardanto —Estera en rozkolora bluzo kaj marista ĉapelo kun vizaĝo same hela kaj petolema kiel tiu mem de Pip.

La Kapitano venis por adiaŭi ilin kun Patriĉjo prizorganta la valizaron. Li jam aĉetis la biletojn—du plenajn por Estera kaj Meg, kaj kvar duonajn por la aliaj. Bebinjon oni ne provizis eĉ per duona— kio multe indignigis ŝin private—tio estis ofendo kontraŭ ŝiaj kvar kaj duono da jaroj, ŝi opiniis, iri senpage same kiel la Generalo.

Sed la kosto de tiuj pecetoj de kartono malgaje aspektigis la Kapitanon. Li ricevis nur dek ok pencojn de restmono el la dek pundoj kiujn li transdonis; ĉar Yarrahappini ja randis al la Fora Forejo.

Li elspezis la dek ok pencojn por ilustritaj gazetoj kiuj montris ke li ne tre alte taksas la literaturan guston de sia familio; kaj li provizis Esteran per broŝurita romano —sur kiu estis bildo de sinjorino en verda robo kiu svenas en la brakojn de sinjoro purpure vestita, kaj Meg per la “Saltanta Rano” de Mark Twain, ĉar li lastatempe rimarkis ian melankolion en ŝiaj okuloj.

Sonoriloj sonoris kaj fajfilo kriĉis, portistoj ĉirkaŭrapidegis kaj adiaŭojn oni diris ĉu gaje, ĉu malgaje, laŭ la cirkonstancoj.

Estis virino sur la kajo kiu ploris en ia kviete malespera maniero dum knabino kun malgajaj, amaj okuloj sin klinis al ŝi el la fenestro de duaklasa vagono; estis brunvizaĝa bienulo en ĉapo el skota drapo kaj pantofloj, al kiu la tricent mejla veturo estis evento ne pli notinda ol ĉefmanĝo; kaj estis junulo ironta selekti terpecon por bieno kaj pensanta ke Anglio apenaŭ pli malproksimas ĉar liaj edzino kaj infano mansvingas al li adiaŭon antaŭ unujara foresto. Estis sportuloj irontaj ducent mejlojn serĉe al koturnoj kaj valabioj, kaj vagonoj plenaj de sinjorinoj revenantaj al la sovaĝejo post ilia jara aŭ duonjara vidalvido kun la modo kaj mondumo en Sidnejo; kaj estis la ok pri kiuj ni interesiĝas, ariĝantaj ĉirkaŭ la pordo kaj fenestroj, ridetantaj kaj mansvingantaj bonhumorajn adiaŭojn al la Kapitano.

Tiu tute ne aspektis malgaja dum la trajno aferece forbruis—efektive, li laŭiris la kajon kun preskaŭ gaja sinteno, kiel se la perspektivo pri dumonata fraŭleco ja ne estus sen plusoj.

Estis la sesa kaj duono vespere kiam ili ekiris, kaj ili devis atingi Curlewis, kiu estis la fervoja stacio plej proksime al Yarrahappini, ĉirkaŭ la kvina en la sekvanta mateno. Dormkupeo por tiom da personoj tro kostus; sed en la valizrako kun la valizoj estis kelkaj rulitaj lankovriloj kaj du-tri aerkusenoj pretaj por la lacaj horoj. La perspektivo pri tiom da horoj en la trajno ŝajnis rava al ĉiuj la junaj vojaĝantoj; neniu el ili krom Judi ĝis nun veturis pli ol kvardek ĝis kvindek mejlojn kaj al ili ŝajnis tute rava la penso pri daŭra rapidado dum mallumo kiel ankaŭ dum la taga lumo.

Sed longe antaŭ la deka iliaj revoj sin montris trompaj. Nell kaj Bebinjo kverelis pri la plenblovigo de la aerkusenoj kaj estis tro lacaj kaj malbonhumoraj repaciĝi. Pip estis batinta Bunty surkape sen vera kaŭzo, kaj reciproke ricevis du piedbatojn; la kapo de Judi doloris, kaj ja estis neverŝajne ke la bruo kuracos ĝin. Meg laciĝis de rigardado en la moviĝantan mallumon kaj demandis al si ĉu Alan rimarkos ke ŝi nuntempe neniam veturas per la riverboato kaj la kompatinda malgranda Generalo plenigadis la varman aeron per protestoj en formo de laŭtaj muĝoj, kontraŭ la nekutima traktado kiun li ricevis.

Estera estis demetinta liajn tagajn vestojn kaj faris lin pentrinda en noktorobeto el kremkolora flanelo kaj roza lana ĵaketo.

Kaj dum duonhoro li bonhumore submetiĝis al transprenado kaj tiklado kaj duonsufoko per kisado. Li eĉ permesis al Nell mordeti liajn rozajn piedfingrojn laŭvice kaj diri surprizan kvanton da sensencaĵoj pri porketoj kiuj iris al bazaro kaj faris simile absurdajn aferojn.

Li apenaŭ kontraŭis kiam okazis malkonsento pri la posedo de lia persono, kaj Bunty firmtenis lian kapon kaj korpon dum Nell forte tiradis al liaj kruroj.

Sed iom poste, kiam Estera aranĝis por li liteton sur unu el la sidlokoj kaj provis kuŝigi lin sur ĝin li ekkonsciis pri siaj plendmotivoj.

Hejme li havis svingiĝantan liteton kun oraj stangetoj al kiuj palpebrumi ĉe la piedo—li ne povis kompreni kial li estu senigita je ĝi kaj devigata akcepti lankovrilon trioble falditan anstataŭe. Li ankaŭ kutimiĝis al milda lumo, kvieta ĉambro kaj averta ŝ! ŝ! kiam oni senpense faris eĉ la plej malgrandan bruon.

Ĉi tie granda flava lampo daŭre flamis la tutan tempon kaj

ĉiuj la bruuloj ĉe kies manoj li tiom suferis restis proksime.

Do li levis sian voĉon kaj veis. Kaj kiam li trovis ke plorado ne alportis lian liteton kun oraj stangoj kaj la malgrandajn pendantajn kvastojn ĉe la moskitoretaroj li altigis sian voĉon du tonojn, kaj kiam eĉ tiam Estera nur daŭre frapetadis lian ŝultron kvietige li ekmuĝis absolute surdige.

Nelli pendigis ĉiujn siajn longajn buklojn antaŭ lia vizaĝo por altiri lian atenton sed li firmitenis ilin malice kaj tiris ĝis ŝiaj okuloj pleniĝis per larmoj. Estera kaj Meg kantis lulkantojn ĝis langodoloro. Judi provis lule porti lin tien kaj reen en la mallarĝa spaco sed li rigidigis sin en ŝiaj brakoj kaj mankis al ŝi forto teni lin. Fine li ekdormis, elĉerpita, profunde vespirante, kun intermikso de malĝojaj singultetoj.

Post tio oni trovis Bunty dormanta sur la planko kun la kapo sub sidloko kaj devis levi lin al pli komforta dormloko; kaj Bebinjo rektadorse sidanta en angulo balancis la kapon simile al malgranda roza kaj blanka lekanteto sur kiu la suno tro arde brilis.

Unu post unu la longaj horoj forpasis; ĉiam pli antaŭen tra la silenta, dormanta kamparo rapidis la ruĝokula trajno, flankenirante laŭ zigzagaj kurbiĝoj, perdante rapidon dum suprenirado, kure transirante la senfinajn ebenaĵojn.

La nigrumo iĝis griza kaj pli pale griza kaj dum sennombraj mejloj unutona serio de malaltaj eŭkaliptoj sin ŝovis inter la trajno kaj la ĉielo. Suprensaltis la suno kaj la mondo iĝis mola kaj rozkolora kiel vekiĝinta bebo. Poste la grizo fortiĝis denove kaj la rozaj tremantaj lumoj forcedis kaj pluvo falis—diluve, frapante kontraŭ la tremantaj fenestrovitroj, freneze kirlogita antaŭen per kruda matena vento kiu flugis malsupren de la montoj. Tia subpremita, malbrilokula, plataspekta oko ili estis kiam ili elverŝiĝis sur la



kajon ĉe Curlewis kiam venis la kvina horo. La malseka aero tusigis Judi'n kaj oni rapide kondukis ŝin en la atendejon kaj ĉirkaŭvindis ŝin per lankovrilo.

La trajno elŝutis iliajn kofrojn kaj valizojn kaj denove for-rapidis, lasante ilin senkonsolaj kaj malgajaj, postrigardantaj ĝin, ĉar ŝajnis ke neniu venis akcepti ilin.

La bruo de malsekaj radoj trairantaj flakojn, la kraksono de vipo, la ritma paŝado de ĉevalaj piedoj tiris ilin ĉiujn denove eksteren, rigardantaj preter la blanka fervoja palisaro ĝis la vojo.

Tie troviĝis granda kovrita breketo\* gvidata de larĝa flava pluvmantelo kun viro ie interne, kaj alta kabrioleteto de kiu grimpis altega viro.

“Patro!”

Estera elkuris en la pluvon. Ŝi brakumis la gutantan pluvmantelon kaj sin alkroĉis al ĝi dum unu-du minutoj. Eble estis tio kio faris ŝiajn vangojn kaj okulojn tiel malsekaj kaj brilaj.

“Knabineto—malgranda Estera infano!” li diris kaj preskaŭ levis ŝin de sur la tero dum li kisis ŝin, kvankam Meg konsideris ŝin alta.

Jen li rapidigis ilin ĉiujn en la kabrioletojn—kvin en unu kaj tri en la alia. Restis ankoraŭ dudek kvinmejla veturado.

“Kiam vi lastafoje manĝis?” li demandis; la deprimaj aspektoj de la infanoj vere malfeliĉigis lin. “Patrino sendis al vi biskvitojn kaj sandviĉojn sed kafon aŭ ion alian varman ni ne povos ricevi ĝis ni hejmeniĝos.”

Je la naŭa, Estera diris al li, ĉe Newcastle, sed ĝi estis tiel broge varmega ke ili devis lasi la plejparton en la tasoj kaj rapidi denove entrainiĝi. La ĉevaloj ricevis vipan instigon kaj traflugis la kotajn vojojn je rapido kiun Pip, malgraŭ sia laceco,

ne povis ne admiri.

Sed estis tre malseka, malĝoja veturo kaj la Generalo ploris preskaŭ senĉese de komenco ĝis fino, kio multe ĉagrenis Estera'n ĉar lia avo lin vidis por la unua fojo.

Fine, kiam ĉiu eksentis ke la pacienco elĉerpiĝas, alta blanka bariero rompis la unutonecon de gutantaj bariloj.

“Hejme!” Estera diris ĝojplene. Ŝi saltigis la Generalon sur sia genuo.

“Knabeto Blua, via panjo defalis de tiu bariero kiam ŝi estis trijara.” ŝi diris, ame rigardante ĝin dum Pip svinge ĝin malfermis.

Oni denove plaŭdis tra la pluvo; la radoj nun iradis senbrue ĉar la vojon kovris malsekaj falintaj folioj.

“Ho, kie estas la domo?” Bunty diris, ekrigardante sub la brako de Pip ĉe la kondukbenko, kaj nenion vidante krom senfina perspektivo de eŭkaliptoj. “Mi kredis ke vi diris ke ni jam estas tie, Estera.”

“Ho, la ĉefpordo ne estas tute tiel proksime de la kradpordo kiel ĉe Misrule,” ŝi diris. Kaj ja tiele estis.

Pasis dek kvin minutoj antaŭ ol oni eĉ vidis la kamentubojn kaj ankoraŭ alian barieron oni devis malfermi.

Gruza kaleŝvojo nun, nete prizorgata, altaj buksheĝoj ĉirkaŭis la florbedojn, sovaĝejo el rozujoj kiu plaĉis al Meg, du lignosplitaj tenisludejoj, nun akve kovritaj.

Poste la domo.

Nur la verandon ili rimarkis; tiel larĝa ĝi estis, same larĝa kiel ordinara ĉambro kaj dise estis kuŝseĝoj kaj seĝoj, kaj tabloj, hamakoj svingiĝis de la anguloj, densa verdfolia grimpaĵo kun pluvoblovita glicineo formis la eksteran muron.

“Ho-o,” diris Pip “ho-o, mi ja estas rigida, ho-o, diru, kion vi faras?”

Ĉar Estera estis metinta sian fileton sur lian genuon kaj saltis el la breketo kaj supren la ŝtupojn de la verando.

Tie troviĝis maljunulineto portanta grandan dommastrinan antaŭtukon. Estera tiris ŝin en siajn brakojn kaj ili interkisis kaj kroĉiĝis unu al la alia ĝis ambaŭ ploris.

“Mia knabineto!” singultis la maljunulineto, glatigante per fervoraj manoj la malsekajn harojn kaj pli malsekajn vangojn de Estera.

Kaj Bunty, kiu sekvis proksime, rigardis de la altstatura formo de sia vicpatrino al tiu tre malgranda de ŝia patrino kaj ridis.

Estera kuris reen al la breketo, prenis la Generalon de Pip, kaj salte suprenirante la ŝtupojn denove, metis lin en la brakojn de ŝia patrino.

“Li ja estas dikulo, ĉu ne?” Bunty diris, dividante ŝian fieron; “nur rigardu liajn kruojn.”

La maljunulino sidiĝis dum minuto sur la plej malseka seĝo trovebla kaj brakumis lin proksimen al ŝi.

Sed li pugnigis siajn malvarmajn manetojn kaj baraktis por sin liberigi kaj kriegis al Estera.

Sinjoro Hassal estis malpleniginta la veturilojn kaj ankaŭ li supreniris la ŝtupojn.

“Ĉu vi ne intencas doni al ili iom da matenmanĝo, patrineto?” li diris, kaj la maljunulino preskaŭ faligis sian nepon pro konsterniĝo.

“Ho ve!” ŝi diris. “Nu, nu! Nur pensi pri tio! Sed tiaĵoj forgesigas onin.”

Post dek minutoj ili ĉiuj portis sekajn vestojn, sidis en la varma mangoĉambro kaj komencis matenmanĝegi.

“Mi ja malsatis!” Bunty diris. Lia buŝo plenis de rostpano kaj li detranĉis la supron de sia kvara ovo, dume rigardante el

la okulangulo ujon kiu tenis mielon en unu fako kaj densigitan kremon en alia.

“La karaj malnovaj teleroj!” Estera levis la sian, ĝin jam malpleniginte kaj ame inspektis la blujn rozojn tie bildigitajn, “Kaj pensu ke kiam mi lastafoje manĝis el unu mi—”

“—Estis novedzineto kun la vualo malantaŭenŝovita for de via vizaĝo,” la maljunulino diris, “kaj ĉiu rigardis dum vi solene tranĉis la geedziĝokukon. Nur du rompiĝis depost tiam—ho jes, Hannah, la servistino kiu venis post Emily, forrompis la tenilon de la sukerujo kaj forigis pecon de la forverŝujo.”

“Kie staris patro?” Meg diris. Image ŝi plenigis la ĉambron per geedziĝogastoj; la ŝinko kaj la kotletoj, la rostita pano kaj ovoj kaj pletoj da fruktoj fariĝis por ŝi granda blanka, kelketaĝa kuko kun arĝentaj folioj.

“Ĝuste tie supre kie sidas Pip,” Sino Hassal diris, “kaj li helpis al Estera kun la kuko, ĉar ŝi tranĉis ĝin per lia glavo. Tian truon vi faris en la tablotuko, Estera, mia absolute plej bona damaska kun la folioj de konvolvuloj, sed kompreneble mi riparos ĝin ho ve!”

Bebinjo estis renversinta sian kafon tute sur sin kaj sian teleron kaj sur Bunty kiu sidis apude.

Ŝi ekploris pro laco kaj nervozo pro la novaj homoj, kaj glitis de sia seĝo sub la tablon. Meg levis ŝin.

“Ĉu mi rajtas enlitigi ŝin?” ŝi diris; “ŝi estas preskaŭ elĉerpita.”

“Mi ankaŭ,” Nelli diris, formetante sian duone manĝitan platpaneton kaj malantaŭen ŝovante sian seĝon, “Ho, mi ja estas laca!”

“Ankaŭ mi.” Bunty finmanĝis ĉion sur sia telero kun sufokiga rapido kaj ekstaris. “Kaj tiu aĉa kafo kuradas en miajn

botojn.”

Do, ĝuste kiam la suno komencis rideti kaj forĉasi la pezajn larmojn de la ĉielo, ili ĉiuj enlitiĝis denove por kompensi pro la interrompita dormo kaj estis la sesa kaj la vespermanĝa horo antaŭ ol iuj el ili denove malfermis la okulojn.

<<<<<>>>>

\*Breketo: ĉevaltirata veturilo

## Ĉapitro XVI Yarrahappini

Yarrahappini sub sunbrilo, tia sunbrilo kia ŝovas la arĝentan strion en la termometro supren ĝis cent gradoj\*.

Tre malproksime je tri flankoj estis blua silueto de montetoj kaj bluaj molaj arboj.

Kaj proksime de la domo la arboj estis verdaj kaj belaj, kaj la floroj flamis bunte.

Sed la tuta vasta ebenaĵo inter ili estis bruna. Bruna sunsekigita herbo kun iuj eroj de malhela verdaĵo, interkrucita jen kaj jen per bariloj kiuj supreniris la montetojn kiuj kelkloke rompis la rektan linion de la ebenaĵo, kaj malaperis en la konkavaj lokoj kie prosperis altkreskega herbo kaj pteridoj. La ĉefbieno konsistis efektive el komunumeto da dometoj supre de monteto. Antaŭ jaroj, kiam Estera ne estis pli granda ol nun ŝia malgranda Generalo, estis nur kruda ruĝa tegtabula domaĉo ĉe la montetsupro kaj unu-du kabanoj el arboŝelo kiel kromdometoj.

Kaj S-ro Hassal estis sur sia ĉevalo de mateno ĝis vespero kaj pli forte laboris ol iuj du el siaj propraj vakeroj, kaj Sinjorino Hassal flankenmetis siajn fraŭlinajn artojn, sian brodadon, sian gitaron, siajn akvarelojn, kaj broslavis kaj kuiris kaj lavis tolaĵojn kiel jam faradis multaj pioniredzinoj, ĝis la sopire observata merkato de la lano venigis al ili plian prosperon.

Poste granda kampara domo malrapide sin levis ĝuste antaŭ la malnova dometo kun ĝia boteloborderita ĝardenloko kie nenio pli aristokrata ol karpobroto kaj skarlataj geranioj iam kreskis. Bela domo ĝi estis, kun multaj altaj ĉambroj, abundaj fenestroj kaj larĝaj verandoj. La malgranda ruĝa domo fariĝis kuirejo kaj dormĉambroj por la du servistinoj nun kaj estis ligita al la ĉefdomo per tegmentita trairejo.

Cent jardojn for estis duĉambra dometo kie loĝis la filo de angla baroneto kiu, kontraŭ pago de sepdek pundoj jare kaj provianto librotenis por Yarrahappini kaj porciumis la provianton.

Ankoraŭ pli malproksime staris dors-al-dorse du domaĉetoj el arboŝelo. Tettawonga, kurbdorsa maljuna aborigeno, loĝis en unu kaj malmulton faris krom fumi kaj ĉiumatene veterprognozi.

Antaŭ dudek jaroj li helpis fari solidan bazon por la ruĝa dometo kiu estis alveninta, jam konstruita, sur platĉaro tirata de bovoj.

Antaŭ dek kvin jaroj li mortigis per la propra tomahoko unu el du sovaĝejaj banditoj kiuj provis rabi Yarrahappini dum la foresto de la mastro, kaj li forportis al sekura loko la tremantan Sinon Hassal kaj malgrandan Esteran, kaj reveninte, per unu sola bato ĉe la kapo de la alia senkonsciigis lin ĝis venis helpo.

Do, kompreneble li estis gajninta la rajton okupi dometon kaj ricevi ĉiutagan porcion de provianto kaj la pipon kiu apenaŭ lasis liajn lipojn.

Du el la bienlaboristoj loĝis en la alia dometo kiam ili ne estis for en malproksimaj partoj de la bienego.

Proksime de la domo estis longa konstruaĵo el tegtabuloj kun peza pendserure ŝlosita pordo.

“Ho, ni eniru,” Nell diris, altirata de la granda pendseruro, “tio aspektas kiel trezordomo en libro—bonvolu permesi ke ni eniru, avineto?”

Ili estis esplorantaj ĉiujn la konstruaĵojn —la ses infanoj kune, sino Hassal, kiun ili ĉiuj nomis “avineto”, kio tre plezurigis ŝin, kaj Estera kun la knabeto.

“Vi devos iri kaj peti al S-ro Gillet,” la maljunulino diris, “li tenas la ŝlosilojn de la provizejo. Jen, en tiu dometo apud la cisterno, kaj parolu ĝentile, infanoj, mi petas.”

“Tia ĝentlemano,” ŝi diris mallaŭte al Estera, “tiel inteligenta kaj kulturita, nur bedaŭrindas ke li tiom drinkas.”

Meg kaj Judi iris kun Bebinjo sekvanta post ili tiel rapide kiel ebligis ŝiaj mallongaj kruroj.

“Envenu!” voĉo diris kiam oni frapis. Meg hezitis nerveze kaj viro malfermis la pordon. Tia altstatura, maldikega viro kun moviĝemaj, malfeliĉaj okuloj, bruna, larĝa frunto kaj nete tondita barbo.

Judi informis ke Sino Hassal sendis ilin por havigi la ŝlosilojn se li ne kontraŭas.

Li petis al ili eniri kaj sidiĝi dum li serĉos ilin.

Meg estis mirigita de la ĉambro, kiel klare montris ŝiaj bluaj okuloj, ĉar ŝi nur aŭdis paroli pri li kiel la provianto-tenanto. Estis librobretoj sur kiuj ŝi vidis verkojn de Shakespeare kaj Browning kaj Shelley kaj Rossetti kaj Tennyson, William Morris, kaj multaj aliaj kiujn ŝi neniam antaŭe vidis. Estis nete enkadritaj fotografajoj kaj gravuraĵoj pri anglaj kaj aliaj eŭropaj pejzaĝoj sur la muroj. Estis malgranda vazo el gravurita arĝento sur breto kun kelkaj pasifloroj en ĝi. La tablo kun la restaĵoj de matenmanĝo sur ĝi estis same nete aranĝita malgrandskale kiel tiu kiun ŝi ĵus lasis en la granda domo.



Li revenis de la interna ĉambro kun la ŝlosiloj. “Mi timis ke mi mismetis ilin,” li diris, “La meza malfermas la pendseruron, Fino Woolcot, la dika el latuno estas por la du ladaj ujoj kaj la longa el ŝtalo estas por la ŝranko.”

“Multajn dankojn, mi timas ke ni interrompis vin meze de via matenmanĝo,” Meg diris, ekstarante kaj ruĝiĝante ĉar ŝi pensis ke li rimarkis ŝian miron pri la librobretoj.

Li neis la ĝenon kaj tenis malferma la pordon al ili kun sinklino kiu havis en si iom da eleganteco, almenaŭ tiel pensis Meg, sin demandante kiel tio ligiĝas kun amaskvanta salumita bovaĵo kaj ladskatoloj da faruno. Li observis ilian foriron trans la herbo—almenaŭ li observis Meg en ŝia delikata somera muslino kaj palblua zono, Meg en sia granda, ombra pajloĉapelo kun la glatbrila lanuga harplektaĵo pendanta ĝis ŝia talio.

La longaj nigraj kruroj kaj ĉifita batisto de Judi aspektis neniel pentrindaj.

Sino Hassal malfermis la pendŝlosilon de la tenejo.

Kia ĥoro de “ho!” kaj ~’ha!” venis de la infanoj!

Bebinjo neniam antaŭe en sia vivo vidis tiom da sukero kune en unu loko; ŝi aspektis kiel se tre plaĉus al ŝi disponi pri la enhavo de la ladskatolego dum unu-du horoj.

Kaj la sekvinberoj! Estis granda ligna kesto plenplena da ili—ĉirkaŭ kvardek funtoj, konjektis Sino Hassal kiam oni demandis sin.

Bunty kaŝe arigis manplenon kaj enpoŝigis ilin dum ĉiuj rigardis la monton da kandeloj.

“Hejme faritaj? mia kara, nu jes, kompreneble,” la maljunulino diris. “Neniel mi uzus aĉetitajn kandelojn, nek aĉetitan sapon.”

Ŝi montris al ili la longajn flavajn sabrikarojn, pur-

odorajn, kun aliaj pli rafinitaj kaj palkoloraj por tualeta uzado.

Ŝinkoj kaj lardigitaj flankoj de porkoj dense pendis de la ĉevronoj. “Tiuj estas ŝafaj ŝinkoj,” ŝi diris, indikante unu fakon. “Tiujn mi provizas al la vakeroj.”

Pip volis scii ĉu oni intencis ke la provizoj sufiĉu por la cetero de iliaj vivoj, ĉar la kvanto ŝajnis sufiĉi; li miregis aŭdante ke oni ree stokis sesmonate.

“Dudek ĝis tridek viroj inklude la limrajdistojn kaj vakerojn ĉe diversaj partoj de la bieno, kaj duoble tiom dum tempoj de ŝaftondado aŭ apartigo, por ne mencii la oftajn ‘sunsubirulojn’\* similas al nutrado de armeo, miaj karaj,” ŝi diris, “kaj krom tio jen mi ankaŭ devis provizi por vi ĉiuj—aparte por Bunty.”

Ŝiaj grizaj okuloj briletis gaje dum ŝi rigardis tiun malgrandan junulon.

“Vi povas rehavi ilin,” Bunty diris iom malafable. Li eltiris seson da sekvinberoj el sia poŝo. “Mi pensis ke tio ne ĉagrenos vin ĉar vi havas tiom multajn; hejme ni nur havas botelplenon.”

Je tio la maljunulino karese frapetis lin surkape, malfermis ladskatolon kaj plenigis liajn manojn per figoj kaj daktiloj.

“Kaj ĉu vi devas ĉiutage kuiri por ĉiuj tiuj viroj?” Meg diris, demandante al si kie troviĝus sufiĉe granda bakforno.

“Ho, ne!” la maljunulino respondis, “Ho, tute ne; ĉiu viro ĉion faras por si en sia propra kabano; ili eĉ ne ricevas panon, nur porciojn da faruno por fari al si dampron. Krom tio ili ricevas de ni fiksitan kvanton da viando, teo, sukero, tabako, kandeloj, sapo kaj unu-du aliaj aĵoj.

“Kie vi tenas la lanon kaj aliajn aferojn?” diris Pip, kiu havis animon tro altan por hejmfarita sapo kaj metalaj trempiloj por kandeloj. “Mi ne povas vidi barakon aŭ ion

similan.”

Sino Hassal informis lin ke tiuj troviĝas fore unu mejlon, apud la rivereto, kie ĝustasezone oni lavas kaj tondas la ŝafojn. Sed pro la varmego eĉ Pip ne volis ĝuste tiam iri tien, do ili aliĝis al S-ro Hassal, lasante avineton kun Estera, la Generalo kaj Bebinjo kaj transiris al la brike konstruitaj staloj proksime.

Estis tri-kvar kabrioletoj sub ŝirmo sed neniuj ĉevaloj; ili ĉiuj troviĝis pli malproksime. Trans la kampojn ili iris kaj supreniris la monteton. Ses ĉevaloj respondis al la stranga fajfado de S-ro Hassal; la aliaj estis sovaĝaj, nedresitaj bestoj kiuj, je la ekvido al homoj, skuegis la kolharojn kaj rapidis for al la plej malproksimaj lokoj kie kreskis la arboj.

Pip faris elekton, grizulon kun longaj, rapidaspektaj kruroj kaj mallarĝa, bela kapo; plaĉis al li kredi sin kapabla juĝi pri ĉevaloj. Judi elektis nigran ĉevalon kun ruĝecaj, moviĝemaj okuloj, sed tion S-ro Hallal malpermesis ĉar ĝi estis nefidinda, do ŝi devis sin kontenti per bruna kun mola, satineca nazo.

Meg petis “ion tre trankvilan” per flustro neaŭdebla de Judi kaj Pip, kaj ricevis kabrioletotiran ĉevalon kiun rajdadis Sino Hassal antaŭ dek ok jaroj. Ĉiu besto devis esti je dispono de la gejunuloj dum ilia restado ĉe Yarahappini, sed oni rajdu antaŭ la matenmanĝo aŭ post la vespermanĝo por ricevi el tio plezuron; esti surĉevala dum la cetero de la tago estus netolereble. Nelli disreviĝis pri la ŝafoj—ege. Ŝi atendis trovi grandajn neĝblankajn belajn estaĵojn kiuj estus malsovaĝaj kaj permesus al ŝi meti rubandon ĉirkaŭ la kolon kaj konduki ilin laŭvole.

De la montetsupro la duan matenon ŝi vidis kampon post kampo, ĉiu kun bruna, malrapide moviĝanta amaso; ŝi malsuprenkuris tra la sunbrilo kun Bunty por rigardi ilin de pli proksime.

“Ho kiel bedaŭrinde!” ŝi ekkriis, efektivaj larmoj de disreviĝo saltantaj en ŝiajn okulojn kiam ŝi vidis la grandajn dikajn bestojn kun ilia longa, malpura, ĉifoneca lano.

“Atendu kelkan tempon, virineto,” S-ro Hassal diris, “nur atendu ĝis ni banos ilin.”

<<<<<>>>>

\*Cent gradoj (F) = 38 gradoj (C).

\*Sunsubirulo: Angle “sundowner”: nomado, vagulo (kiu alvenas al biendomo je sunsubiro, tro malfrue por labori sed petas vespermanĝon). (AE.V.)

## Ĉapitro XVII

### Bovoapartigo Ĉe Yarahappini

Pip apenaŭ povis dormi unu nokton, monaton post ilia alveno, pro pensado pri la bovoapartigo kiun oni projektis por la venonta tago. Li estis sopirinta al iu nova okupo ĉar li estis knabo al kiu vario tre gravis. Komence li dubis ke li iam laciĝos de kuniklopafado. S-ro Hassal estis doninta al li “absolute la plej fierindan” malgrandan pafilon, kaj Tettawonga akompanis lin la unuan tagon kaj tre malestime reagis al lia entuziasmo kiam li pafis du bestetojn.

“Bah al util’ paf’lo. Multa ul’ kunik’ en vepro. Fuĝi al nord’, fuĝi al sud’. Ĉie fuĝi. Bah al pikdrat’, ba’ al venen’ Bah!”

Tamen Pip ne lasis al si senkuraĝiĝi kaj vere kredis ke li multe helpis al Yarahappini-bienego pafante tiujn du molajn, rapidemajn brunajn estaĵojn. Li hejmenportis ilin kaj fiere montris ilin al la knabinoj, purigis sian perfekte puran pafilon kaj atake eliris denove la sekvantan tagon.

Tettawonga forprenis sian pipon el inter siaj lipoj kiam li vidis lin denove kaj ridis, laŭtan gakan ridon kiu ruĝigis Pip pro kolero.

“Kimbriki kaj kimbriki ankaŭ! Kunik’ li kati, karikari nun. Knab’ veni kun korborno pafil’, kunik’ ĝerund tuj, iri buri, herbo kreski, ŝafoj dikiĝi—ha, ha, hi, hi!”

Pip sufiĉe komprenis lian miksitajn anglalingvaĵojn por scii ke la alia priridas lin kaj li diris al li kolere ke li “fermu la

buŝon anstataŭ azenaĉi”.

Post tio li surŝultrigis la pafilon pri kiu li tiel superabunde fieris kaj foriris aliflanke de la pikdrata barilo kie troviĝis la ŝatata tereno de tiu malgranda ronĝulo kiu ne permesis al S-ro Hassal riĉiĝi.

Li mortpafis kvin tiutage, kvar la sekvantan, sep la postan, sed post kelka tempo li juĝis tion malekscita kaj ĉasis gilbirdojn kun pli da ĝuo sed malpli da ŝanco pri sukceso.

Ĉiu tago plenplenis de ĝuo kaj se nur ilin ne ĝenus la intensa varmo, tiu unua monato ĉe Yarahappini estintus unu de absoluta kontento kaj feliĉo.

Kaj nun la bovoapartigo.

La matenmanĝo okazis tre frue en la mateno de la grava okazaĵo; je la kvina kaj duono ĝi jam preskaŭ finiĝis kaj Pip, febre moviĝema, diris al S-ro Hassal ke li certas ke ili malfruos kaj maltrafos ĝin. Judi estis peteginta permeson partopreni, sed ĉiu diris ke tio estas eĉ ne pripensinda—efektive oni eĉ dubis ĉu estas konsilinde permesi al Pip alfronti la danĝeron kiu estas nedisigebla de la apartigo de la pli sovaĝa speco de brutoj pelataj de tre malproksime.

Sed volforte li venkis, kaj sin vestis tiel aferece ke S-ro Hassal ne estis sufiĉe malmolkora rifuzi lin.

Li malsuprenvenis al la matenmanĝo en Krimea ĉemizo kaj malnova pantalono el serĝo sekurigita ĉirkaŭ la talio per leda zono en kiu seninga ĉasponardo, ĵus akrigita, estis gaje enŝovita. Nenial li lasis sin persvadi aŭ porti jakon aŭ eningigi la tranĉilon.

La grizan ĉevalon oni venigis al la ŝtuparo de la verando kun la propra belega ĉevalo de S-ro Hassal. S-ro Gillet estis tie sur nete striglita ruana ĉevalo. Li havis tri brutvipojn, du tute dek ses futojn longaj kaj la tria malpli longa, kiun li enmanigis

al Pip.

La vizaĝo de la knabo radiis. “Hura, Ŝaŭm!” li diris, sin levante el sia selo kaj svingante ĝin ĉirkaŭ sian kapon, “Kiom vi donus por ŝanĝi lokojn?”

Li ŝovis siajn kalkanojn en la flankojn de la besto kaj furioze galopadis malsupren de la monteto.

Estis mejlo kaj duono ĝis la bovejo kaj regis forta ekscitiĝo.

Pip ne povis imagi de kie aperis tiom da viroj. Ĉeestis inter dudek kaj tridek, vakeroj, ŝaftondistoj “sur la vojeto de la valabio” laŭ ilia slanga esprimo por senlaboreco, du indiĝenoj aldone al Tettawonga kiu fumadis kaj observadis kun dormema ĝuo, kaj kelkaj el la aliaj bienaj laboristoj.

En la unua bovejo estis kvincent bovoj kiuj estis enpelitaj la antaŭan vesperon kaj en la nuna momento prezentis aspekton de maro da sovaĝe vipantaj vostoj kaj kornoj. Tiaj kornoj!—longaj, kurbiĝantaj, timigaspektaj aĵoj per kiuj ili freneze sangigis kaj batalis unu la alian ĉar la komunan malamikon ekstere ili ne povis atingi.

Dum kelkaj minutoj Pip ne emis forlasi la sekurecon de la ĉevala dorso. La tondrumo de hufoj kaj kornoj, la frenezaj kuroj de la furiozaj bestoj kontraŭ la barilo, igis lin ĉiumomente atendi ke ĝi falegos.

Sed ĉiuj aliaj jam iris “kakatui”—sidi sur la plej alta trabo de la enfermejo kaj rigardi malsupren al la frenezigitaj brutoj, do finfine li sekurigis la bridon de sia ĉevalo al arbo kaj singarde sekvis ilian ekzemplon.

Je subita signalo de S-ro Hassal la viroj surteriĝis interne de la enfermejo, unu duono laŭ unu flanko, la alia laŭ la kontraŭa. Oni celis igi unu-du centojn de la bovoj eniri la apudan enfermejon kies kradpordo estis larĝe malferma. Pip miregis pri la kuraĝo de la viroj, momente lia koro kvazaŭ

saltis en la gorĝon dum bovo post bovo provis kurataki ilin sed resonis la krakado de la potencaj brutvipoj kaj apartigaj stangoj, kaj bruto post bruto sin retiris en la mezon, la vizaĝo gutanta sangon.

Jen unu nigra brutego, kun muĝo kiu ŝajnis ŝanceligi la ebenaĵon, faris impetan kuregon al la malfermaĵo, sekvate de la tuta aro. Fulmrapide la viroj faris linion malantaŭe, kriegante, muĝante, krakigante la vipojn por peli ilin antaŭen. Pip mem ekstaris kaj kriegis, tute kaptita de ekscitiĝo. Jen li denove retenis la spiron,

S-ro Hassal kaj unu el la indiĝenoj singardeme ŝtelpaŝis al la malfermaĵo tra kiu la tumulta fluo de kornoj kaj dorsoj sin verŝis. Aro de fortegaj batoj de la vipoj devigis la lastan gvidbruton paŭzi momente kaj retropaŝi, malantaŭen ŝovante la amason kiu ĝin sekvis.

En tiu sekundo la du traŝovis la laborojn kaj la bovaro jam estis en du partoj.

Denove du vicoj de vakeroj, vipkrakado, muĝoj, sango, kornoj, feloj kaj kalkanoj supren kaj kvardek ĝis kvindek estis sekuraj en tria enfermejo, longa, mallarĝa ejo kun pordo ĉe la fino kondukanta en la lastan dividejon.

Pip informiĝis de S-ro Gillet pri la celo de ĉi tiuj disdividoj; iuj el la brutoj estis preskaŭ senvaloraj kaj estis transdonataj al aĉetonto po du da pundoj por ĉiu simple pro la kornoj, felo kaj tio kion oni povos ricevi por la karno. Aliaj estis unuarangaj dikaj bovoj, pretaj por la buĉisto kaj Sidneja disvendo. Ankoraŭ aliaj estis bonegaj bestoj, altvaloraj por eventualaj premioj kaj bredado kaj konsistigis apartan aron.

La viro ĉe la fina trairejo faris la ĉefgravan taskon elekti. Li estis armita per mallonga dika bastono, kaj dum la aliaj viroj pelis la brutojn liadirekten fulmrapide decidis al kiu klaso ili



apartenas. Peza frapo sur la nazo, abrupta, rapida serio de ili inter la okuloj kaj eĉ la plej perfortema bruto blinde saltis kien la pelanto celis. Dum la tuta tago la laboro daŭris kaj ĝuste kiam la grandaj varmaj purpuraj ombroj komencis sin sterni trans la ebenaĵo oni sekurigis la lastan barilon, la batalo finiĝis kaj la bestoj jam eniris la celitajn fakojn.

Pip manĝis sufiĉe da salumita bovaĵo kaj dampro por duone mortigi lin kaj trinkis pli da teo ol li iam malaperigis per unu fojo dum la tuta liaj dek kvar jaroj, sin svingis en sian selon imite al la plej aĝa vakero, kaj pensis ke se nur li povus havi nigran fiaspektan pipon similan al tiu de Tettawonga kaj la ceteraj laboristoj lia feliĉo estus perfekta kaj viro li jam estus.

Li hejmeniĝis laca kiel “dekduo da hundoj kaj unu dingo” kaj distris siajn fratinojn kaj Bunty per bildoplana priskribo pri la okazaĵoj de la tago, multvorte reliefigante sian propran lertecon kaj la multajn danĝerojn kiujn li eskapis.

La sekvantan tagon kaj Estera kaj Judi rajdis kun la aliaj al la bovejo por vidi la forirojn.

La plej bonaj el la kontingento, kiujn S-ro Hassal nur volis apartigi, ne vendi, estis pelitaj eksteren, tra la pordejo al siaj malnovaj kampoj kaj konataj paŝtejoj.

La “netaŭguloj”, entute cent kvindek, kun seso da vakeroj sur la plej bonaj ĉevaloj de la bienego aljuĝitaj al la tasko, estis ellasitaj el sia enfermejo en stato de freneza furiozo kaj kun multe da vipokrakado kolektitaj en amason kaj pelitaj trans la ebenaĵon direkte al la vojo. Kaj unu-du horojn poste la plej bonaj “viandobovoj” estis ekpelitaj vojen, kaj kvieto denove regis ĉe Yarahappini.

Dum la du tagoj de furoro la infanoj ĉiuj decidis pri iliaj estontaj profesioj, kiuj senescepte rilatis al paŝtismo.

Pip intencis fariĝi vakero kaj brulmarki kaj apartigi bovojn

dum la tuta vivo. Judi volis esti lia helpanto, kondiĉe ke li permesos al ŝi resti sursele kaj ekipos ŝin per vipo same longa kiel la sia. Meg pensis ke ŝi volus edziniĝi al la plej riĉa bienposedanto en Aŭstralio kaj gastigi la Guberniestron kaj la ĉefministron por pafado “kaj tiel plu” kaj doni balojn al kiuj venus ĉiuj loĝantoj en radiuso de cent mejloj. Nell decidis ke ŝi fabrikos sapon kaj kandelojn, kolorajn kiel ankaŭ ordinarajn, kiam ŝi atingos plenan aĝon; kaj Bebinjo emis teni kampojn da mane nutritaj ŝafidoj kiuj neniam fariĝos ŝafoj.

Bunty entuziasmiĝis pri neniuj el tiuj ideoj,

“Mi preferus okupon similan al tiu de S-ro Gillet,” li diris, kaj liaj okuloj iĝis revemaj.

“Pu, neniuj kontlibroj kaj ciferoj por mi; donu al mi paŝtejon de salarbusta tereno kun kelkaj miloj da ŝafoj,” diris Pip.

“Mi ankaŭ!” aldonis Judi.

“Stultuloj!” diris Bunty per tono ege malestima. “S-ro Gillet tenas la ŝlosilojn de la provizejo, ĉu ne? Nur pensu pri tiuj sekvinberoj kaj figoj!”

<<<<<>>>>>

## Ĉapitro XVIII

### La Pikniko Ĉe Krangi-Bahtu

Estera estis foririnta al balo, ne en robo de delikata koloro kun grandaj pufaj manikoj, kaj blindige blanka kolo nuda kaj belega sub ĝiaj volvaĵoj, ne tra mallumo al brilegaj lumoj kaj ondanta muziko.

Ŝi iris en la plena lumo de mateno en kompleto el linŝtofo kun blua ĉemizo, marista ĉapelo kaj diafana skarpo.

Sub la antaŭa sidloko de la kabrioletto kie sidis S-ro Hassal troviĝis skatolo enhavanta belegan robon el flava silko kun delikataj ondetoj el gazo. Kaj estis flavaj ŝuoj kaj ŝtrumpoj kaj pluma ventumilo en ĉapelskatolo sur ŝiaj genuoj, kaj belega blanka subjupo kies trenajo kun ondantaj falbaloj sopiregis Meg al plenaĝiĝo je la nura vido.

Sed neniuj el tiuj aĵoj estis surmetotaj dum ankoraŭ multaj horoj.

La balo havis lokon je bagatela distanco de kvindek mejloj for transbiene, do ŝi kompreneble devis ekveturi sufiĉe frue por havi tempon por “elegantigi” sin, kiel Pip esprimis la aferon.

Por la infanoj, kompanse pro tio ke ili ne povos partopreni en tiu plezuro, oni planis tre nekutiman piknikon.

Unue, la piknikejo estis for dek kvar mejlojn, due, la veturon oni faros, nek en ĉiutagaj kabrioletoj nek sur ordinaraj ĉevaloj, sed sur platĉaro tirota de teamo de dek du jugitaj

bovoj. Limrajdisto estis raportinta ke giganta blua eŭkalipto kiun oni jam delonge nomis Reĝo Kori estis blove faligita dum furioza ventego, kaj S-ro Hassal tuj asertis ke spite de la malfacilaĵoj ĝi nepre estu alportita por formi la bazan barieron en la kreo de iaspeca digo trans la rivereto ĉe Krangi Bahtu, la piknikejo. La falinta sovaĝeja monarĥo kuŝis dudek mejlojn for de la biendomo kaj ankoraŭ ses de la loko elektita por la pikniko; do oni aranĝis ke la platĉaro portos la grupon por la dek kvar mejloj, lasos ilin pikniki, antaŭeniros por la arbego, portos ĝin reen kaj lasos ĝin apud la rivereto preta por estonta agado, kaj reportos la infanojn dum la vespera mildo.

Se li ne estus eskortonta sian filinon al la balo S-ro Hassal mem irus al la loko kaj persone gvidus la aferon. Anstataŭe li transdonis la respondecon pri la granda platĉaro al kvar viroj, kun ordono ke ili aligu ankoraŭ du virojn de malproksimaj kabanoj por helpi pri la tasko.

Krangi-Bahtu—aŭ Anasa Akvejo, kiel, malpli elegante oni nomis ĝin—estis la nomo kiun ricevis la supra parto de la rivereto kiu estis elfosinta la teron ĝis ĝi faris al si belan ravinon ĝuste tie kun krutaj rokoj kaj ŝtonegoj trans kiuj kangurooj saltis aŭ de malantaŭe kaŝludis kun ĉasistoj, kaj grandaj, altestraj bluaj eŭkaliptoj kaj ruĝaj eŭkaliptoj kiuj ŝajnis perdiĝi en la blua, bluega ĉielobaldakeno supre.

Tettawonga rakontis pri Bunjipo\* kiu loĝis tie kie la fluetanta akvo faris lageton, profundan kaj belan, kaj delikataj filikoj tenere rampis ĝis la rando kaj nigraj akacioj kaj tearboj\* elkreskis dense kaj fortike por kvazaŭ fari zonon. Akvobirdoj faris hejmon tie, nigraj cignoj konstruis nestojn inter la herbosimilaj kanoj, sovaĝaj anasoj ofte faris zigzagajn liniojn kontraŭ la ĉielo. De la arboj la sonorilbirdo, la vipbirdo, la tevingo, la kukaburo, la paradiza pafilbirdo kaj la laŭbobirdo

plenigis la aeron per sonoj, se ne per muziko. Kaj la nigra serpento, la diamanta serpento, kaj la mortovipuro mole glitis inter la falintaj folioj kaj herbo, kaj bonhumore atendis sintrudantojn. Pro tiu kialo la volonte permesata pikniko havis kondiĉon.

Ĉiu rajtis iri sur la bovoĉaro, sed la pikniko devis okazi supre de la ravino kaj se iu irus tien sube, tiu riskus tujan resendon al Sidnejo.

Ili ĉiuj promesis akcepti la kondiĉon. Sino Hassal, kvankam malalta, kapablis devigi absolutan obeon.

Nekredeblan nombron de korbegoj, plenplenaj de bongustaĵoj oni tiam preparis.

S-ro Gillet iris por doni fidindecon al la afero kaj por kontroli ke neniu ricevos sunfrapon.

Li havis volumon de la poezio de Heine en unu poŝo por sekurigi lin kontraŭ longa, nekutima tago kaj dikan de Tennyson en la alia kaj subbrake faskon da anglaj gazetoj kiam li grimpis sur la platĉaron, kie jam sidis la tuta sep.

La sep? Tiele estis.

Judi estis rifuzinta iri sen la Generalo kaj promesis “per sia vivo” defendi lin kontraŭ ĉia danĝero.

S-ro Gillet aspektis preskaŭ konsternita kiam li trovis ke la tuta aro ĉeestas sen subtraho de la petolemaj nek aldono de iu krom li mem posedanta aŭtoritaton. Dum momento li pridubis sian propran kapablon en tia situacio.

Judi kaptis la duban rigardon.

“Vi citas poezion al vi mem, S-ro Gillet,” ŝi diris.

“Mi.?” li diris kaj mire aspektis. “Tute ne. Kial vi pensas tion, Fino Judi?”

“Mi klare aŭdas ĝin,” si diris. “Viaj okuloj diras ĝin, kaj via maldekstra orelo, por ne mencii la ekstremaĵojn de viaj lip-

haroj.”

“Judi!” riproĉis Meg, kiun io estis farinta strange kvieta.

Li ŝajnis timon—fermis la okulojn, tenis sian maldekstran orelon, kovris siajn lipharojn. “Kio povas esti tio, kion ili diras?” li diris.

“Ho, se nur esti povus mi

En loko kie mi ne estas.

Sed tie mi ne povas esti

Do tie ĉi necese restas.”

Meg, bonvolu ne plu surtreti miajn piedfingrojn.”

Do, post tio eĉ S-ro Gillet fariĝis gaja kaj parolema, por montri ke li bone sin distras, kaj la bovoj infektiĝis de la gaja humoro malantaŭ ili kaj sin movis iomete pli rapide ol limakoj. Kiam oni jam estis rampinta antaŭen proksimume dek mejlojn, tamen, la malrapidega movado kaj la prema varmo iom sobriĝis ilin.

“Fino Meg, tiu arĝente griza eŭkalipto antaŭ vi, libera de folioj, indikas ke ni jam atingis Anasan Akvejon.”

Kiel oni ĝojis sin malfaldi kaj finfine streĉi la brakojn kaj kruojn surtere. Neniu estis supozinta ke rajdi malantaŭ tirbovaro estus tiel plate kaj malinterese kiel ĝi fariĝis post la unuaj unu-du mejloj.

Post tio la bovoĉaro daŭrigis sian iradon.

“Mi dubas ĉu ili revenos antaŭ sunsubiro se ili ne iom pli rapidos,” S-ro Gillet diris; “jam estas la lunĉohoro.”

Ili sin trovis en granda herboriĉa kampo kiu abrupte deklivis je unu fino al la ravino kaj marĉa tereno kiun oni nomis “Anasa Akvejo”.

Aro de grandaj arboj provizis ombron unuflanke kaj laŭ la alia estis barilo el barbumita drato kiu montris ke eĉ tie oni ne estis forlasinta la bienegon Yarahappini; pli alte situis la soleca

kabano el arboŝelo de unu el la vakeroj.

Ili iris amase por paroli kun li antaŭ ol li aliĝis al la tirbovaro, kaj por inspekti lian izolan loĝejon.

Nur malgranda ĉambro ĝi estis kun larĝa kameno kaj kamentubo kie pendis pato, tesitelo, taso kaj kulero. Estis ŝiplito en unu angulo sur kiu estis sternitaj unu-du malhele bluaj lankovriloj, tablo el pinligno kaj unu seĝo meze de la ĉambro. Super la kameno pendis kruda ŝranko farita el sapa kesto kaj uzata por teni provizojn. De najlo en la malalta plafono pendis sako el moskitoretaĵo kaj la zumantaj muŝoj proklamis ke ĝi enhavas viandon. La muroj estis tapetitaj per multaj numeroj de *The Illustrated Sydney News* kaj *The Town & Country Journal*; ekzemplero de *Daily Telegraph* datumita monaton pli frue kuŝis sur la seĝo kie la posedanto ĝin lasis.

Studajo en bruno estis la vakero, brunaj malbrilaj okuloj, brunaj, polvaspektaj haroj; bruna haŭto, sunsekigita kaj ŝrumpinta, bruna, malorda barbo, bruna pantalono el kordurojo, kaj bruna jako.

Lia pipo tamen estis nigra—el argilo, aspektanta kiel se oni jam fumis ĝin dum dudek jaroj.

“Ĉu Vi ne preferus esti pli proksime de la biendomo?” Meg diris, Ĉu ne estas solece?”

“Verdire ne,” la brunulo diris al sia pipo aŭ barbo.

“Kiel vi okupas vin kiam vi ne estas ekstere?” demandis Pip.

“Fumas,” li diris.

“Sed en dimanĉoj kaj dum tutaj vesperoj?”

“Fumas,” li diris.

“Je Kristnaska Tago?” Bebinjo diris, sin enŝovante por rigardi ĉistrangulon.

“Fumas,” li diris.

Judi deziris scii kiel longe li jam loĝis en la malgranda ejo kaj ĉiu estis senparoligita aŭdante ke li jam estis tie la plej parton de la tempo dum sep jaroj.

“Ĉu vi neniam forgesas kiel paroli?” ŝi diris per mirfrapita voĉtono.

Sed li respondis lakone ke li havas katon.

Bebinjo jam trovis ĝin sub la kerosena ladskatolo kiu servis kiel sitelo, kaj ĝi estis ungogradinta ŝin en tri lokoj; bruna kiel ĝia mastro, ĝi estis fiokula, feroce vangharita, maldika kiel relo, tamen estis dumlonge flegita amo inter la du.

S-ro Gillet informis lin pri la deziro de la bienisto ke li iru kun la aliaj viroj kaj helpu pri la arbo.

Li tiris brunan ĉapelon sur sian frunton kaj sin movis en la direkton de la bovoĉaro kiu dume estis rampinta laŭ serpentuma vojo ĝis la montetsupro.

“Akvo en kuvo pli proksima ol riveret,” li murmuris al sia pipo antaŭ ol foriri, kaj ili trovis lian kuvocisternon kaj volonte plenigis la tesitelon preta por la lunĉo.

La rostitaj kokinoj kaj anaso de Sino Hassal bone gustis, eĉ se ili fritsiblis sur la teleroj kvazaŭ la suno volus kompletigi ilian kuiradon. Kaj la pomotortoj kaj abrikotaj tortoj rapide malaperis; kaj de la fruktosalato kiu elvenis el du tordkovrilaj bokaloj eĉ ne kulerpleno restis por ion rakonti.

Laŭ specifa peto S-ro Gillet estis kunportinta ingrediencojn por dampro kaj post la lunĉo ekfaris ĝin por ke oni povu ĝin manĝi kun la posttagmeza teo.

“Fu!” diris Judi, “Ĉu tiel oni faras ĝin? Vi ne bezonos iom doni al mi.”

Certe ĝi estis fabrikita kun miriga rapido.

S-ro Gillet simple ĵetis iom da faruno el sako sur teleron,



aldonis iomete da salo kaj iom da akvo; tiam li formis ĝin en kukon el pasto kaj sternis ĝin sur la cindroj de la fajro, tute kovrante ĝin per la varmegaj cindroj.

“Kiel malpure!” diris Nell, altigante sian belan nazeton.

Sed kiam ĝi estis kuirita kaj S-ro Gillet levis kaj sencindrigis ĝin—jen! ĝi estis alta kaj malpeza kaj bele blanka.

Do oni manĝis ĝin kaj mense notis ke ili faros similajn en la kampoj ĉe Misrule dum ĉiu venonta pikniko.

Ili plenplenigis du telerojn per bongustaĵoj kaj metis ilin en la ŝranko de la brunulo, kaj S-ro Gillet metis siajn nelegitajn anglajn gazetojn sur la seĝon apud la kato.

“Tiu *Telegraph* jam aĝas unu monaton,” li diris modeste, rimarkante ke Meg regalias lin per sia unua rideto de tiu tago.

<<<<<>>>>

\*Bunjipo: (aborigena vorto): mita, legenda marĉmonstro (AE.V.).

\*Tearbo: arbusto/arbeto de la plantfamilio Mirtacoj kies foliojn fruaj blankaj enloĝantoj uzis por fari teon.

## Ĉapitro XIX Palblua Harrubando

La kialo de la malofteco de la ridetoj de nia dolĉa pala Margareta troviĝis ĉe ĝuste tiu viro kiu sola sentis ilian foreston.

Sincera amikeco estiĝis dum la monato inter la malgranda belvizaĝa knabino kiu rigardis per tiaj serenaj bluaj okuloj al estonteco kiu ŝiasente devos esti bela kaj la mondolacigita viro kiu retrorigardis al pasinto nigrigita kaj malbela pro liaj propraj agoj.

Li rajdis ĉiutage kun la du knabinoj ĉar sino Hassal ne volis ke ili iru solaj longajn distancojn; kaj pro tio ke Judi malofte marŝigis sian ĉevalon, kaj la rajdbesto de Meg ne kapablis eĉ galopeti, okazis ke li restis apud la malrapida kaj timema rajdanto la tutan tempon.

“Vi memorigas min pri fratineto mia kiu mortis,” li iam diris al Meg post longa interparolo. “Eble se ŝi ankoraŭ vivus mi ne estus nun tiel malestiminda.”

La vizaĝo de Meg skarlate ruĝiĝis kaj honta rigardo eniris ŝiajn okulojn. Ŝajnis al ŝi tute abomeninde ke li konstatas ŝian scion pri lia malvirto.

“Eble tio malĝojigas ŝin nun,” ŝi diris per flustro kiun li apenaŭ aŭdis, kaj tiam ŝi paligis pro sia aŭdaco kaj rajdis iom antaŭe por kaŝi sian perturbitan mienon.

Survoje hejmen la palblua rubando kiu kunligis la erojn

de ŝia suneca harplektaĵo forbloviĝis. Li elseliĝis kaj levis ĝin. Meg etendis sian manon por ricevi ĝin, sed li malligis la banton kaj malrapide faldis la rubandon ĉirkaŭ sian grandan manon.

“Ĉu mi rajtas konservi ĝin?” li diris per mallaŭta voĉo. “Kiel mia blua rubando? Mi konas la kondiĉojn implicitajn.”

“Ho, se vi farus — ho, se nur vi farus!” Meg mallaŭte flustris. Ĝuste tiam Judi algalopis kaj ili rajdis hejmen triope. Tio donis al ŝi grandan feliĉon tute tra la longaj, varmegaj tagoj kiuj sekvis; al knabino ĉe la sojlo de la vivo ne ekzistas pli pura, profunda plezursento ol tiu alportita de la scio ke ŝi estas bona morala influo ĉe iu viro aŭ virino pli aĝa ol si mem, pli pekodifektita kaj pli mondolaca. Kompatinda malgranda Meg! Ŝiaj teneraj rozkoloraj revoj bildigis ŝian grandstaturan protektaton kiel denove viron inter viroj, alte tenante la kapon denove, prenante honorindan lokon en la mondo, revenante al la hejmlando kaj postulante la manon de la altranga sinjorino kiun bildigis al si ŝia fekunda imagpovo kiel pacience atendantan lin; kaj ĉio ĉi ĉar ŝi, Meg Woolcot, enpaŝis lian vivon kaj indikis la vojon kiun li devus sekvi.

Kaj jen ŝi iris swingiĝi en hamako sur la malantaŭa verando kaj ĉiuj ŝiaj revkasteloj falegis ĉirkaŭ ŝiajn orelojn, farante al ŝi akrajn, amarajn batojn.

Dense kreskis malantaŭ ŝi pasifrukta rampaĵo, kaj tra ĝi ŝi povis aŭdi Tettawonga paroli kun la kuiristino.

“Sinjo’ Gillet ‘bursti’ d’ nove,” li diris kaj subridis tra la flanko de siaj lipoj kie lia pipo ne sidis.

Meg eksidis konsternite. De kiam ŝi alvenis al Yarahappini ŝi aŭdis uzata tiun esprimon pri tro da bienaj dungitoj por ne scii ke ĝi signifas senbridan drinkdiboĉon.

“Pro Ĉiel, mi ne miras,” la virino respondis, “li lastatempe

estis tro malebria por povi tion daŭrigi; s'pozeble li provis ĝisatingi la finon de la vizito sed trovis tion troe. Kiu tenas la ŝlosilojn?"

"Sin'ino Hassal." li diris, "Vi esti helpi ŝi—ne boni por pl'visoj, hodiaŭ, Sinjo' Gillet, he he ha ha!"

Do, jen kio okazis al li dum ĉilastaj tri tagoj kiam ŝi tute ne vidis lin. Ŝi aŭdis ke li estis rajdinta al la najbara bieno pro afero por S-ro Hassal, sed neniel supozis ke tia katastrofo estis okazinta al li. La kvinan tagon ŝi vidis lin de malproksime, unufoje eliranta la provizejon kaj aspektanta tute normala krom tio ke liaj ŝultroj kurbiĝis iom pli ol kutime, kaj unufoje kiam li fumis ekster sia propra pordo.

La sesan tagon okazis la pikniko.

Tute tiel facilkora kaj gaja kiel la aliaj ŝi ne povis senti sin, pro tiu disreviĝo ĉe ŝia koro, tiu ŝanceligita fido al la homa naturo.

Kiel malforta li estis, ŝi pensis, kiel malnobla!

Ŝia tuta kompatato forŝoviĝis per juna, larĝa indigniĝo.

Ŝi malvolonte donis al li la manon kiam ili renkontiĝis tiumatene, kaj dum la tuta longa veturo ŝi malvarme rilatis al li.

Post la lunĉo la grupo disiĝis. Judi prenis la Generalon kaj iris al la arba loko; Pip kaj Bunty sin okupis per kaptado de akridoj, Bebinjo kaj Nell kolektis sovaĝflorojn. Meg genuiĝis por arigi la kulerojn kaj forkojn kaj remeti la neuzitajn manĝaĵojn en la korbojn for de la formikoj.

Mi faros tion—laŭaspekte estas al vi tro varme, Fino Meg; sidigu vin trankvile," S-ro Gillet diris.

"Dankon, sed mi preferas mem fari," Fino Meg diris kun frosta digno.

Ŝi ne rigardis al li, sed estis ia trofirmeco ĉe ŝiaj lipoj kiu

sciigis al li ke la lumo en ŝiaj klaraj junaj okuloj estas malestima.

Li ne ripetis la proponon, sed sidis kaj observis ŝin kunpaki la aĵojn kun netradukebla esprimo sur lia vizaĝo. Kiam ŝi preskaŭ finis li elprenis ion el sia poŝo.

“Mi devas redoni ĉi tion al vi,” li diris, kaj enmanigis al ŝi la pecon de blua rubando, glate faldita sed montranta la kuntiraĵojn kie ĝi estis ligita.

Ŝi prenis ĝin sen levi siajn okulojn, kunpremis ĝin en sia mano, kaj glitigis ĝin en sian poŝon.

“Mi preskaŭ esperis ke vi diros ke mi povos reteni ĝin malgraŭ ĉio,” li diris, “simple kiel talismano kontraŭ la estonto, sed viaj lipoj estas tro severaj, Fino Meg, por ke mi plu retenu tiun esperon.”

“Ĝi estus same senefika kiel antaŭe,” ŝi diris rigide. Ŝiaj manoj laboris nerve, tamen, kaj ŝi kunpakis la restaĵon de anaso kaj konfitaĵa torto.

“Mi do ne rajtas ricevi alian ŝancon?” li diris.

“Estus senutile,” Meg ripetis, kunkolektante bananojn kaj oranĝojn, la vizaĝo pli varmkolora.

Li ne konstatas kiel fia li estis, li pensas ke oni devus tuj pardoni lin, estis ŝia penso.

Li malrapide elverŝis surtere la enhavon de la tesitelo, li surmetis ĝian nigriĝintan kovrilon kaj ligis la gazeton ĉirkaŭ ĝin. Tiam li rigardis al ŝi denove kaj la maniero laŭ kiu ŝiaj molaj haroj falis trans ŝian frunton pensigis lin pri sia juna mortinta fratino.

“Mi petegas al vi redoni ĝin, Fraŭlino Meg,” li diris.

La koro kaj kapo de Meg havis rapidan batalon; la unua estis tenera kaj pardonema kaj diris al ŝi tuj preni kaj redoni al li la rubandeton; la dua diris ke li forte pekis, kaj ŝi devos

montri al li per sia teniĝo sian malaprobon eĉ se ŝi fine agos laŭ lia peto.

La kapo venkis.

“Mia influo estas memevidente senutila —tiu peco de rubando neniel efikus estonte,” ŝi diris tre malvarme.

Li sin klinis malantaŭen kontraŭ la arbo kaj oscedis kvazaŭ la temo ne plu interesus al li.

“Nu, do,” li diris, “mi supozas ke vi pravas.”

Meg sentis ioman malŝveliĝon.

“Kompreneble se vi vere deziras havi la rubandon vi povas havi ĝin,” ŝi diris superece. Ŝi prenis ĝin el sia poŝo kaj ĝin proponis al li.

Sed li ne sin movis por preni ĝin.

“Retenu ĝin por denove ligi viajn harojn, knabineto,” li diris, “Mi tamen ne supozas ke ĝi iel efikus.”

Meg kun flamantaj vangoj daŭrigis sian pakadon kaj li plenigis sian pipon kaj fumis ĝin, senfare observante ŝin la tutan tempon.

“Strange estas,” li diris, pli ĝustadire kiel se li rimarkigus ion ol se li alparolus ŝin, “sed la plej mildaspektaj virinoj estas preskaŭ ĉiam la plej severaj.”

Meg malfermis la buŝon por paroli, sed trovis nenion por diri, do fermis ĝin denove kaj ekkalkulis la forkojn de Sino Hassal por la kvara fojo.

“Mi demandas al mi ĉu vi permesus ke mi donu al vi konsilon, Fino Meg, reciproke por tiuj kiujn vi donis al mi,” li diris, prenante sian pipon el sia buŝo kaj rigardante ĝin kvazaŭ li volus deĉifri la literojn sur ĝia nikela plataĵo.

“Kompreneble.”

Ŝi formetis la forkojn kaj rigardis lin per trankvilaj, mirantaj okuloj. “Parolu laŭplaĉe, tio tute ne ĉagrenos min.”

Li sin rektigis kaj ludetis per la buko de rimeno dum li parolis.

“Vi havas fratojn,” li diris; “iam ili iom erarvagos—ĉar nur estas virinoj kiel vi, Fraŭlino Meg, kaj anĝeloj kiuj povas ĉiam laŭiri la vojon. Ne estu tro severa kun ili. Ne klopodu montri al ili la diferencon inter via blanko kaj ilia nigro. Ili ja vidos ĝin, sed ne plaĉos al ili ke vi atentigu pri tio. Penu aspekti milda kaj pardonema—ili sin sentos tute tiel malfeliĉaj kiel vi dezirus. La mondo havas sian propran fortan kuntiriĝon de la brovoj, kaj senfinan vortaron de malvarmaj vortoj—ĉu ne sufiĉus se fratinetoj lasus al ĝi la monopolon pri ili?”

“Hooo!” diris Meg. Ŝiaj vangoj estis karmezinaj, kaj la tuta digno estis fluetinta el ŝia voĉo.

Zorgege li bukis la rimenon ĉirkaŭ nenio, kaj daŭrigis per malalta voĉtono:

“Supozu ke iam Pip farus ion tre malbonan, kaj la mondo ĵetus ŝtonojn kontraŭ li ĝis li estus tutkorpe kontuzita. Kaj supozu ke, sentante sin tre malfeliĉa, li venus hejmen al siaj fratinoj. Kaj Meg, ĉar fienco estus al ŝi abomena, ĵetus ankoraŭ kelkajn ŝtonetojn, por ke la doloro donu al li lecionon kiun li ne povus forgesi. Kaj Judi, ĉar li estas ŝia frato kaj trafis en misaferon, ĵetus siajn brakojn ĉirkaŭ lin kaj kuraĝigus lin kaj helpus al li kontraŭbatali la mondon denove, kaj donus al li neniujn severajn vortojn aŭ rigardojn, opiniante ke li jam ricevis pli ol sufiĉe. La influo de kiu fratino estus pli granda, Fino Meg?”

La tenera buŝeto de Meg jam tremis, ŝiaj okuloj direktiĝis teren ĉar larmoj estus elfalintaj ilin se ŝi rigardus supren.

“Hooo! ŝi diris denove, “Ho, kiel aĉa mi estis hooo!”

Ŝi kovris sian vizaĝon per la manoj, ĉar unu el la rapide amasiĝantaj larmoj tremis sur ŝiaj okulharoj.

S-ro Gillet lasis fali la rimenon kaj la pipon, kaj tenerokule rigardis transen al ŝi.

“Mi havas pli ol duoble viajn jarojn, Fino Meg, preskaŭ sufiĉe mi aĝas por esti via patro—vi ja pardonos al mi, ĉu ne, ke mi diris ĉi ĉion. Mi pensadis pri mia fratino kiu mortis. Mi havis alian fratineton ankaŭ, jaron pli aĝan, sed ŝi estis senindulga—nur unufoje mi iris al ŝi. Si estas nun unu el la plej admirindaj virinoj en Anglio, sed ŝiaj lipoj estas severaj. Fino Meg, estus al mi netolerebla la penso ke vi malmoliĝus.”

Seso da dikaj larmoj jam falis inter la forkoj. Meg ploris ĉar frapis ŝin la penso ke ŝi estas tre malestiminda estaĵo. Unue Alan riproĉis al ŝi kaj parolis pri sia fratino, kaj nun ĉi tiu viro.

Li mise interpretis ŝian silenton.

“Mi ne rajtis paroli al vi tiele ĉar la koloro de mia vivo estis neniel blanka—tiel vi opinias, ĉu ne, Fino Meg?” li diris tre malgaje.

Meg lasis fali siajn ŝirmantajn manojn.

“Ho, ne,” ŝi diris, “ho kiel vi povas pensi tion? Estas nur mi kiu estas tre aĉa.” Ŝi serĉis en sia poŝo kaj eltiris la rubandon.

“Ĉu vi bonvolus preni ĝin denove?” ŝi diris, “Ho, mi petas, nur por sentigi min malpli aĉa. Ho bonvolu preni ĝin!”

Ŝi rigardis lin per malsekaj, petegantaj okuloj kaj etendis ĝin.

Li prenis ĝin, glatigis ĝiajn ĉifojn kaj metis ĝin en sian biletujon.

“Dio vin benu,” li diris, kaj la voĉtono kaŭzis al Meg singulti.

<<<<<>>>>



## Ĉapitro XX Malgranda Judi

Trans la herbejon venis malgranda flugrapidanta figuro, Judi en mallonga rozkolora robo kun siaj senordaj harbukloj disblovataj ĉirkaŭ ŝia vizaĝo.

“Ĉu vi estas kandidato por sunfrapo— kie estas via ĉapelo, Fino Judi?” S-ro Gillet demandis.

Judi skuis sian malhelan implikaĵon de haroj.

“Scias mi ne,” ŝi diris—”estas banano pro kies manko la Generalo mortas, kaj sendube estas kadavro kiun mi ĝisvivos vidi min se vi jam manĝis ĉiujn la oranĝojn.”

Meg ŝovis la sakon da frukto trans la tukon al ŝi kaj provis klini sian ĉapelon por kaŝi siajn perfidantajn okulojn.

Sed la akrevidaj malhelaj okuloj jam de la unua momento estis rimarkintaj la malsekajn okulharojn.

“Mi s’pozas ke vi legis stultan poezion kaj plorigis Meg,” ŝi diris kun batalema rigardo kiu moviĝis de S-ro Gillet al la libro sur la herbo. “Vi vere devus honti, tia konduto dum pikniko. Tio tamen ŝparis oranĝojn, kio estas dankindaĵo.”

Ŝi elprenis seson da grandaj kaj dikaj el la sako aldone al kvar-kvin bananoj kaj reiris flugpaŝe al la aro de arboj kie la Generalo en sia linŝtofa jako estis pene videbla.

Li estis senpasia elfosanta teron kaj metanta ĝin en sian ruĝan buŝeton kiam ŝi alvenis kun la bananoj.

Li suprenrigardis al ŝi kun dolĉega rideto.

“Etulo!” ŝi diris, sin ĵetante malsupren al li en unu el siaj emocieksplozoj—“etulo!”

Ŝi kisis lin kvindekfoje; preskaŭ doloris al ŝi foje la sento de amo por ĉi dika, malpura knabeto.

Poste ŝi tiris lin sur siajn genuojn kaj kiom eble forviŝis la malpuraĵon el lia buŝo per angulo de lia jako.

“Narno,” li diris, baraktante por denove atingi la teron, do ŝi senŝeligis grandan flavan frukton kaj metis ĝin en lian dikan maneton.

Li iom manĝis kaj forte premis la restaĵon per siaj manoj, ĝue observante ĝin eliĝi inter liaj etaj fingroj en malgrandaj vermecaj eroj.

Tion li ŝmiris sur sian kavethavan vizaĝon kaj eĉ frotis sur siajn harojn, dum Judi sin dediĉis al sia kvina oranĝo.

Do ŝi devis vipi lin pro tio aŭ almenaŭ ŝajnigi tion kio finfine estis la sama afero. Kaj poste li devis vipi ŝin, kio ja ne signifis ŝajnigi.

Li batis ŝin per vergo kiun li trovis apude, li vangofrapis ŝin kaj tiris al ŝi la harojn kaj ĵetadis sin sur ŝian bruston kaj ĉion faris en tia solena devoscia maniero ke ŝi ne povis ne ridi, eĉ kiam li vere dolorigis ŝin.

“Bon’ nun?” li fine diris seriozege.

Kaj ŝi ekploris brue, kun kovrita vizaĝo kaj tremegantaj ŝultroj en la postulata pentema maniero. Je tio li metis siajn karajn brakojn ĉirkaŭ ŝian kolon kaj premis ŝin kaj diris “Ju-Ju” per sufokata voĉeto kaj ame frapetis ŝiajn vangojn, kaj donis al ŝi centon da entuziasmaj malfermbuŝaj, malsekaj kisoj ĝis ŝi kuraciĝis.

Post tio ili ĉasludis, kaj la Generalo falis dudekon da fojoj, kaj skrapvundis siajn genuetojn kaj manetojn kaj suprenbaraktis denove kaj ŝanceliris antaŭen.

Baldaŭ Judi urĝe restis surloke: iksodo ekboris al si vojon en ŝian manradikon. Nur ĝiaj du malantaŭaj kruroj restis ankoraŭ eksterhaŭte, kaj longe ŝi tiradis sensukcese. Fine ĝi rompiĝis kaj ŝi devis lasi duonon por la avineto kaj keroseno forigi post ilia reveno.

Du-tri minutojn ŝia provo forigi ĝin okupis, kaj kiam ŝi suprenrigardis la Generalo jam estis forkurinta kelkan distancon kaj iris tiel rapide kiel kapablis liaj dikaj kruretoj, pensante ke li konkuras sin. En la momento kiam ŝi eksekvis lin li rigardis malantaŭen, la okuloj brilegantaj, la vizaĝo ridkaveta kaj miskondutema, kaj ho! tiel malpura!

Kaj tiam—ho Dio!

Envortigi ĝin estas malfacilege. Mia plumo ĝis nun nur feliĉajn aferojn devis rakonti, sed nun!

“Friponeto!” Judi vokis, ŝajnigante kuregi. En tiu momento la tuta mondo ŝajnis sin levi antaŭ ŝin.

Arbo ekfalas, unu el la gigantaj, blankiĝintaj, senfoliaraj kiuj estis jam delonge ĉirkaŭhakitaj. La tutan tagon ĝi estis kliniĝinta tien kaj reen, tute traputriĝinta; kaj nun venis trans la ebenaĵo malforta ventoblovo kaj terensendis ĝin. Unu sovaĝan ĉantan krion Judi eligis, post tio ŝi saltis transteren, la brakoj etenditaj al la knabeto kuranta ridokula kaj ridbuŝa rekte al la morto.

La falego tremigis la ĉirkaŭajn arbojn, eĉ la aero mem ŝajnis frakasiĝi.

Ili ĉiuj aŭdis—ĉiuj la aliaj—aŭdis la kriegon kaj poste la teruran falbruon.

Kiel tremis iliaj genuoj! Kiel blankis iliaj vizaĝoj dum ili rapidegis en la direkton de la bruo!

Oni forlevis ĝin de la korpetoj—la longan arĝentan trunkon kun la gumo mortinta kaj streke sekiĝinta sur ĝi. Judi

estis vizaĝaltere, la brakoj dissternitaj.

Kaj sub ŝi estis la Generalo, iom skuita, ege mirigita, sed tute sendifekta.

Meg brakumis lin momente, sed baldaŭ surterigis lin kaj aliĝis al la aliaj ĉirkaŭantaj Judi.

Ho la malhela kvieta kapo, la senmova korpo en sia roza, ĉifita robo, la maldikaj etenditaj manetoj!

“Judi!” Pip diris per voĉo de peteganta angoro.

Sed la sola respondo estis la vento ĉe la arbosuproj kaj la tima spirado de la aliaj.

Venis al S-ro Gillet la konstato ke troviĝas neniu krom li por surpreni gvidan rolon. Li iris kun Pip al la kabano de la vakero kaj forigis la pordon de ĝiaj ledaj ĉarniroj kaj portis ĝin malsupren de la monteto.

“Mi levos ŝin,” li diris, kaj metis siajn brakojn sub la malgrandan korpon, levante ŝin malrapide, malrapidege, tenere supren, kuŝigante ŝin sur la pordon vizaĝalĉiele.

Sed ŝi ĝemis—ho, kiel ŝi ĝemis!

Pip, kies koro kvazaŭ saltis en lian gorĝon je la unua vivsigno, preskaŭ freneziĝis kiam la etaj sonoj de angoro eliĝis el siaj lipoj..

Ili levis la brankardon kaj portis ŝin supren ĝis la bruna kabano ĉe la montetsupro.

S-ro Gillet parolis, ekster la pordejo, al Meg kaj Pip kiuj ŝajnis mirfrapitaj, senpovigitaj.

“Pasos horoj antaŭ ol ni povos havigi helpon,” li diris, “kaj jam estas la kvina. Pip, kuracisto gastas ĉe Boolagri, dek mejlojn for laŭ la vojo. Venigu lin—kuru la tutan distancon. Mi iros hejmen—dek kvar mejlojn. Fino Meg, mi ne povos baldaŭ reveni. Mi venigos kabrioletan; la bovoĉaro estas tro malrapida kaj skua, eĉ kiam ĝi revenos. Vi devos gardi ŝin,

doni al ŝi akvon se ŝi petos— nenio alia fareblas.”

“Ĉu ŝi mortas? ”Meg diris— ”mortas?”

Li pensis pri ĉio kio povos okazi antaŭ ol li venigos helpon kaj sentis neeble lasi ŝin senprepara.

“Mi pensas ke ŝia spino rompiĝis,” li diris tre mallaŭte, “Se jes, tio signifas morton.”

Pip forkuregis laŭ la vojo kondukanta al la kuracisto.

S-ro Gillet donis unu-du ordonojn, post kio li rigardis al Meg.

“Ĉio dependas de vi; vi nepre ne permesu al vi perdi la ekvilibron,” li diris.

“Ne movu ŝin. Prenu gardon la tutan tempon.”

Li ekiris direkte al la malsupera vojo.

Ŝi saltleviĝis sekve.

“Ĉu ŝi mortos dum vi estos for?—neniu krom mi?”

Ŝiaj okuloj estis larĝe malfermitaj, teruritaj.

“Nur Dio scias!” li diris kaj sin forturnis.

Estis al li preskaŭ netolereble foriri kaj lasi ĉiknabineton sola fronti tian teruraĵon.

“Dio helpu min!” ŝi ĝemis, rapidante reen, sed ne rigardante al la varmega, malsuprenpendanta ĉielo. “Helpu min, Dio! Dio, helpu al mi, helpu al mi!”

<<<<<>>>>>

## Ĉapitro XXI Kiam Subiris La Suno

Kia sunsubiro!

Malsupre de la herbokovrita monteto estis flamkolora ĉielo kun purpuraj, molaj nuboj amasiĝintaj tie alte kie la mortanta kolorriĉo tuŝis la paliĝintan bluan. La bosko nigriĝis kaj la arboj etendis malhelajn senmovajn brakojn kontraŭ oranĝkolora fono. La vento tute formortis kaj la aero pendis varma kaj senmova, ŝargita per la stranga silento de la Aŭstralia naturo.

Kaj ĉe la supro de la monteto, apenaŭ en la pordejo de la malgranda bruna kabano, siaj larĝe malfermitaj okuloj rigardantaj al la mirinda ĉielo, Judi kuŝis mortanta. Ŝi estis tre kvieta nun, kvankam pli frue ŝi parolis—paroladis pri plej diversaj aferoj. Si diris al ili ke ŝi sentas nenian doloron.

“Mi tamen mortos kiam oni formovos min,” ŝi diris.

Meg sidis kurbadorse sur la planko apud ŝi. Ŝi tute ne movis la rigardon for de la vizaĝo sur la kuseno el pluvmanteloj, neniam ŝi malfermis la blankajn lipojn por diri eĉ unu vorton.

Ekstere la bovoj staris senmove kontraŭ la ĉielo—Judi diris ke ili aspektas kvazaŭ remburitaj bestoj kies portreton oni faras. Si ridetis iom, sed Meg diris “Ĉesu,” kaj sin tordis.

Du el la viroj estis foririntaj superflue helpserĉi; la aliaj staris iom for, mallaŭte interparolantaj.

Estis nenio kion ili povus fari. La brunulo estis parolinta, maloftaĵo ĉe li.

Li estis lule dormiginta la Generalon kaj kuŝiginta lin volvitan per la blua lankovrilo, sur la ŝiplito. Kaj li estis infuzinta metalan poton da varmega, forta teo kaj larmokule petis al la infanoj iom trinki, sed neniu el ili akceptis.

Bebinjo estis ekdorminta sur la planko, la brakoj forte ĉirkaŭantaj la laĉitan boton de Judi.

Bunty kun senkonscia rigardo sur la blanka vizaĝo staradis malantaŭ la brankardo. Liaj okuloj fiksiĝis sur la haroj de la fratino. Li ne kuraĝis permesi al ilia rigardo vagi ĝis ŝia vizaĝo el timo pri tio kio eble vidiĝus tie. Nelli senĉese sin movis jen al la barilo por streĉe rigardi laŭ la vojo kie la vesperaj ombroj jam peze pendis, jen por sin ĵeti vizaĝaltere malantaŭ la kabano kaj diri:

“Kuracu ŝin, Dio! Dio kuracu ŝin! Kuracu ŝin! Ho! Ĉu Vi ne povas kuraci ŝin?”

Ĉiam pli grizaj fariĝis la ombroj ĉirkaŭ la malgranda kabano, la siluetoj de la bovoj paliĝis kaj nur obtuza mole nigra amaso elstaris kontraŭ la lumo. Malantaŭ la arboj la fajraĵo grade estingiĝis, jen kaj jen ankoraŭ troviĝis flavaj, helaj strioj, sed la flamanta sunrando jam forglitis preter la mondon kaj purpura, delikata vualo ekmal-supreniĝis.

La voĉo de numenio rompis la silenton, sovaĝa, malgaja, alimondeca. Meg tremis kaj rektigis la dorson. La frunto de Judi malsekiĝis, ŝiaj pupiloj pligrandiĝis, ŝiaj lipoj tremis.

“Meg!” ŝi diris, per flustro kiu ŝiris la aeron; “ho, Meg, mi timas! Meg, mi tre timas!”

“Dio!” diris la koro de Meg.

“Meg, ion diru. Meg, helpu min! Rigardu la mallumon, Meg. Meg, mi ne povas morti! Ho, kial oni ne rapidas!”

Nelli denove kuregis al la barilo; poste por diri, “Kuracu ŝin, Dio—ho, mi petas, Dio!”

“Meg, mi nenion povas elpensi por diri. Ĉu vi ne povas diri ion, Meg? Ĉu ne estas preĝoj por la mortantoj en la Preĝlibro? mi forgesas. Diru ion, Meg!”

La lipoj de Meg moviĝis, sed ŝia lango eligis neniun vorton.

“Meg, mi tre timas! Mi nenion povas rememori krom ‘Por tio kion ni estas ricevontaj,’ kaj tio estas manĝobeno, ĉu ne? Kaj ankaŭ estas nenio en Patro Nia. Meg, mi bedaŭras ke mi ne vizitadis dimanĉlernejon kaj lernis aferojn. Rigardu la mallumon, Meg! Ho, Meg, prenu miajn manojn!”

“La paradizo ne—estos—malluma,” diris la lipoj de Meg.

Eĉ kiam parolo venis, estis nur balbuta, ŝabloneca frazo kiu eliĝis el ili.

“Se ĝi plenos per oro kaj diamantoj, mi ne deziras iri!” La infano jam ploris. “Ho, Meg, mi deziras vivi! Kiel plaĉus al vi morti, Meg, nur dektrijara? Imagu kiel soleca mi estos sen vi ĉiuj. Ho, Meg! ho Pip, Pip! ho Bebinjo! Nell!”

Larmoj kuradis laŭ ŝiaj vangoj, ŝia brusto leviĝis kaj malleviĝis.

“Ho, diru ion Meg!—himnojn—kion ajn!”

Duono de la libro Himnoj Antikvaj kaj Modernaj tradancis la cerbon de Meg. Kiun ŝi elektu por venigi trankvilon en tiujn febrajn okulojn kiuj fiksas sur ŝian vizaĝon tian timan, petegan rigardon?

Ŝi malfermis la lipojn:

“Ho, venu vi, laculoj

Ripozon donos mi

Benata....”

“Mi ne estas laca, mi ne volas ripozi,” Judi diris per tono



plendema.

Denove Meg provis:

*“Dum, patra Dio, vagas mi*

*For de la hejm’ sur viva voj’*

*La koron diri helpu vi*

*Laŭ via vol’!”*

“Tio estas por maljunuloj,” diris la malforta, laca voĉo. “Li ne atendas ke mi diru tion.”

Tiam Meg rememoris la plej belan himnon en la mondo, kaj eldiris la unuan kaj finan strofojn per firma voĉo:

*Restu kun mi: subiras jam la sun’,*

*Kreskas mallumo; nokto venas nun.*

*Foras amikoj, ombroj kreskas pli:*

*Forta Helpanto, ho restadu vi!*

*En fina horo, kiel gvida stel’*

*Trans la mallumon montru al ĉiel’:*

*Ombroj forkuras, jen matenradi’*

*En viv’, en mort’, ho Dio, restu vi.*

“Ho! kaj Judi, kara, ni forgesis; estas patrino, Judi, kara, vi ne estos soleca! Ĉu vi ne povas rememori la okulojn de patrino, Judinjo?”

Judi fariĝis kvieta kaj ankoraŭ pli kvieta. Ŝi fermis la okulojn por ne vidi la kolektiĝantajn ombrojn.

La brakoj de Meg ĉirkaŭis ŝin, la vango de Meg tuŝis ŝian frunton, Nell tenis ŝiajn manojn, Bebinjo ŝiajn piedojn, la lipoj de Buntj estis sur ŝiaj haroj. Tiele ili akompanis ŝin ĝis la Granda Valo, kie ne estas lumoj, eĉ por stumblantaj infanaj piedoj.

La ombroj estis malvarmaj kaj frapis al ili ĉe la koro; ili povis senti sur la frunto la venton de sur la fremdaj akvoj, sed nur ŝi kiu estis transirona aŭdis la mallaŭtan plaŭdon de la

ondoj.

Ĝuste kiam ŝiaj piedoj tuŝis la akvon figuro aperis ĉe la pordejo.

“Judi! "kriis voĉo; kaj Pip forŝovetis ilin kaj faligis sin apud ŝi.

“Judi, Judi, Judi!”

La lumo flagris denove en ŝiajn okulojn. Ŝi kisis lin per palaj lipoj unufoje, dufoje; ŝi donis al li ambaŭ siajn manojn, kaj sian lastan rideton.

Poste la vento superblovigis ilin ĉiujn, kaj kun eta tremo ŝi forglitis.

<<<<<>>>>

Ĉapitro XXIIa..  
...Kaj Lasta

Ili iris hejmen denove, ĉiuj ses, kaj Estera, kiu de tiam “iros pli sobre, malpli gaje” dum la tuta vivo, pro la prezo pagita por la vivo de ŝia dolĉa filo. Mem la atmosfero ĉe Yarahappini ŝajnis premege ilin kaj peze pendi sur iliaj animoj. Do kiam la Kapitano, kiu estis rapidinta norden por vidi lastafoje sian kompatindan knabinecon, demandis ĉu ili volas iri hejmen, ili ĉiuj diris “jes”.

Estis iom da verda tero sur montetsupro malantaŭ la biendomo kaj aro de mimosaj arboj, nun malhele verdaj sed orkronitaj kaj ĉarmaj en la printempo.

Jen, do, la loko kie ili lasis la malgrandan Judi. Ĉirkaŭ ĝi S-ro Hassal lokigis blankajn altajn palisojn; la mallonga tombo troviĝis en ĝia ombra angulo.

La loko aspektis kiel eta preĝeja tombejo en infana lando kie okazis ĝis nun nur unu morto.

Aŭ verda bela kampo kun unu ĝardena bedeto.

Meg ĝojis ke la malgranda teramaso rigardas orienten. La sunoj mortis malantaŭ ĝi—la oranĝkoloraj kaj flavaj kaj pupuraj sunoj kiujn rigardi ŝi neniam plu povos dum la tuta vivo.

Sed fore en la oriento ili ĉiam leviĝis tenere kaj la lumo rampis supren trans la ĉielo ĝis la montetsupro per delikataj rozkoloroj kaj tremantaj bluoj kaj heliĝantaj grizoj, sed neniam

per fajrecaj flavaj strekoj kiuj dolorigas la okulojn per varmegaj larmoj.

Estis luno faranta ĝin blanka kaj bela kiam ili adiaŭis ĝin en la lasta tago.

Ili ĉiuj plukis unu-du herbojn de freŝe remetita herbaro kaj sin forturnis. Neniu ploris; la blanka kvieteco de la malproksima luno, la palaj, pendantaj steloj, la venteto ekmovanta la mimosojn retenigis iliajn larmojn ĝis ili estis fermintaj post si la kradpordeton kaj lasintaj ŝin sola sur la trankvila montetsupro.

Ili do revenis al Misrego, ĉiu por repreni la fadenon de la vivo kaj daŭrigi tiun teksadon kiun, dank' al Dio, oni devas fari aŭ koroj ĉiutage rompiĝus.

Meg estis maturiĝinta kaj neniam plu estos tiel juneca kiel ŝi estis antaŭ ol tiu ruĝa sunsubiro sinkis en ŝian animon.

En ŝiaj okuloj estis pli profunda lumo; tiaj larmoj kiajn ŝi verŝis klarigas la vidpovon ĝis la vivo fariĝas io pli konturita kaj larĝhorizonta.

Nelli kaj ŝi estis ĉeestintaj la Diservon en la unua dimanĉo post la reveno. Aldita sidis en kelka distanco, same facilanima, kiel ĉiam, hele vestita, kokete ridetante al la familiaj benkoj Courtney kaj Graham, kiu lasta troviĝis vicon malantaŭ la unua.

Kiel Meg malproksimiĝis de ŝi! Ŝajnis jam jaroj de kiam ŝi okupiĝis pri la lasta modo en la garnado de ĉapelo, la kurbo de 'ombrelaj' jupoj kaj la plej bona metodo blankigi la manojn. Jaroj de kiam ŝi prove debutis en flirtado. Jaroj, preskaŭ, de kiam ĉe Yarrahappini ŝi fordonacis tiun bluan rubandeton kiu faras pli da bono ol ŝi iam supozis.

Alan rigardis ŝin de sia benko—la malgrandan figuron en sia funebra nigraĵo, la helajn harojn pendantajn en plektaĵo ne

plu krispigita je la fino, la nun humilan kliniĝon de la lipoj, la sopiran malĝojon de la bluaj okuloj. Li apenaŭ povis kredi ke tiu estas la ventkapa junulino kiu skribis tiun leteron kaj ŝteliris tra la mallumo renkonte al lia sentaŭga juna frato.

Li premis ŝian manon kiam la diservo finiĝis; liaj grizaj okuloj kun la rapide aperinta malseko en ili kompensis pro la malflujaj stumblantaj vortoj de kunsento kiujn li provis voĉigi.

“Ni estu ĉiam geamikoj, Fino Meg,” li diris kiam ili disiĝis ĉe la Misrega kradpordo.

“Jes, tiel estu,” diris Meg.

Kaj la solida, sincera amikeco fariĝis io bela en la vivo de ambaŭ, fortigante Meg kaj mildigante la knabon.

Pip denove fariĝis ridema kaj verva kiel okazas ĉe eĉ la plej amema knabo, dank’ al la laŭdinda ennaskita eco de la junaj homoj; sed kelkfoje lin trafis deprimado, kaj en tiaj okazoj li subite malaperis, meze de kriketludo aŭ futbalo aŭ ĉetoble kiam la bruo plej kresĉendis.

Bunty montris al la mondo vizaĝon same malpuran kiel antaŭe kaj manojn eĉ pli malpurajn ĉar lastatempe li evidentigis latentajn de mekanista talento kaj pasigis siajn liberajn momentojn en fabrikado de presmaŝinoj—tiel nomataj —kaj de timigaj kaj mirindaj motoroj el malnova forno kaj kelkaj potoj kaj rustintaj patoj kiujn li savis el la rubujo.

Sed li lastatempe malpli ofte mensogis; tiu kolorriĉa sunsubiro enŝteliĝis eĉ lian junan koron kaj ĉiufoje kiam li emis diri “Mi ne, ne estis mi, ne estis mia kulpo” implikaĵo el nigraj bukloj sin levis antaŭ li, ĝuste kiel ili kuŝis en tiu nokto en kiu li ne kuraĝis movi la rigardon for de ili.

La kruroj de Bebinjo ŝin multe okupis lastatempe, ĉar oni ĵus promociis ŝin de ŝtrumpetoj al ŝtrumpoj, kaj ĉiu kiu povas

rememori tiun okazon en sia vivo komprenos ĝian gravecon por ŝi.

Nell ŝajnis ĉiutage plibeliĝi. Pip havis grandan taskon evitigi ke ŝi fariĝu malmodesta; se frataj pikdiroj kaj humiligoj efikas tiurilate ŝi devus esti same humila kiel se ŝi havus rufajn harojn kaj nazon kiu direktiĝus al la ĉielo.

Estera diris ke ŝi volonte ie aĉetus kelkajn aldonajn jarojn, severan frunton, kaj dignon en grandaj kvantoj—povus esti ke tiam estus ŝanco ke Misrego reprenus sian bapton kaj banalan nomon “La Rivera Domo.”

Sed, strange neniu eĥis tiun sopiron.

La Kapitano ne plu fumis ĉe la fino de la flanko verando: la malbone flegata gazono ĉiam kaŭzis al li image vidi malgrandan figuron en rozkolora robo kaj misforma ĉapelo falĉanta la herbon en flamanta sunbrilo. La morto de Judi pliproksimigis la ses vivantajn infanojn al lia koro kvankam li malmulte pli montris sian amon.

La Generalo fariĝis ĉiutage pli buldika kaj adorinda. Ne estas troigo diri ke ĉiuj nun adoris lin en lia malgranda reĝeca bebaĝo ĉar la kara vivo dufoje donaciĝis kaj la duan fojon ĝi estis la donaco de Judi, do netaksebla.

Mia plumo peze, malrapide moviĝis en la verkado de ĉi tiuj du lastaj ĉapitroj; ĝi rifuzas jam kuri malpeze, libere, do mi formetos ĝin por eviti malgajigi vin.

Iam, tamen, se vi volus tion aŭdi, plaĉus al mi denove rakonti pri miaj junaj Aŭstralianoj, lasante preteriri kelkajn jarojn.

Dume, adiaŭ kaj ĝis!

<<<<<>>>>>